HUNGARA VIVO
88/3. * 16,-Ft

ELEKTROFÉM HÓDMEZŐVÁSÁRHELY





ELEKTROFÉM
HÓDMEZŐVÁSÁRHELY

ELEKTROFEM
INDRUSTRIA
KOOPERATIVO

Táncsics M.u.15.
H-6801
Hódmezővásárhely

Telefono : 62/44-411
Telekso: 84-277

HUNGARA VIVO

ENHAVO

Benczik, V.: Pruviĝis la kapablo renoviĝi 82
Révész, S.: Faktoj, timoj kaj esperoj pri Hungario b. 85
Ternavski, M.: Poemoj 88
Baza Legolisto de la Originala Esperanta Literaturo 89
Tamási, Á.: Kiam la arbaro vekiĝas *(Jozefo Kiss)* 90
Fejér, Z.: Esperantaj libroj en Hofburg 92
Lozgaĉev, N.: Uralanoj foliumas Hungaran Vivon 94
Modest, J.: Eta ŝerco 103
Panoramo 100
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 103
Komaĉo, G.: duadek tagojn sur ebeno blanka 106
Recenzoj 114
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo 118
Krucenigmo, Ekzameno sen risko 119
Leterkesto, Korespondi deziras 120

Sur la frontpaĝo: preĝejo de la vilaĝo Hollókő, kiun UNESCO deklaris parto de la „monda heredaĵo de la homaro" (Foto de Z. Fejér)

Revuo de Hungara Esperant–Asocio
Adreso:
Budapest, I. Szentháromság tér 1-3.
Telefono: 563-659, 564-093
Poŝta adreso:
Pf. 193, H-1368 Budapest
Aperas dumonate
XXVIIa jaro, 1988 n-ro 3
(139)

POR UNUECA KULTURA BAZO

Sur la paĝo 89 de tiu ĉi numero aperas materialo, kiu devus esti pli grava por ni, ol ĉiuj ceteraj paĝoj de tiu ĉi revuo kaj de ĉiuj aliaj revuoj. Tiu materialo estas fakte represita el la ĵus aperinta nova libro de William Auld: La fenomeno Esperanto. *Ĵetante rigardon maldekstren, al la enhavtabelo, oni povas konstati, ke la titolo de la represaĵo estas* Baza Legolisto de la Originala Esperanta Literaturo.

La listo konsistas el 51 titoloj: 22 poemlibroj kaj 29 prozaj verkoj, kreitaj dum sepdek unu jaroj, inter 1912 kaj 1983. Kronologie la unua estas la poemaro Tra l' silento de Edmond Privat, la lasta la romano Sur kampo granita *de István* Nemere. *Verŝajne estas pli ol hazardo, ke el la 51 libroj 11 venas el la plumo de hungaraj aŭtoroj.*

Sed mi ne celas nun fari hungaran propagandon. Min pensigas tiu listo, pri kies iu aŭ tiu ero oni povus eble diskuti, sed tio ne havus sencon. La listo de Auld estas zorge pripensita, elektita surbaze de lia admirinda kono de nia beletro. Ni devas cerbumi pri tio, kiel utiligi ĝin?

Oni ofte konstatis, ke en la disvastigado de la Esperanta kulturo la ĉefa malhelpo estas tio, ke Esperantujo ne havas kulturan substrukturon, t.e lernejan reton, kiel la naciaj kulturoj. Pro tio la kulturaj-literaturaj konoj de la esperantistoj estas tre hazardaj, mankas al ili komuna bazo. Nun ni havas la bazon, produkton de la ĉefa korifeo de nia literaturo. Ni uzu ĝin.

Kiel? Unue, tiu ĉi listo devas esti diskonigita ĉie. Mi petas ĉiun kolegon-redaktoron represi ĝin. Ĝi atingu senescepte ĉiun esperantiston, kiu scias legi. Se plurfoje, do tiom pli bone. Due, iamaniere ĝi eniru niajn ekzamenajn postulojn. Kompreneble oni ne devas preskribi por la ekzamenĝantoj en mezgrada ekzameno legi ĉiujn 51 librojn. Sed jes, oni povas devigi ilin elekti la kutime legendajn tri, kvin aŭ ses librojn ĝuste el tiu ĉi *listo!*

Oni povas obĵeti, ke preskaŭ duono de la listo momente ne troviĝas en la merkato. Tio estas vero. Kaj eĉ pli, multaj el la aĉeteblaj titoloj estas riceveblaj nur kontraŭ internacie ŝanĝebla valuto. Tamen, la demando estas alirebla ankaŭ alimaniere. Nome, pli ol duono de la listigitaj libroj aĉeteblas, *kaj kelkaj el ili aĉeteblas ankaŭ en la valut-malriĉa Orienta Eŭropo...*

Sed sendube estas farendaĵoj ĉikampe. La Eldonejo de Hungara Esperanto-Asocio promesas koncentri siajn eldonrimedoj por ŝtopi la truojn en tiu ĉi listo. La libroj, kiuj laŭ niaj planoj eliros ĝis la venontjara UK, estos verŝajne la sekvaj: Pilgrimo, Preter la vivo, Sur sanga tero *kaj* Viktimoj *de* Baghy, Koko krias jam! *kaj* La granda aventuro *de* Szilágyi, *sed eble ankaŭ aliaj, provizitaj per praktika studcela postparolo — kaj represo de la tuta listo en ĉiu volumo.*

Ni eklaboru ĉiuj: redaktoroj de internaciaj revuoj kaj lokaj bultenoj, membroj de ekzamenaj komisionoj, eldonistoj, libroservoj kaj eĉ kunmetantoj de klubaj programoj. Por la Esperanta kulturo. Por la unueca kultura bazo de ĉiuj esperantistoj.

Vilmos Benczik

PRUVIĜIS LA KAPOBLO RENOVIĜI

Konferencis hungaraj komunistoj

János Kádár prezentas al la konferenco la raporton de la CK. Dum preskaŭ 32 jaroj lia personeco difinis la hungaran politikon.

Inter la 20-a kaj 22-a de majo en Budapeŝto kunsidis la tutlanda konferenco de la Hungara Socialisma Laborista Partio. Tiu konstato entenas neniom da novaĵo, ja oni ne memoras, kiam hungara partia kunveno estis tiagrade en la fokuso de la internacia interesiĝo, kiel nun. La viglan atenton altiris la antaŭaj diskutoj en la bazorganizaĵoj de la partio, kiuj ŝajnis esprimi fortajn dubojn pri la gvidmetodoj, kaj entute pri la politiko de la gvidaj organoj de la partio. Oni scivolis, ĉu tiu ĝenerala atmosfero, elvokita de la konstante malboniĝanta ekonomia kaj politika situacio de Hungario, manifestiĝos ankaŭ en la rezolucioj de la konferenco, kaj ĉefe, ĉu oni tiros ankaŭ la necesajn konkludojn pri personoj en gvidaj pozicioj?

La respondo al la supraj demandoj estas nepre jesa. La rezolucio de la konferenco multe ŝanĝiĝis kompare al la antaŭe preparita teksto, kaj en la fina formo ĝi donas nepre pli realan bildon pri la stato de la hungara socio, kaj pri la taskoj de la partio, kvankam ne eblas fornei, ke en ĝiaj paragrafoj senteblas, ke la vortumo estas rezulto de kompromisoj.

La adeptoj de la reformo povas esti kontentaj ankaŭ pri la rezultoj de la balotoj por la ĉefaj gvidorganoj. La konferenco ŝanĝis ĉ. kvaronon de la Centra Komitato. Estas atentinde, ke kvin personoj, kiuj pli frue membris ankaŭ en la Politburoo, nun ne ricevis sufiĉajn voĉojn eĉ por eniri la Centran Komitaton. (Tiuj estas: Sándor *Gáspár*, ĝenerala sekretario, poste prezidanto de la Nacia Konsilio de Sindikatoj; Ferenc *Havasi,* sekretario de la CK pri ekonomiaj aferoj, poste unua sekretario de la Budapeŝta Partia Komitato; György *Lázár,* ĉefministo




Tri vizaĝoj el la nova Politburoo: Károly Grósz (58 j.) (maldekstre) nun elektiĝis ĝenerala sekretario de la partio, kaj tiamaniere li okupas la du ĉefajn postenojn de la partia kaj ŝtata hierarkio — li promesis forlasi la ĉefministran seĝon fine de la kuranta jaro. Imre Pozsgay (55 j.) (meze), kiel ĝenerala sekretario de la Nacia Konsilio de Popolfronto fariĝis unu el la plej popularaj politikistoj de Hungario, kaj estas rigardata kiel la plej profunda teoriisto de politikaj reformoj; laŭ iuj antaŭvidoj okuponto de la ĉefministra posteno. Rezső Nyers (65 j.) (dekstre) la „patro" de la ne realiĝinta hungara ekonomia reformprovo en 1968 — tiam dum kelkaj jaroj li membris en la Politburoo, sed la kontraŭreformaj ventoj forblovis kun la reformoj ankaŭ lin.

tro, poste anstataŭanto de la ĝenerala sekretario de la CK; Károly *Németh,* anstataŭanto de la ĝenerala sekretario de la CK, poste prezidanto de la Prezidio; Miklós *Óvári,* sekretario de la CK.) En la nov-elektita nova 11-membra Politburoo restis nur du membroj, kiuj elektiĝis dum la 13-a Kongreso en 1985, ĉiuj ceteraj eniris ĝin poste. Siatempe tiu Kongreso estis aranĝita en la tiam konstruita pompe bela Kongresa Centro — la nuna konferenco okazis en pli modesta kunvenejo: tion oni povas interpreti ankaŭ kiel simbolon.

János *Kádár* fariĝis la prezidanto de la Partio (ĝis nun tiu funkcio ne ekzistis), sed li ne membras en la Politburoo. El la novaj membroj de la Politburoo oni atribuas elstaran gravecon al la elektiĝo de Imre *Pozsgay* (*poĵgai*) kaj Rezső *Nyers* (*njerŝ*). Pozsgay dum la lastaj jaroj, kiel ĝenerala sekretario de la Nacia Konsilio de la Patriota Popolfronto, fariĝis unu el la plej popularaj politikistoj de Hungario, ĉefe en intelektulaj rondoj. Li estas verŝajne la plej klera ideologo en la Politburoo, kun klaraj imagoj pri la farendaj politikaj reformoj. La fakto, ke kelkajn semajnojn post la konferenco li eniris la registaron kiel „ŝtatministro" (t.e. sen ministerio), supozigas, ke post duona jaro, kiam *Grósz* promesis forlasi la ĉefministran seĝon, sekvos lin tie Pozsgay. Dum Pozsgay okupiĝas pri la necesaj politikaj kaj sociaj reformoj, Nyers estas ekonomia reformisto. Antaŭ 20 jaroj li estis rigardata la „patro" de la tiama hungara ekonomia reformprojekto (neniam plenumita), kaj tiam dum kelkaj jaroj, ĝis la reformprovojn ne forblovis la malvarmaj ventoj, li jam membris en la Politburoo.

Demokratio venkis

La eksterlanda gazetara eĥo substrekis la demokratian atmosferon de la konferenco. Oni konstatas, ke kreskis ankaŭ la publikeco. Ĉesis la falsa „unuanimeco" ĉe la balotoj, mem Károly *Grósz*, kies popularеco estas ĉe la zenito, ricevis kvardek-kelkajn kontraŭ-voĉojn ĉe la baloto por eniri la Centran Komitaton (ĉeestis iom malpli ol naŭcent delegitoj). Tiu ĉi konferenco de la hungara partio pruvis, ke komunista partio kapablas en paca maniero, demokratie, tamen radikale renovigi siajn gvidorganojn.

Kiel jam dirite, la eksterlanda atento al la konferenco estis elstare granda. Tamen, ties intenseco variis de lando al lando. Inter la socialismaj landoj plej vaste informis pri ĝi la sovetia kaj pola gazetaro, dum en Rumanio kaj GDR aperis nur kurtaj komunikoj. En okcidento dediĉis la plej grandan atenton al ĝi tiuj landoj, kun kiuj Hungario havas la plej intensajn kontaktojn: Aŭstrio, FRG, Italio, sed estis ŝatinde forta gazetara eĥo ankaŭ en Usono.

Enormaj taskoj

Antaŭ la novaj gvidorganoj de la partio staras enormaj taskoj, ĉefe sur kampo ekonomia. Dum la lastaj tri jaroj *duobliĝis* la ŝuldo de Hungario en internacie ŝanĝebla valuto, kaj nun ĝi proksimas al 18 miliardoj da dolaroj,

kaj per tio, kalkulante por unu loĝanto, Hungario estas la *plej multe enŝuldiĝinta lando en Eŭropo.* En tiu ĉi jaro oni devos repagi ĉ. 2,5-3 miliardojn – tiu sumo verŝajne superos la eblojn de la hungara ekonomio.

La abrupta kresko dum la lastaj jaroj sekvas el la konstanta prokrastado de la necesaj strukturaj reformoj en la hungara industrio. La antaŭa gvidantaro timis la sociajn-politikajn konfliktojn, kiujn tiaj reformoj nepre elvokus. Krome, bremsis la reformojn ankaŭ certaj arkaikaj ideologiaj konsideroj, laŭ kiuj la evoluigo de la peza industrio kaj la produktado de bazmaterialoj nepre devas havi prioritatan lokon en socialisma ekonomio.

La prokrastado kompreneble kondukis nur al la ŝvelado de la problemoj, kaj la „sanigo" de la hungara ekonomio nun estos multe pli dolorplena socie, ol estus, ekzemple, antaŭ dek jaroj. La novaj gvidantoj de la lando estas en situacio tute ne enviinda – ili devos akceptigi doloran kaj amaran terapion al la loĝantaro, pro malsano, kiun kaŭzis ne ili, sed la antaŭuloj.

Nur ses semajnojn post la partia konferenco, la nova politburoo prezentas al la CK du alternativojn de la ekonomia restrukturigo. (Tiuj ĉi du alternativoj estis ankaŭ publikigitaj, kio antaŭ nur kelkaj monatoj estus afero neimagebla.) La *unua* alternativo preskribas relative rapidan restrukturigon, t.e. likvidon de la senrentabilitata produktado, kaj intensan evoluigon de la modernaj industribranĉoj. La avantaĝo de tiu ĉi varianto estus tio, ke ĝi revekus la internacian kredon pri la hungaraj reformintencoj, kaj tio siavice logus funkciantan kapitalon (do *ne* monpruntojn) al Hungario. La funkciantan kapitalon ordinare akompanas ankaŭ moderna teknologio, sekve plirapidiĝus ankaŭ la teknika evoluo de Hungario. Malavantaĝoj de tiu ĉi varianto estus la signife alta nombro de senlaboruloj (ĉiujare perdus sian postenon 80-100 mil homoj; en la nuna momento la nombro de senlaboruloj en Hungario estas ĉ. 16 mil), kaj la same alta inflacio – verŝajne ĉ. 20% jare. Krome, tiu ĉi varianto neprigus ankaŭ signifan devaluton de la hungara forinto. Kaze de la akceptiĝo de tiu ĉi varianto verŝajne malfaciliĝus ankaŭ la kunlaborado kun la partneroj en la Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo. Estas atentinde, ke eĉ kun tiu ĉi drasta terapio necesos 7-8 jaroj por haltigi la kreskadon de la ekonomia breĉo inter Hungario kaj la evoluintaj landoj. Ni aldonu ankoraŭ, ke tiu ĉi varianto entenas pluan malkreskon de la reala valoro de la salajroj, kaj ĉe la komenco ĝi *povas* kreskigi la eksterajn ŝuldojn.

La *dua* varianto la restrukturigon de la ekonomio subordigas al la malpliigo de la ekstera financa malekvilibro. Tio signifus fakte la pli konsekvencan aplikadon de la ĝisnunaj metodoj, kaj tiamaniere la restrukturigo kompreneble bezonus pli longan tempon. Tio estas en si mem malavantaĝo. Tamen, ankaŭ tiu ĉi varianto enhavas avantaĝojn: malpli grandan devaluton de la nacia mono, kaj sekve malpli grandan inflacion, ĉiujare perdus la laboron nur 30-50 mil personoj, kaj ankaŭ la reduktiĝo de la reala valoro de la salajroj estus malpli drasta. Krome, aperus malpli da problemoj en la kunlaborado kun la KEI-partneroj.

En tiu ĉi varianto tamen kuŝas ankaŭ grava *danĝero*, nome, ke pro la ne sufiĉe drasta ŝanĝo la ekonomio povos inercie restrukturiĝi – kiel tio jam plurfoje okazis pli frue.

Komence de julio, kiam mi tajpas tiujn ĉi liniojn, la du alternativoj estas nur teoriaj. Elekti la *unuan* alternativon eblos nur, se la hungara ekonomio povos elŝviti ĉijare la repagotajn 2,5-3 miliardojn da dolaroj – alie dum la venonta jaro oni devos *ĉion* subordigi al la akurata repagado de la ŝuldoj.

Politikaj reformoj

Dum longa tempo la hungarajn ekonomiajn reformojn damaĝis la fakto, ke ilin ne akompanis sociaj kaj politikaj reformoj. La nova partia gvidantaro konscias, ke oni nepre devas ŝanĝi tiun situacion. Estas antaŭpreparataj „leĝo pri ekonomiaj societoj", kiu ebligus intensan „ensuĉadon" de la privata kapitalo en la ekonomian vivon, kaj kreus pli bonajn kondiĉojn ankaŭ por la eksterlanda kapitalo. Tiu leĝo intencas vigligi la ekonomion, sed nediskuteble ĝi havas ankaŭ signifajn politikajn aspektojn.

Alia preparata leĝo deziras certigi la rajton de la civitanoj por kunveni, demonstracii, kaj por formi asociojn. La lastatempaj demonstracioj en Hungario pruvis, ke la loĝantaro bezonas tiun formon de la opiniesprimado. La baza penso de tiuj leĝoj estos, ke la organizantoj de demonstracioj aŭ asocioj devu nur *informi* kaj ne *peticii* pri sia intenco al la ŝtatadministraj instancoj (ekz. al la polico). Estos novaĵo en la hungara juro ankaŭ tio, ke la civitanoj rajtos procesi ĉe tribunalo kontraŭ ŝtatadministraj instrukcioj.

La maja partia konferenco verŝajne estis la plej signifa evento de la hungara politika vivo dum la lastaj tri jardekoj. Ĝi montris la kapablon surpaŝi la vojon de radikaj reformoj – nun la hungara popolo bezonas sufiĉe da kuraĝo kaj fortoj por trairi tiun vojon...

Vilmos *Benczik*

Ĵus aperis!

PERFEKTA CIVITANO

Plena novelaro

de Sándor Szathmári

Prezo:

39,-- ned. gld.

(200 forintoj por Hungario)

Mendu tuj!

Sándor Révész

Faktoj, timoj kaj esperoj pri Hungario

6. La fendiĝanta monolito

Nuntempe oni multe parolas en Hungario pri tio, ke perdiĝis la koncepto, la imago, la idealoj pri la futuro, oni ne plu vidas aŭ ne plu deziras vidi la cel-staton, kien la socia evoluo laŭdeklare tendencas. Tiu fenomeno plejofte estas klarigita tiel, ke pro la premo de la nuntempaj problemoj, pro la individuiĝo, pro la ĉiutagaj merkataj bataloj ktp. oni perdas la longdistancajn, historiajn vidkapablon kaj videmon. Laŭ mi la kerna kaŭzo estas alio. Nome tio, ke la longdistanca futur-koncepto diskreditiĝis kiel primara fonto de la politika legitimeco, kaj la politika superstrukturo ne maturiĝis sufiĉe por la disvolviĝo de socie strukturita futur-konceptaro.

Laŭ tiu koncepto, kiu ligas la politikan legitimecon al certa for-futura celo, la politiko (kiel ŝoforo la aŭtomobilon) direktas, sed ne formas parton de la socio, ĝi konas la leĝojn de la socio kaj povas manipuli ilin kvazaŭ deekstere, ĝi travidas la ensocian interesbatalon, sed ne partoprenas ĝin kun specifaj interesoj, ja, la politik-farantoj ne havas specifajn interesojn, kiel la ordinaraj socianoj, ili — en ideal-tipa kazo — nur servas objektive la historiajn leĝojn. La strukturiteco de la socio, la strukturiteco de la interesaro, opiniaro, mondkonceptaro de la socio estas survoje venkenda historia balasto. La civitana volo estas hazarda fenomeno, dum la politika volo reprezentas la esencon de la historia vojo, ĉar nur ĝi povas esti aŭtentike (ne parte-partikulare) tia laŭ la historiaj leĝoj. Se la politiko estas aŭtentika reprezentanto de la historiaj leĝoj, ĝi memkompreneble devas esti samtiel homogena, kiel ĝusta leĝaro. La realan decidfaran procezon (kiu respegulas tamen la malhomogenecon de la politika volo) oni devas kaŝi antaŭ la laika publiko, kaj la formala, publika decidfara mekanismo havas nur la funkcion ceremonie kredkonfesi pri la homogenaj politiko kaj historia leĝaro. Se la politiko pretendas esti homogena kaj leĝ-konforme objektiva, tiam ĉiuj porokazaj decidoj ligiĝas al la tuto de la politiko, ligiĝas al la ĝenerala legitimeco de la politiko. Se la politiko levas sin de la socio, tiam ĝi levas sin ankaŭ de la valid-kampo de „errare humanum est". La kritiko evitas la rondon de la nuntempe validaj decidoj kaj anstataŭe celas la pasintecon kaj la decid-plenuman praktikon. Estas ofte observeble, ke politikistoj, kiuj malsame opinias pri la aktualaj farendaĵoj esprimas tiun malsamecon per malsam-forta kaj malsam-emfaza kritiko de la pasinteco.

En tiu sistemo la gravaj korektoj kaj direkto-ŝanĝoj apenaŭ povas okazi sen krizo de la legitimeco.

La spertoj pri la eraremo de la politiko (kio ja estas natura afero), la neevitebla kritikado de la pasinteco forajŭsa, kio ja ĵetas sian ombron ankaŭ sur la estantecon, la krizoj de la legitimeco iom-post-iom diskreditas la tradician koncepton pri la legitimeco. Sed la plej forta faktoro tamen estas la civitana konscio, kiu fortiĝas paralele kun la socia moderniĝo, kaj kiu ne povas esprimiĝi enkadre de la tradicia politika superstrukturo. Aliflanke, la politik-farantoj same havas spertojn pri sia eraremo, kaj post la iluzio de la „lasta batalo" ili devas forĵeti la iluzion de la „lasta eraro". Do, la politiko bezonas sen-krizan, normalvojan korekteblon, des pli, ke la hungara politiko estas pli kaj pli forte kaj direkte kunligita kun la ŝanĝiĝema cetero de la Terglobo.

Estis jam antaŭlonge, ke la hungara politiko funkciis pure laŭ tiu koncepto, kiun mi supre skizis, sed tiu koncepto ankaŭ nun havas fortan influon al la hungara politiko, kaj eĉ se kun modifoj plufunkcias la politika superstrukturo baziĝanta sur tiu koncepto. Ni povus formuli tiel, ke la monolito de la politiko estas jam multe fendiĝinta, sed tute ne disfalinta.

La vojo al la malmonolitigo de la politika superstrukturo, al la emancipigado de la civitana volo, al la demokratiaj politika kulturo kaj politikaj kapabloj gvidas tra batalaro pri la asocioj, pri la praktika rajto asociiĝi. Dum la pasintaj 6-8 jaroj unu post la aliaj ekŝtormis bataloj pri asoci-fondaj inciatoj jen sukcese, jen duonsukcese, jen fiaske.

Kelkaj ekzemploj: post multjara ŝvita strebado sukcesis fondi sian interes-protektan asocion kaj gazeton la hadikapuloj. La ciganaj intelektuloj kaj sociologoj okupiĝantaj pri la cigan-problemo jam de la 60aj jaroj luktas por tio, ke la ciganaron rilatanta problemaro traktiĝu ne nure sociala, sed ankaŭ etna, minoritata. Finfine en 1986 povis fondiĝi „Kultura Asocio de la Hungariaj Ciganoj", similkaraktera (kvankam ne samrajta) al la asocioj de la aliaj hungariaj minoritataj etnoj. Samjare ekaperis la dulingva cigan-gazeto. Laŭ la komentario de la tagĵurnalo *Magyar Nemzet*: „Multege da kontraŭdiroj, interes- kaj opini-diferencoj ekvidiĝis en la fondo-procezo, kontraŭpuŝiĝis la emocioj, kaj ĉio ĉi kaŭzis ĝis nun sentatajn kramfojn." Komence de la 80aj jaroj spontane elformiĝis naturisma ripozcentro ĉe Budapeŝt-proksima lagaro. La naturistoj perbatalis longe kaj peripetivoje la fondo-rajton por sia asocio, kaj la kompromisoj, kiujn ili devis akcepti (troreguligo, alta kotizo, senbezona izoligo de la naturistejo ktp.), kaŭzis poste multe da problemoj kaj forigis definitive la amikecan, spontanan, interhelpeman etoson de la antaŭ-asociaj jaroj. En nov-konstruita

panelĝangalo de la ĉefurbo agemaj lokanoj iniciatis formi amikan rondon kun la celoj mildigi la lokajn problemojn kaj antaŭenigi la socian integriĝon de la popolo de la panel-kaĝaro. La lokaj instancoj traktis la inciaton kontraŭinstanca, opozicia provokaĵo, kaj inter skandalaj cirkonstancoj obstrukcis la fondiĝon. Pri la afero verkiĝis dokumenta televida filmo, kaj tiu ĉi kazo vaste konsciigis la publikon pri la kontraŭdiroj de la asoci-fonda reguligo. Finfine la fondiĝo aprobiĝis, sed nur kun tiel reduktita (ekskluzive kultureca) celaro, ke la afero grandparte perdis sian sencon.

Paralele kun tiuj bru-vekaj fond-bataloj are estiĝis la lokaj asocioj en silento. La unuaj urbo-protektaj, urbo-patriotaj asocioj registriĝis en 1982-1983 kaj en 1986 ili nombris jam 46, unu jaron poste pli ol cent. Dum la sama periodo ekagis 80-100 lokaj, plejofte vilaĝaj kultur-rondoj (diversnome).

La asoci-multiĝo en la nuntempa Hungario estas eksplod-ritma fenomeno malgraŭ tio, kio legeblas en la raporto de la Kulturpolitika Komisiono de la Patriota Popolfronto, ke „multaj faktoroj obstaklas la fondiĝon kaj plimultiĝon de la asocioj, plejofte la troa severeco en la aprobo kaj la kontrolo, la politika timo, la gardado pri la organizaj monopoloj, la manko de la demokratia civitana praktiko, la timo perdi la apogon de la ŝtataj kaj socigvidaj organoj kaj ekonomiaj unuoj, la ne-informiteco de la ŝtatadministraj instancoj".

Ni povus ankoraŭ longe listigi la novnaskitajn asociojn, ekzemple la interesdefendajn asociojn de la grandfamilianoj, la sinhelpan asocion de la pensiuloj aŭ la novajn asociojn de la hundposedantoj. (Ĉi lasta ekzemplo estas specife interesa, ĉar la monopolo de la Tutlanda Asocio de la Hungaraj Hundposedantoj ŝajnis ĝis nun netuŝebla, kaj misuzante la monopolon la gvidantoj elformis tiel neelteneble tiranecan praktikon, ke la membraro dum 15 jaroj dekoniĝis (dum kreskis la nombro de la hundposedantoj).

Estas menciinde, ke post plurjardeka silento kaj regreso la ĵurnaloj denove raportas pli kaj pli pri la religia asocia agado, ekzemple pri la Misio por Savi la Deviiĝemajn Gejunulojn (ĉefe la drogistojn) kaj pri la Misio por Savi la Alkoholistojn. Depost la malfondiĝo de preskaŭ ĉiuj ordenoj en 1950, en 1986 fondiĝis nialande la unuan fojon nova ordeno, la Societo Beata Virgulino de la Hungaroj por monaĥinoj-flegistinoj. Dum la lastaj 10-15 jaroj la religia influo en la hungara socio ĝenerale fortiĝis, kaj populariĝis la diversaj et-komunumaj eklezieroj. Lastatempe ankaŭ la oficiala pritakso pri la t.n. baz-komunumoj en la plej granda hungara eklezio (t.e. la romkatolika) iĝis pli pozitiva, sed la radikala parto de la movado daŭre havas konfliktojn kaj kun la hungara eklezi-pinto, kaj kun Vatikano, kaj kun la ŝtato. (La radikalaj baz-komunumanoj ekzemple pretendas la rajton fari pacan labor-servon anstatŭ la milit-servo. Je tio nun rajtas nur la nazarenoj baze de speciala kontrakto.)

Memkompreneble ni povus mencii ankaŭ provizore aŭ definitive malsukcesajn asociiĝajn provojn. Estas precipe malfacile fondi tiajn fakajn interes-protektajn asociojn, kiuj tuŝus la sindikatan monopolon. Oni iniciatis jam – ĝis nun vane – ĉitipajn asociojn por la inĝenieroj, tradukistoj, interpretistoj ktp. Fiaskis kaj restis sen interesprotekta organizaĵo ankaŭ la et-entreprenantoj. La Ĉirkaŭ-Danuba Pejzaĝ-protekta Asocio en 1984 havanta antaŭan, provizoran aprobon estis jam sojle de la registriĝo, sed la fondiĝo lastminute tamen malebliĝis, kaj nun tiuj organizitaj civitanaj grupoj, kiuj partoprenas la diskuton pri la sorto de la Danubo (Danub-Rondo, Amikoj de la Danubo, Blu-uloj), ne havas leĝajn jurajn kadrojn.

La Konstitucio de Hungario rekonas la rajton de la civitanoj je asociiĝo, sed la nuntempa jura reguligo milde dirite malfaciligas la efektiviĝon de la konstitucia rajto. Jam eĉ pri ekorganizado de asocio oni devas informi la kontrolontan instancon, kaj la kontrol-instanco povas malpermesi la organizadon eĉ per la simpla aserto, ke la asocio ne estas bezonata. Kontraŭ tia decido oni ne povas apelacii al tribunalo. La sekretario de la Jura Komisiono de la Patriota Popolfronto formulis tiel, ke la nuna situacio estas pli ol kritikinda kaj la konfliktoj pri la asoci-fondoj pliigas la malfidon pri la ŝtata administrado. La Patriota Popolfronto lastatempe elpaŝas por radikaj ŝanĝoj. Ĝi proponas tion, ke la novan leĝon pri la asocioj la parlamento pritraktu pli baldaŭ ol planite (t.e. antaŭ 1989). Laŭ la komisiono de la Patriota Popolfronto, kiu okupiĝas pri la temo, la principoj de la nova leĝo devus esti la sekvaj: la asociiĝo estas persona rajto; la asociojn oni ne bezonas aprobigi, nur registrigi, kaj la registrado ne povas esti rifuzata, se la asocia statuto estas konforma al la leĝoj; la registrado kaj la jura kontrolado estas la tasko de la tribunalo kaj ne de ŝtat-administraj instancoj. (Ni aldonu, ke la opinio de la Patriota Popolfronto ne nepre koincidas kun tiu de la ceteraj soci-gvidaj organoj. Ekzemple ŝtataj instancoj ĝis nun ne esprimis sin pri la menciitaj principoj.)

Pro la praktike nekontrolebla funkciado, pro la superpotenco de la plenumorganoj (la konsilantaraj kaj partiaj plenum-komitatoj, la ministraro, la Prezidio) pri efektivaj antaŭ-decidaj diskutoj apenaŭ havis spertojn la hungara publiko dum longaj jardekoj. La publiko ne aŭdis pri kontraŭvoĉoj en decidfaraj forumoj, nek pri kontraŭopinioj pinte de la politik-farado.

Nun estas – ne male, sed tamen alie. La informisto de la ministraro parolas pri tio, ke dum nekutime longaj ministraraj kunsidoj okazas akraj diskutoj (sed li ne diras kiuj reprezentas kiajn opiniojn kaj kiel); oficiala agenteja komuniko publikigas la fakton, ke la ministraro kaj la sindikatoj pri kelkaj problemoj (memkompreneble salajroproblemoj) ne sukcesis interkonsenti. La kontraŭ-voĉado iĝis kutima fenomeno de la kongresoj de la gravaj tutlandaj kaj monopolaj organizaĵoj (ekz. kongreso de la Sindikatoj, de la Komunisma Junulara Asocio ktp.) kaj de la parlamentaj kunsidoj. La kontraŭantoj ne formas organizitan grupon, ili estas izolaj unuopuloj, kaj ĝenerale restas en 1-10%-a minoritato. La determina kvanto de la „maŝinaj voĉdonantoj" malebligas vidi la realan proporcion inter tiuj, kiuj estas profundkonvinke por aŭ profundkonvinke kontraŭ. La diversaj raportoj, rezoluciproponoj kaj leĝ-proponoj de la plenum-organoj

do plu havas sekuran vojon al la akceptiĝo, sed tiu sekureco por la proponantoj ne plu estas „senpaga". La modifa efiko de la parlamentaj komisionoj kaj la grandaj sociaj organizaĵoj estas multe pli forta kaj publika al la proponoj ol antaŭe. Ekzemple la proponita (kaj akceptita) leĝo pri la familioj multe malpli malfaciligas la divorcon ol laŭ la origina propono de la Ministerio pri Justico.

La sola fojo, kiam la parlamento decidis kontraŭ la plenumorgano estis printempe de 1986, kiam la parlamentanoj akceptis modifi la leĝ-proponon de la ministraro malgraŭ la kontraŭopinio de la responsa ministro. La nombrado de la voĉoj (193 por, 90 kontraŭ la modifo) estis teknike iom komplika, ja la funkciuloj de la parlamento jam dekutimiĝis de tiaj taskoj, kaj la hungara parlamentejo ne estas provizita per elektra voĉnombra sistemo.

La amendo cetere ne tuŝis esencajn punktojn (temis pri du neoftaj depag-specoj), sed mem la malvenko de la ministrara opinio efikis tiel ŝoke, ke sekvont-kunside oni modifigis la proceduran regularon de la parlamento tiel, ke la amendo-proponojn unue traktas ne la plen-kunsido, sed la kompetenta parlamenta komisiono, kaj amend-proponojn oni rajtas fari nur ĝis ok tagojn antaŭ la kunsido. Se la ministraro ne konsentas pri la amendo, oni voĉdonigas unue pri la ministrara propono kaj nur poste pri la amendo-propono. La parlamentanoj akceptis tiun modifon, kiu plufortigas la pozicion de la plenum-organoj, sed oni ne scias kiel, ĉar la regular-modifa kunsido estis nepublika (la unuan fojon depost 1953).

Pasis unu jaro, kaj pasintsomere en la parlament-kunsido lanĉiĝis propono por reliberigi la propon-rajton de la parlamentanoj, sed la pritrakton de tiu ĉi propono oni provizore prokrastigis per proceduraj manovroj sen voĉdonigi la deputitojn.

La deputita laboro kaj ĉefe la deputita konscio depost la lastaj balotoj en 1985 multe ŝanĝiĝis, kaj en la komisionaj kunsidoj kaj rezolucioj ĉisomere la delegitoj formuladas jam tute surprize akratone. Ekzemple la komisiono pri la industrio unuanime akceptis rezolucion por esprimi sian malkontentecon pro tio, ke la ŝtata buĝeto (multe deficita) denove pruvas, ke ne plenumiĝadas la decidoj akceptitaj de la parlamento, kaj la komisiono opinias necese ŝanĝi la homojn en kelkaj funkcioj. (Ja, date de ĉi rezolucio la baldaŭaj ŝanĝoj estis jam antaŭscieblaj.) Iu deputito indignite stentoris, ke la plenumorganoj simple ignoradas la parlamente akceptitajn dokumentojn. „De jaro al jaro ni devas aprobi la inertecon... Ne estas akordigeble kun nia deputita respondo jesadi al tute diference plenumiĝinta buĝeto sen iaj ajn konsekvencoj." Plurajn ekonomipolitikajn paŝojn la komisionanoj opiniis kontraŭ-konstituciaj.

Septembre de 1987, kiam la jena alineo tajpiĝas, la granda emoci-boliga temo en Hungario estas la nova impostо-sistemo. Praktike ĉiuj sociaj organizaĵoj (la Sindikatoj, la Komunisma Junulara Asocio ktp. ktp.), ĉiuj parlamentaj komisionoj kaj ĉiuj departementaj parlamentanaj grupoj esprimis kritikon pri certaj punktoj aŭ principoj de la leĝ-propono, oni multe kritikis la antaŭ-preparadon de la leĝo kaj la izoligon de la impostsistema reformo de aliaj reform-paŝoj (reformo de la salajra-strukturo, de la sociala politiko stp.). En la publika diskuto ne aperas, sed ekzistas kaj „surstrate" ofte aŭdiĝas opinioj ĝenerale kontraŭ la ideo rekte impostigi la individuajn enspezojn. La Tutlanda Teknika Inform-Centro kaj -Biblioteko tute propraidee (ja, kun la aprobo de la prezidanto de la parlamento) provizis la deputitojn per baza „impostologia" gvidlibro por helpi ilin en la kompetenta decid-farado. (La unua varianto de la gvidlibro enhavis ankaŭ influajn pritaksojn, sed post interveno de la Ministerio pri Financaj Aferoj la opini-influajn partojn oni forstrekis.) Depost la frakasiĝo de la plur-partia sistemo, la hungara publiko ankoraŭ neniam atendis tiel intereso-streĉe kaj ekscite parlamentan kunsidon, kiel nun tiun traktantan pri la impost-leĝo. Kelkloke oni organizis eĉ veton pri la proporcio de la por-aj kaj kontraŭaj voĉdonoj. Iu deputito proponis, ke la televido rekte dissendu pri la kunsido. La responsa ministro trovis necese averti plurfoje la deputitojn pri la sekvoj de la eventuala ne-akcepto de la leĝ-propono.

Finfine la leĝ-propono kelkloke ŝanĝiĝis, la Parlamento akceptis 19 deputitajn amendojn, inkluzive tiujn, kiujn proponis por akcepto la koncerna parlamenta komisiono kaj la ministraro, kaj la Parlamento akceptis neniujn amendojn malproponitajn de la ministraro. La amendoj ne tuŝis la gravajn punktojn de la propono. La leĝon finfine kontraŭis nur 10 delegitoj (3%), kaj sin detenis 21 (6%), multe malpli ol oni pensis (timis, esperis). La televido ne dissendis rekte pri la alparoloj, anstataŭe dissendiĝis la malvenko de la hungara ĉampiona futbal-teamo je 0:4.

Pri la ŝanĝoj en la ĝenerala deputita sinteno ekzistas du-polusaj mistaksoj. Laŭ unu tiuj ŝanĝoj estas nur ŝajnaj, trompaj, trukaj por redekori surface la saman fasadon. Laŭ la alia pritakso la ŝanĝoj pruvas la altgravan demokratiecon de la parlamenta decid-fara mekanismo.

Ĝuste nun kaj ĝuste pro la efektiveco de la ŝanĝoj montriĝas la strukturaj obstakloj de la aŭtenta deputita laboro. La parlamento kunsidas samtiel malmulte (ĉ. 8 tagojn jare), kvazaŭ ĝia funkcio estus plu nur ceremonia. La deputitoj laboras en siaj laborlokoj plentempe, la deputita honorario kovras nur la necesajn deputitajn elspezojn (vojaĝ- kaj hotel-kostoj ktp.), la deputitoj ne disponas ekspertan stabon, nek monon por verkigi ekspertizojn. La parlamentanoj povas grupiĝi, organiziĝi en nur laŭtema kaj laŭgeografia dimensioj, sed ne laŭ opinio, mond- kaj soci-koncepto.

Memkompreneble nur malgranda parto de la aktualaj diskutoj tuŝas la Parlamenton. El la vidpunkto de la politika reformo estas plej interesaj tiuj diskutoj, kiuj demonstras la ŝanĝon de la civila vol-esprima, vol-validiga praktiko.

Ekzemple en la Hungara Vagon- kaj Maŝin-fabriko „Rába" (unu el la plej gravaj kaj prosperaj entreprenoj de la lando) oni enkondukis tian ferian sistemon, ke ĉiuj laboristoj havis siajn feri-tagojn tiam, kiam la ĉefoj ordonis, sendepende de la feri-intencoj kaj bezonoj de la koncernulo. La laboristoj memkompreneble sakris, sed ne foriris, ĉar en la koncerna urbo ne ekzistas simile bone

paganta entrepreno, sed plurmil homoj ĉesis plupagi la sindikatan kotizon, do ĉesis esti sindikatanoj (malgraŭ, ke la sindikato mem estis kontraŭ la enkondukita feri-sistemo).

(Tiu ĉi ekzemplo bone montras la pozicion de la hungaraj sindikatoj: forlasi la „interes-defendan" organizaĝo sentiĝas paŝo kontraŭ tiu potenco, kontraŭ kiu la sindikato devus defendi la laboristajn interesojn.)

Sub la egido de la Ministerio pri Financoj funkciis la Financ-ekonomia Esplorinstituto. La esplorinstituto estas konata kiel naskejo de radikalaj ekonomi-politikaj ideoj, kiel brua diskutejo. La plej konataj ekonomikistoj de la instituto estis ĉefverkantoj de tiu ekonomi-politika programstudo, kiu verkiĝis pri la kondiĉoj de la elkriziĝo, mende de la Popolfronto konekse, sed ne subordite al la partia kaj ministrara ekonomipolitika programigo. La Ministerio malfondis la Instituton, sed la kunlaborantoj de la instituto decidis tamen ne disiri, sed formi sendependan entreprenon okupiĝantan pri ekonomikistaj, analizaj servoj.

Konforme al la monolita sistemo la hungaraj verkistoj (kiel ankaŭ la muzikistoj, la arkitektoj, la teatrartistoj ktp.) havas nur unu asocion. Verkistaj grupoj ĝis nun vane sopiris por memstaraj asociaj kadroj kun jura personeco. La unusola asocio havis iom instanceskan karakteron, la kulturpolitiko traktis ĝin reprezentanto, konsult-organo de la tuta hungara verkistaro. La ministro pri kulturo kelkmonate post la lasta asembleo de la asocio deklaris, ke la Ministerio ne plu traktas la Asocion reprezentanto de la hungara verkistaro. La kulturpolitiko riproĉas al la Asocio pro kontraŭ-statutaj faroj kaj deklaroj de gvid-funkciaj asocianoj, pro apogo de opoziciaj agado kaj sinesprimado de parto de la verkistoj ktp. La verkistoj protestis al la kulturpolitiko pro difektoj de la verko-libereco, pro publico-malpermeso kontraŭ tre populara hungara dramverkisto, pro disigo de revuaj redakcioj ktp. Finfine en la asembleo montriĝis plimulto kontraŭ la oficiala kutlurpolitika star-punkto, por gvid-organanoj, gvid-funkciuloj ne elektiĝis favoratoj de la kulturpolitiko, kaj elektiĝis malfavoratoj. Postasemblee konataj „favoratoj", ĉefredaktoroj de la centraj literaturaj, kulturaj revuoj, gazetoj, reprezentantoj de la oficiala kulturpolitiko, mem la ministro pri kulturo eksmembriĝis, sed tre malmulte da verkistoj sekvis ilin. 95% de la membroj restis. Post neesencaj kompromisaj paŝoj (tri konataj opoziciuloj abdikis pri komitataneco kaj kooptiĝis „mezuloj") la asocio plu funkcias, la karaktero de la rilato inter la asocio kaj la ministerio en la nova situacio ankoraŭ ne estas klare videbla.

Ĝis 1984 la iucela ne-oficiala kolektado de subskriboj konsideriĝis aŭtomate kontraŭ-ŝtata provoko. Ĝis tiam la subskrib-kolektado restis ĉiam en malvasta, ĉefurba intelektula rondo, kaj la subskrib-nombro malofte estis super cent. Ĝuste la ekologiaj problemoj kuntiris en la civitanan politikan agadon la subskribkolektadon kiel volespriman formon. Kontraŭ la planoj pri la Danuba akvocentrala sistemo kolektiĝis dum duonjaro pli ol dek mil subskriboj por letero al la ministraro kaj la Parlamento. (Oni neniam laŭtlegis la leteron en la Parlamento, neniam publikigis kaj neniam prirespondis ĝin.) Samjare en novembro en sola mezgranda urbo dum du tagoj kolektiĝis 2500 subskriboj kontraŭ la ekkonstruado de farmacia restaĵ-bruliga sistemo. La pridanuban subskrib-kolektadon ankoraŭ prisilentis la gazetaro kaj obstaklis la polico. La novembran subskrib-kolektadon jam priraportis la gazetoj (duonjaron poste) kaj traktis ĝin kiel tute normalan fenomenon de nia politika kulturo. Estas karakterize, ke la studaĵo analizanta la ekologiajn diskutojn vidpunkte de la politika kulturo publikiĝis unue *samizdate,* kaj kelkajn monatojn poste leĝe.

La menciitaj ekzemploj sugestas tion, ke la civitanoj estas kaj konscias sin malpli senpovaj, malpli elliveritaj al la politika monolito ol antaŭe, sed estas atentinda ankaŭ tio, ke la civitanaj ŝancoj por atingi konkretajn rezultojn nek nun estas fortaj. Funkcias plu la feri-sistemo en „Rába", konstruiĝas la ekologi-vidpunkte dubaj investaĵoj ktp.

KANTO

Mikaelo Ternavski : Poemoj

Ho! Se vi scius, mia amata.
Ho! Se vi scius, mia amata.
Kiel mi suferas, ĉar mi ne scias,
Kie estas nun Vi,
Kie estas nun Vi.

Ho! Se vi sius, mia amata.
Ho! Se vi scius, mia amata.
Kiel mi suferas, ĉar mi ne scias,
Kiu estas ĉe Vi,
Kiu estas ĉe Vi.

Ho! Se vi scius, mia amata.
Ho! Se vi scius, mia amata.
Kiel mi suferas, ĉar mi,
bedaŭrinde, scias:
Kie estas nun Vi,
Kiu estas ĉe Vi.

I

tage multe da aĵoj mi vidis

sed nun estas nokto – kaj nenio
altiras
mian atenton:
la nokto glutis la maron –
kvazaŭ ĝi ne ekzistis
la nokto glutis la montaron –
kvazaŭ ĝi ne ekzistis
la nokto glutis la magnolion –
kvazaŭ ĝi ne ekzistis

sed mi vidis ĉe mi nur vin
mia kara
mi estas danka pro tio
al la nokto

* * *

kiam mi subakviĝis
kaj malfermis la okulojn –
mi tuj ekvidis:
kiom multas fiŝoj
en ĉi tiu lago

interalie
fiŝoj ĉiam multas
en ĉi tiu lago
sed ja
kiam oni troviĝas ie
kie ajn
nur ne sub la akvo
de ĉi tiu lago
oni ne vidas
ilin

Baza Legolisto de la Originala Esperanta Literatura

Poezio

AULD, William (red.). *Esperanta antologio.* Dua eldono, reviziita kaj kompletigita. Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1984. 887 p.*

AULD, W.; DINWOODIE, J.S.; FRANCIS, J.I.; ROSSETTI, R. *Kvaropo.* J. Régulo, La Laguna, 1952, 267 p.

AULD, William. *La infana raso.* J. Régulo, La Laguna, 1956. 104p.*

BAGHY, Julio. *Pilgrimo.* Budapest, 1926. 124p.

BAGHY, Julio. Preter la vivo. Literatura Mondo, Budapest, 1923. 124p.

BOULTON, Marjorie. *Eroj.* J. Régulo, La Laguna, 1955. 286p.*

HOHLOV, N. *La tajdo.* Heroldo de Esperanto, 1928. 61p.

KALOCSAY, Kálmán. *Streĉita kordo.* Literatura Mondo, Budapest, 1931. 189p.*

KOCK, Edwin de. *Fajro sur mia lango.* J. Régulo, La Laguna, 1967. 119p.*

KURZENS, Nikolai. *Mia spektro.* Literatura Mondo, Budapest, 1938. 64p.*

MAŬRA, G.E. *Duonvoĉe.* J. Régulo, La Laguna, 2a eld., 1963. 179p.

MIĤALSKI, Eŭgeno. *Prologo.* SAT, Leipzig, 1929. 62p.

MIYAMOTO Masao. *Invit' al japanesko.* J. Régulo, La Laguna, 1971. 110p.

PENETER, Peter. *Sekretaj sonetoj.* Konfidencie (Budapest? 1931?). 95p.

PRIVAT, Edmond. *Tra l' silento.* Ĝenevo, 1912. 29p.

RAGNARSSON, Baldur. *Ŝtupoj sen nomo.* J. Régulo, La Laguna, 1959. 127p.

ROSSETTI, Reto. *Pinta krajono.* J. Régulo, La Laguna, 1959. 128p.*

SADLER, Victor. *Memkritiko.* Eldonejo Koko, Kopenhago, 1967. 60p.*

SCHWARTZ, Raymond. *La stranga butiko.* Esperantista Centra Librejo, Parizo, 1931. 127p.

SCHWARTZ, Raymond. *Verdkata testamento.* Centra Librejo Esperanta, Parizo, 1926. 123p.*

TÁRKONY, Lajos. *Soifo.* J. Régulo, La Laguna, 1964. 231p.*

UEYAMA Masao. *Por forviŝi la memoron pri ŝi.* L' Omnibuso, Kioto, 1974. 95p.*

Proza Fikcio

BAGHY, Julio. *Sur sanga tero.* 2a eld. Szalay, Budapest, 1933. 254p.

BAGHY, Julio. *Viktimoj.* Hungara Esperanto-Instituto, Budapest, 1925. 162p.

BOULTON, Marjorie. *Okuloj.* J. Régulo, La Laguna, 1967. 177p.*

BULTHUIS, H.J. *Idoj de orfeo* Den Haag, 1923. 542p.

ENGHOLM, Stellan. *Homoj sur la tero.* Literatura Mondo, Budapest, 1932. 201p.*

FORGE, Jean. *Mr Tot aĉetas mil okulojn.* Literatura Mondo, Budapest, 1934. 243p.*

FRANCIS, John. *La granda kaldrono.* TK/Stafeto, Antverpeno, 1978. 592p.

FRANCIS, John. *Vitralo.* J. Régulo, La Laguna, 1960. 135p.*

KONISI Gaku. *Vage tra la dimensioj,* Japana Esperanto-Ligo, 1976. 77p.*

LORJAK. *Regulus.* Eldono Gabrielli, Ascoli Piceno, 1981. 340p.*

LUYKEN, H.A. *Pro Iŝtar.* Hirt & Sohn, Leipzig, 1924. 304p.*

MIYAMOTO Masao. *Naskitaj sur la ruino — Okinavo.* Librejo Pirato, 1976. 146p.*

NEMERE, István. *Sur kampo granita.* Hungara Esperanto–Asocio, Budapest, 1983. 125P.*

NEWELL, L.N. *Bakŝis.* Literatura Mondo, Budapest, 1938. 149p.*

PIĈ, Karolo. *La litomiŝla tombejo.* Artur E. Iltis, Saarbrücken, 1981. 276p.*

RIBILLARD, Jean. *Vivo kaj opinioj de majstro M' Saud.* J. Régulo, La Laguna 1963. 143p.

ROBINSON, Kenelm. *Se grenereto...* Londono, 1930. 158p.

ROSBACH, Johan Hammond. *Fianĉo de l' sorto.* Dansk Esperanto-Forlag, 1977. 192p.*

ROSSETTI, Cezaro. *Kredu min, sinjorino!* Heroldo de Esperanto, Scheveningen, 1950. 259p.*

ROSSETTI, Reto. *El la maniko.* J. Régulo, La Laguna, 1955. 221p.*

ROSSETTI, R.; SZILÁGYI, F. *33 rakontoj: La Esperanta novelarto.* J. Régulo, La Laguna, 1964. 328p.

SCHWARTZ, Raymond. *Kiel akvo de l' rivero.* J. Régulo, La Laguna, 1963. 487p.*

SCHWARTZ, Raymond. *Vole...novele.* TK, Kopenhago, 1971. 192p.

STURMER, K.R.C. *Por recenzo!* The Esperanto Publishing Co, Londono, 1930. 61p.

SZATHMÁRI, Sándor. *Vojaĝo al Kazohinio.* SAT, Parizo, 1958. 315p.*

SZILÁGYI, Ferenc. *Koko krias jam!* J. Régulo, La Laguna, 1955. 225p.

SZILÁGYI, Ferenc. *La granda aventuro.* Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1945. 143p.

TÓTH, Endre. *Lappar, la Antikristo.* Hungara Esperanto–Asocio, Budapest, 1982. 137p.

VARANKIN, Vladimir. *Metropoliteno.* Ekrelo, Amsterdam, 1933. 200p.*

Áron Tamási
(1897-1966)

Kiam la arbaro vekiĝas

La larmoj de l' ĉielo jam ĉiutage fariĝis pli malvarmetaj, kaj la espero de arboj malkreskis. La homoj fervore retiriĝis de la kampoj, kun senparola dankemo, sian gajon gardante. Jen tie, jen aliloke tritikgarboj, ĵetitaj al ĉaro ekekbrilis en la sunlumo adiaŭanta, kiel ĝojanonca vivo-ardo. La suno kisis la teron kaj repetis la helon, por zorgi pri ĝi dumnokte kaj reporti ĝin matene kun aro da ĝojo. La vespera voĉo de la sonorilo travibris la tegmenton de ŝindaj domoj kaj penetris inter kuntuŝiĝantajn frondojn: ĝi priserĉis kaj ĉirkaŭ si amasigis la korojn. Dio salutis poste la vilaĝon per trankvila bona nokto.

Arĉjo Balla, mem ne sciante kiel, sed „kulpis en misfaro" kaj nun atendas la krepuskon kun amaro ĝisfunda, ke li povu sin kaŝi hodiaŭ vespere. Kien ajn li kunportus sian vivon, nur ĝi apartenu al li. Ja per ĝi li ne ornamos la feliĉon de aliuloj, nek al karcero li pruntedonas ĝin eĉ por kurta tempo. Ĉar kio do okazus, se la kampo, la „etpatrujo" lin petus, ke li karesu ĝin per manoj laboremaj, li faligu larmojn en la kalikon de floroj apud la roso, li preĝu perakve kaj sarku la novan aflikton el inter tritikoj, kien ĝi metiĝis mar-amase far la tempo pasema. Pro tio li foriras kun dolor' de sekretigo, enanime kun la pleno de sentoj, enkore kun la amo-ventoj. De okuloj de ĝendarmo al okuloj de Dio, de zorgo-flegantoj al arbar-loĝantoj, ĉizi ĉagrenon al arboŝelo, gapi la flugon de agloj, serpenton malbeni.

Ĉe la fino de l' vilaĝo la granda juglandarbo jam sin kovris per mallumo, kaj kiam li preteriris ĝin, venis en lian kapon, ke ĉerko estos el ĝi skulptita por iu. Vojrandaj griloj ĉirpis al li adiaŭmuzikon, dormigante la teron, kiu promesis eĉ per sia lasta voĉo, ke ĝi ne perfidos la kaŝvaganton. Malproksime, apud la vepro fajro brulis, kiun ardigis junviroj, pri ĉevaloj okupiĝantaj. Surkampe, super la bieno de Valentino Dakó ŝvebis la marĉlumo, kiel giganta fajrostango: jen fajro de sonĝoj anoncanta la ekflamiĝon de enfosita mono. Kaj la gvida stelo — kiu delonge kun saĝuloj amikiĝis — helpis vojon serĉi al la kaŝvaganto kun okulo pli lume aperta, ol aliaj havas.

Seninterrompe ariĝis la pensoj, kiuj alvokis ĉiujn ulojn kiel kunvojaĝantojn, ekŝatitajn de Arĉjo dum liaj dudek unu jaroj. Post li iranta fantomaro estis tio, kiun Elinjo estris plore, mergante la kaŝvaganton en sia amo ĝisĉiela.

Tiel li paŝis kun la ŝat-distingo de l' fantomoj akompanantaj ĝis la arbaro Malpermeso, kiu estis donacita al la najbara vilaĝo ankoraŭ en la tempo de lia avo. Ĉe la enirejo de pado li haltis. La silento plenigis ĉiujn vakojn, dume la mallumo fariĝis maro netravidebla. Ĉiuj lumoj rifuĝis ĉielen, viciĝis je orokuloj kaj ĝojis tie pro liberiĝo. Malsupre dormis la regno de l' peko, desupre la steloj heroldis beatiĝon kaj gvidadis la pensojn de bonaj homoj.

La kaŝvaganto Arĉjo Balla promesis al la arbaro fidelon de sia animo, kriante el la profundo de mallumo. Saluton li diris al ĉiuj enloĝantoj kaj vokis ilin je amikiĝo:

— Donu al mi vian sekreton, ripozanta patrujo de l' birdoj, malluma regno. Rigardu survizaĝe la hejmiĝon de malgajo, ĝis mateno forigu ĝin kaj aŭdu la baton de koro mia, kiu estas vera konfeso al vi. Mi kisos la arbojn, ke ili kresku pli bone, sur ilin mi skribos la malgajon, ke ni iĝu fratoj, nur helpu mian vivon. Arbaro, malfermu la pordon. Dormigu min kaj gardu per via silentemo.

Perbrake foliojn li serĉis, kaj kiel la unua folio eksonis, sur tiu loko li kuŝiĝis en liton de la tero.

La mallumo lin dormigis, la arbara silento plektis ĉirkaŭ li palisaron, tra kiu ĝi lasis sole la sonĝon. Spirito obsedis la arbojn, en ili la koro komencis pulsadi. Per siaj branĉegoj ili brakumis unu la alian. Pacemon, piecon ili kantis, kaj la entuziasmaj arboj kolektiĝis, are ariĝis ĉirkaŭ li.

Mateniĝe Dion laŭdanta merlo flugadis super lia kapo per veko-voĉa fajfo, kaj miris la homon revenantan el

László Debreczeni: Tombejo en Kalotaszeg (1928)

sonĝujo. La arboj-vagantoj reiris al siaj propraj lokoj, iliaj piedoj denove enradikiĝis kaj el ĉiuj forflugis la spirito. El la sonĝoreĝo fariĝis refoje kaŝvaganto, sur kies vesto brilis la larmoj de l' ĉielo, kiel surŝutitaj juvelŝtonoj. Kaj la kosto de ĉio ĉi estis la vekiĝo, kiu ĉirkaŭprene portadis la realon kun malgajo.

Post trompiĝoj li lavis la vizaĝon per akvo de la „Viviga-fonto", kiu tie flanke fluetas el-terkore ekde memoreblaj tempoj. Li trapasis la arbaron: dume deĉifris babilon de fervoraj kolomboj, adiaŭis falintajn foliojn kaj nomon donis al arboj. Kiam li vidis, ke la vivuloj de l' arbaro vivas en paco Dio-adora, ĝojo naskiĝis en li: orioloj kun merloj ĝojpepis la saman kanton, agloj gardis amantajn kolombojn, sovaĝkokoj en svarmo portadis kaj distribuis la bonhumoron, gliroj kaj sciuroj kun konsento intervidis grajnojn de fago, avelo.

La suno post nelonge supreniris al la ĉielpinto, malsupren poste ĝi pli rapidis. Arĉjo do iradis plu en la arbaro, kaj je ĉiu alteriĝo de unuopaj folioj lia penso elkore ŝirita forflugis al Elinjo. En ĉiu minuto plimallongiĝis la vojo de pensoj kaj plivastiĝis la rememoro per esperoj, ĉar Elinjo realigis sian adiaŭ-parolon:

— Morgaŭ vespere mi kisos kaj regalos vin ĉe la „Viviga-fonto".

Enmane kun manĝaĵo, enkore kun amo ŝi venis. Maltrankvilo ŝin kondukis kaj angoro akompanis. Inter frondoj la deziroj vet-fluge antaŭenvenis, malantaŭ ili foliarpaŝe iris ilia sendantino. Entuziasm-elane, kun amo-amara de maltrankvilo. Ŝi lokumis la okazon ĝis la animfundo, el kies mezo jam ŝi vidis ridaĉi la morton satanan. Je ĉiu paŝo danĝerkrie trakuris en ŝia varma, juna sango tio, kion ŝi hodiaŭ vidis:

En la vilaĝo ĝendarmoj serĉadis la ordonrompantan Arĉjon Balla. En iliaj manoj estis fusilo, malamiko de l' vivo, en iliaj rigardoj lumis la kvazaŭtombejo de l' indulgo, el ilia buŝo fremda vorto ŝprucis. Ili konfesigis la tutan hejmaron, tamen neniu konis la restadejon de la kaŝvaganto.

La suno jam staris ĉe subiro. La fraŭlo sidis ĉe la fonto, gapante la moviĝon de karasoj, kaj atendante la knabinon, kiu alportos en sia koro la trezoron de la mondo al ili. Kaj jen alvenis la knabino; tie, kien ŝi paŝis, mortantaj folioj kisis ŝian piedon — la kisa klakbruo alkuris la kaŝvaganton. La knabino salutis lin per brakumo, ŝi en kiso kunportis amon de la hejmo, kaj plore interesiĝis pri lia farto.

— Ve, mi havas timon pro vi.

Ŝi ekmemoris la ĝendarmojn, tamen ŝi kaŝis la pensojn, falinte al la kolo de Arĉjo.

— Tage-nokte mi persistos ĉe vi. Mi amos vin kun zorgo, vartado, korinklino ĉagrena, dume vi nur parolu pri tiu vivo, kiu promesis, ke ĝi favoros kaj dorlotos nin.

La suno per sia lasta rigardoĵeto vidis la ĉirkaŭbrakantojn.

El la falintaj arbofolioj Elinjo sternis kuŝejon. Arĉjo ŝin observis per senvorta laŭdo ĵurante al la krepusko, ke surmonde ne ekzistas aliaj homoj, nur ili du.

La folioj flustris molajn vortojn al la teren kliniĝantoj, la birdoj per kanto ornamis ĉiujn arbojn, kaj la silento pliprofundiĝis, ke la himno de amo sonu ankoraŭ pli malproksimen. Kaj alveninte surĉielen jen tiu, jen alia stelo malfermis la okulon kun ĝojo al ili.

Ekis la amo inter ili, sur kiun la forpaso pli dense faligis ĝemvoĉajn foliojn dum la tagiĝo.

Postaŭrore ektimegis la arbaro. Ĝendarmojn ĝi vidis, kiuj marŝis al la fonto, serĉante la viron amantan. Ties unua rigardo postmalferma ĵetiĝis al ili.

— Ho, la Antikristo venigis vin al mi — hurlis Arĉjo —, sed mian vivon mi ne allasos.

Li eksaltis por povi fuĝi, sed la fusilo alridaĉis lin, kaj la morto, la malbeno de la vivo tramuĝis la ĵus vekiĝintan arbaron.

El la hungara: Jozefo *Kiss*



Irén Klossy: Montaro

Esperantaj libroj en Hofburg

Kohlmarkt estas unu el la plej elegantaj stratoj de la interna urbo de Vieno. En ĉiuj sezonoj promenas ĉi tie multaj eksterlandaj turistoj, kiuj poste trapasas la malgrandan placon fine de la strato, kun la celo viziti Hofburgon.

La konstruaĵo, en kiu troviĝas la internacia Esperanto-Muzeo

En tiu ĉi grandega historia konstruaĵo hejmas pluraj muzeoj: la Trezorejo, Etnografia Muzeo kaj la Aŭstra Nacia Biblioteko.

Apud tiuj, en la alo „Michaeltor" de Hofburg, sur la tria etaĝo troviĝas vidindaĵo, kiun konstante vizitas homoj el ĉiuj partoj de la mondo. En tri grandaj ejoj havas sian sidejon ĉi tie la *Internacia Esperanto-Muzeo,* kiu ĵus trapasis la sesdekan datrevenon de sia naskiĝo.

En la jaro 1927, dum la 19a Universala Kongreso en Dancigo (Gdansk) Felikso *Zamenhof* lanĉis la proponon, ke oni kreu Instituton, kiu kolektu kaj ordigu ĉiujn materialojn kaj dokumentojn, ajnmaniere ligiĝantajn al Esperanto.



La Muzeo havas riĉajn materialojn pri la vivo kaj verkaro de Zamenhof

Tiun ĉi Kongreson partoprenis ankaŭ aŭstra fervojisto, Hugo *Steiner.* La ideo tiom ekplaĉis al li, ke, reveninte hejmen, li tuj ekagis por realigi ĝin. Kun la helpo de siaj amikoj-fervojistoj, inter tre malfavoraj kondiĉoj li komencis la laboron.

Post du jaroj, en 1929 la Aŭstra Nacia Biblioteko transprenis la prizorgadon de la unika kolekto, kiu ĝis nun funkcias enkadre de la prestiĝa Biblioteko.

Internacia Esperanto-Muzeo aktuale posedas 23,000 librojn, kaj la tuta materialo konsistas el 100,000 eroj. Ĝi atendas la vizitantojn lunde, merkrede kaj vendrede inter la 9a kaj 15a horoj. La Muzeo aperigas kvaronjaran informilon, kies abonprezo estas 8 internaciaj respond-

La ekspoziciitaj fotoj konservas por ĉiam la etoson de iamaj eventoj

La ekspoziciaĵoj de la tri salonoj donas superrigardon pri la vojo trapasita de Esperanto: oni povas vidi dokumentojn de la komencaj heroaj tempoj, kaj ankaŭ pecojn, kiuj atestas pri la nuntempaj aktivadoj. Kun ĝojo mi revidis tie ankaŭ la librojn, eldonitajn de Hungara Esperanto-Asocio...

Zoltán *Fejér*

En la vitrinoj oni povas vidi librojn, en kiuj enkorpiĝas la Esperanta kulturo

Kun ĝojo oni revidas ankaŭ hungarajn eldonaĵojn

La naciaj flagoj atestas pri tio, ke Esperantujo estas la tuta mondo (Fotoj de Zoltán fehér)

Uralanoj foliumas Hungaran Vivon

Ĉu en Uralo oni konas hungaran vivon? Sendube jes..., se oni legas *Hungaran Vivon*. Kaj tiuj jam ne malmultas, des pli, ke laŭ la populareco kun ĝi povas konkuri eble nur *Juna Amiko* (revueto ne nur porinfana, sed plaĉa ankaŭ al ajnaĝaj novicoj). Plian fojon la fakton konfirmis la legantara konferenco pri Hungara Vivo, okazinta en la finaj libertagoj de februaro kadre de Literatura Semajnfino, organizita en Sverdlovsk de Esperantista Rondo Kulturo.

Du temoj estis prezentitaj en la semajnfino. Kerne: kontribuo de la ruslandaj kaj sovetiaj verkistoj al la Esperanta kulturo. Ĉi-kaze estis speciale invitita la Moskva fakulo pri la Esperanta literaturo B.V. Tokarev, kiu prezentis ciklon de lekcioj pri nialandaj Esperantaj poetoj kaj prozistoj. La interesiĝo pri la kultura historio ĉiam estas akriĝanta ĉe jubileaj sojloj. Kaj krom la Jubileo 100-jara pasis ankaŭ la duona, amara datreveno de la ĉesigo de la frusovetia Esperanto-movado. Dediĉe al tio *Sezonoj* eklanĉis serion de poemaroj de niaj klasikuloj.

La dua temo proponis kulturajn periodaĵojn en Esperanto. Al la partoprenintoj estis prezentitaj la jam legendaj Literatura Mondo, La nica literatura revuo, Norda Prismo, ve, ankaŭ Fonto kaj legendaj nun: Literatura Foiro kaj... Hungara Vivo. Do, pri la lasta oni parolis aparte. Aparte multe kaj aparte dise, ĉar oni bone sciis la objekton de la diskuto. Vere, por sovetiaj esperantistoj ĝi estas la plej amasa kultura revuo, oficiale abonebla kaj sincere ŝatata. Bedaŭrinde nur, ke ĝi en limigita kvanto estas distribuata tra ASE.

Halina Gorecka, nia estimata direktoro de Komuna Esperanta Biblioteko, rakontis pri la historio de la revuo, kiu havas bonajn premisojn en la glora Budapeŝta Skolo kun la respektindaj apostoloj de la Esperanta kulturo, kiaj Baghy, Kalocsay, Tárkony. Ŝi prezentis ankaŭ ĝian fizionomion aŭ vizit-karton. Memorigante pri la iama praktiko de temaj numeroj, kiel ekzemple pri sciencfikcio, hungara revolucio, ŝi ŝatus vidi similaĵojn ankaŭ estonte. Vere, tio postulas skrupulan preparon, sed la gajno estas evidenta: la numero iĝas aparta, homogena verko, kun signifo ne nur kleriga, sed ankaŭ didaktika.

Sed ni foliumu la ordinaran konglomeraĵon de la redaktora fantazio. Unuavice staras kutime materialoj politikaj kaj ekonomiaj. Lastatempe ili iĝis pli abundaj kaj pli sinceraj, problemaj, t.e. montrantaj ne ŝminkitan vizaĝon, sed tordojn de intestaro. Vere. laŭ la aserto de la redaktoro de *Ekzakte* Aleksandr Zagvazdin, la informoj estas ne nur sciigaj, sed ankaŭ pensigaj. La prezidanto de la perma klubo Firdaus Kasimov parolis pri la lando-prezento tra la prismo de Hungara Vivo. Ĉiparte ni povas paroli pri ideala laboro de la redakcio. Ni konatiĝis kun la departementoj de Hungario, ĝia historio, la nuna socia vivo. Eĉ neemuloj legi longajn artikolojn nepre rigardas Panoramon. Oni sufiĉe povas kaj kontentigi scivolon, kaj prepari sin al vojaĝo.

Intertempe ni venis al la originala literaturo – ne malgrava ingredienco de la revuo. Ĉiam tre agrablas la bona kvalito de verkoj, konsiderinda internacieco de la kontribuaĵoj, precipe en la poezia parto. Mi ne dubas, ke debuto sur la paĝoj de Hungara Vivo estas honoro por sovetia esperantisto, ĝi signifas rekonon. Tra Hungara Vivo ni unue konatiĝas kun nomoj vaste konataj en Esperantujo kaj konigas la niajn. Mi perceptas Hungaran Vivon kiel ponton, kulturan perilon inter okcidento kaj orienta. Tio estas fakto, realeco, kiun mi plian fojon atentigas, ke la redakcio konsideru la situacion. Lastatempa publikigo de la laŭreatoj de Belartaj Konkursoj de UEA estas bona paŝo tiu-direkte. Bedaŭrinde nur, ke ne ĉiam eblas identigi landon de aŭtoro, aĝon. Mi pensas, ke tiaj indikoj ne malhelpus, ja la revuo estas populara, ne elita. Por ordinara leganto la buntaj nomoj, ekzemple de la poezia paĝo, parolas ne multon, malgajnas je la impreso de internacieco de nia literaturo. Kion do pri la paĝo por komencantoj? Ĉu vere ĝi estas necesa? Pli nature legi Junan Amikon, ol bagatelaĵojn en respektinda revuo. Kaj tiuj daŭrigendaĵoj edukas nur grafomanion. Alia afero estas „ekzameno sen risko" – ĝi almenaŭ instigas legi veran literaturon.

Se paroli pri la hungara literaturo, mi ne certas, ke oni regule legus tiun. Mi pensas, ke por atentigi leganton necesas kurte karakterizi aŭtoron, lian stilon, temaron. Ne indas ignori ankaŭ tian allogon, kiel ilustraĵoj. Tamen ne tro da pesimismo: agrabla fakto de interesiĝo pri la hungara literaturo iĝis la aperigo de la novelo de György Moldova „Arrivederci, Budapest!" en la sovetia popularscienca revuo „Znanije – sila" (La scio estas forto) N2'88, tradukita el la Esperanta versio en Hungara Vivo N4'82. Ŝajne la unuan fojon Esperanto servis ponte inter la hungara kaj la rusa. La temo – burokratio – estas aktuala en la socialismaj landoj, des pli, kadre de la *perestrojko*. Rimar-

La prezidanto de la instru-metodika komisiono de ASE B.V. Tokarev kaj ĉefredaktoro de Sezonoj A.V. Korĵenkov (dekstre) pridiskutas Hungaran Vivon. (Sed ĉu numeron de antaŭ 20 jaroj? Ja Korĵenkov tenas en la mano iun el la numeroj inter 1961 kaj 1968... La poŝto al Uralo ŝajne funkcias malrapide...)

kinde, ke en Hungara Vivo la rakonto aperis ses jarojn pli frue.

Sed jen ni lamas al la fino... Ĉu ne lacige? Kaj iom bizare emerĝas la nekompreneblaj teknologiaj artikoloj. Tamen ni komprenas kaj toleras ilin, kiel neeviteblan malbonon, nutrantan finance.

Recenzo. Literatura kritiko estas ĉevaleto de nia ĉefredaktoro de *Sezonoj* Aleksander Korĵenkov. Li sekcis la Esperantan recenzo-arton per algebro kaj trovis... nulon da kritiko. Vere, multaj recenzoj aspektas reklame. Tamen li esperigis, ke la partopreno de uralanoj eble vigligos la rubrikon. Kaj efektive, la unua eĥo jam aperis – vd. HV N1'88.

Nu, sufiĉas da doktaj rezonoj. Fine ni meritis ioman amuziĝon. Siajn pensojn pri *Gaja Paĝo* Viktoro Kudrjavcev prefacis per teoriuma listigo de anekdot-temoj. El alilandaj unue venas en memoron la ŝparemaj gabrovanoj. El niaj – serioj pri simpluloj (kutime tradiciaj roluloj), trafantaj en ridindajn situaciojn, pri ĉiam mon- kaj manĝmankaj studentoj, pri tipaj trajtoj, moroj, kutimoj de diversaj nacioj (en- kaj eksterlandaj), pri civilizitaj usonaj spionoj, trafantajn en idiotajn kaĉojn pro la malscio de la sovetia vivmaniero, pri drinkado kaj kokroj, finfine „abstraktaj" (absurdaj) anekdotoj kaj kio ankoraŭ – scias nur la redakciano de la revuo „Ural", urala verkisto Feliks Vibe, kiu preparas por eldono sian riĉan kolekton da uralaj anekdotoj. Do, uralanoj povas uzi ĝin por esperantigo. Tamen kion proponas al ni GaPo por gapi? Oni povas senhezite aserti, ke la enhavo estas ĉiam in-hava. La inspiro de la redaktoro de la paĝo ŝajne in-finite fiksitas al la sola temo: jen li observigas la leganton pri in-formoj, in-klinoj, in-sidoj, jen peras in-citojn kaj in-aŭgurojn, jen montras in-signojn aŭ in-dignon. Neelĉerpeblega fantazio! Ĉu baze de la in-trospekto? Ĉu specifo de la hungara humuro? Ajnakaze majoritato mienis degnan rideton, esprimante riproĉon pro la troa in-vesto de la paĝo. Sed eble tio ne mavas? Finfine la paĝo havas propran vizaĝon, kaj alkutimiĝinta leganto agordas sin konforme.

Nu, eblas fermi la numeron, kaj ĉu aŭ ne estos niaj vortoj utilaj, la solan mi ŝatus deziri al la redakcio konklude: ke Hungara Vivo ne frustrigu niajn esperojn!

Protokolis kaj interpretis:
Nikolaj *Lozgaĉev*

Julian Modest

Ĥta ŝerco

Friskis la oktobra mateno. Fred vekiĝis kun la sento, ke li sonĝis belegan sonĝon, sed li tute ne memoris ĝin. Iom da tempo senmova li restis en la lito. Inter la du kurtenoj de la fenestro singarde enŝteliĝis en la ĉambron soleca sunradio, kaj ĝi lumigis la bildon sur la kontraŭa muro. Estis akvarela pentraĵo, kiu prezentis unu el la malnovaj stretaj stratoj de la urbo. La pentristo sukcesis fiksi la efemeran momenton inter la tago kaj la nokto, kaj nun el la bildo radiis la violkolora laceco de la tago kaj la blua jubilo de la alvenanta nokto.

Fred leviĝis, malfermis la fenestron kaj profunde enspiris la friskan aeron. Sur la fenestrojn de la kontraŭaj domoj la matena suno lude gluis grandegajn kuprajn monerojn. La tago promesis esti bela kaj Fred denove rememoris la multajn farendaĵojn, kiuj atendis lin hodiaŭ. Rapide li banis sin, vestiĝis kaj eliris.

La griza konstruaĵo de la urba tribunalo ne estis malproksime, sed antaŭ la giĉeto por ricevo de la verdiktoj tumultis homoj, kaj almenaŭ duonhoron Fred devis atendi. Fin-fine li ekstaris antaŭ la eta fenestro.

– Bonvolu, sinjoro...? – demandis la metala voĉo de la oficistino.

Fred klarigis afable kaj koncize:

– La 20-an de majo ĉijare mi eksedziĝis kaj mi ŝatus ricevi la verdikton pri la divorco.

– Via nomo?

– Fred Long – respondis Fred soldatece.

– Kiu juĝisto eldiris la verdikton?

– Sabina Blunderbuz.

– Momenton.

La oficistino prenis la glason da kafo, kiun ŝi estis trinkanta, kaj malaperis ien. Fred postrigardis ŝin. Ne pli ol dudekjara, ŝi estis nigrahara, svelta kun gracia irmaniero.

Pasis dek minutoj, poste ankoraŭ dek, sed la nigraharulino ne revenis.

„Eble ŝi iris ien pli trankvile eltrinki la kafon" – meditis Fred, strebante ofte-oftege sian brakhorloĝon.

Fin-fine la oficistino aperis kaj ŝajne iom kolere ŝi sciigis:

– Ne estas verdikto.

– Sed...

– Bonvolu veni post semajno – ordonis ŝia metala voĉo.

– Tamen, jam duafoje mi venas...

– Mi jam diris – kaj ŝi turnis sin al la sekva atendanto ĉe la giĉeto. – Bonvolu, la sinjoro!

Minuton Fred staris senmova. Antaŭ monato oni diris, ke pro la somerferioj, li venu por la verdikto en la komenco de oktobro. Hodiaŭ estis la kvina de oktobro, verŝajne laŭ iuj la monato ankoraŭ ne komenciĝis. Aliaj farendaĵoj atendis Fredon hodiaŭ kaj kure li forlasis la tribunalon.

Nerimarkeble pasis la semajno. Lunde matene Fred denove ekstaris ĉe la longa vico antaŭ la giĉeto de la nigrahara oficistino. Eble ŝi ekkonis lin, ĉar ŝajne ŝi apenaŭ ridetis, denove iom metale prononcis „momenton" kaj malaperis. Ĉifoje Fred atendis nur dek minutojn. La belulino rapide revenis kaj afable diris:

– Ne estas verdikto.

– Sed kiel eblas? – konsterniĝis Fred.

– Mi ne scias – ŝi ridetis.

– Tamen, ĉu mi venu denove? – li demandis embarasite.

– Se Vi deziras...

Ĉi lakonaj kaj nebulaj respondoj tute konfuzis Fredon.

– Sed mi petas Vin, bonvolu klarigi, kvarafoje mi jam venas...

– Sinjoro, verdikto ne estas. Laŭ la dokumentoj sinjorino Blunderbuz ne gvidis divorcoproceson la 20-an de majo ĉijare.

Tio sonis kiel malbona ŝerco, kiu stuporigis Fredon.

– Sed kiel eblas? Kion mi faru?

– Mi ne scias – kare respondis la junulino kaj turnis sin al la sekva atendanto ĉe la giĉeto.

La giĉeto antaŭ Fred komencis lante balanciiĝi, sed li provis trankvile restarigi ĉiujn pli gravajn momentojn el sia vivo dum la lastaj kelkaj monatoj. Unue kun Emilia ne eblis plu kunvivi. Jam en la komenco de ilia familia vivo ŝi estis kolerema kaj kaprica, sed dum la lastaj jaroj Fred malfacile eltenis ŝin. La familiaj skandaloj iĝis tiel oftaj, ke li preferis posttagmeze plu resti en la oficejo ol ĝustatempe reveni hejmen. Eble unu el la kialoj de la nervozeco de Emilia estis, ke ili ne havis infanon, sed fin-fine Fred decidis forlasi tiun familian inferon kaj tute sincere li diris al Emilia, ke li deziras divorci. Emilia kuraĝe akceptis la sciigon, kvazaŭ delonge ŝi atendus ĝin. Ili kune aranĝis la formalaĵojn kaj la 20-an de majo, en sufiĉe solena etoso, la juĝistino Sabina Blunderbuz eldiris la verdikton, kiu ĉesigis la kvinjaran familian vivon de Fred kaj Emilia.

Do, la divorco estas fakto kaj ĝin povis pruvi ne nur la juĝistino Sabina Blunderbuz, sed same la du advokatoj; tiu de Fred kaj tiu de Emilia, kaj kompreneble Emilia mem.

Iom da tempo Fred meditis kion entrepreni, ĉu unue serĉi sinjorinon Blunderbuz aŭ sian advokaton Klod Ezok. Pro la fakto, ke li troviĝis ankoraŭ en la tribunalo, li ekiris serĉi la juĝistinon, sed bedaŭrinde nenie li trovis ŝin. Evidente la morgaŭan tagon li denove devos viziti tiun ĉi grizan respektindan konstruaĵon.

En la komerca kontoro, kie Fred laboris, li ne ĉesis mediti pri la verdikto, kiu senspure malaperis. Vere Fred ne tre bezonis ĝin, sed jam duonjaron li ne vivis kun Emilia kaj li devis havi iun dokumenton, ke li ne plu estas ŝia edzo kaj ŝi ne plu havas familiajn pretendojn al li.

Post la fino de la laboro Fred ekiris al la urba teatro, kie ĉivespere li kun Marianna spektos la dramon „D-ro Braun vivas en ni" de Julian Modest.

La oktobra posttagmezo sunis, varmetis, la stratoj silentis kaj Fred nevole rememoris la trankvilan violkoloran lacecon, kiu radiis el la akvarela pentraĵo en lia fraŭla ĉambro.

En la parko, antaŭ la teatro, Marianna jam atendis lin. Ne tre alta, svelta, vestita en nova tegolkolora mantelo, ŝi similis al sciureto, kiu haltis por momento sub la altaj kaŝtanujoj.

Fred memoris bone la tagon, antaŭ kelkaj monatoj, kiam li renkontis ŝin. Tio okazis eble du semajnojn post la divorco. Iam li kun Marianna laboris kune, tamen delonge Marianna forlasis la kontoron, kaj kiam Fred renkontis ŝin hazarde sur la strato, li preskaŭ ne ekkonis ŝin. Post la ordinaraj salutvortoj li intencis adiaŭi ŝin, sed subite lin haltigis la petolaj briloj en ŝiaj avelaj okuleto kaj Fred mem ne komprenis kiel, li invitis Mariannan en la plej proksiman kafejon. Tiel komenciĝis liaj oftaj rendevuoj kun Marianna, kiu same delonge estis eksedziĝinta.

En la obskura teatra salono Fred denove rememoris la malbenitan verdikton, sed li provis rapide forpeli ĉi penson, kiu simile al globa fulmo ŝvebis jam ĉirkaŭ lia kapo kaj minacis lin per subita ektondro.

Post la spektaklo Marianna kare subbrakis Fredon kaj en la friska vespero ili ekrapidis al lia loĝejo. Dumvoje, babilante pri la dramo, kelkfoje Fred demandis sin ĉu li diru al Marianna

pri la verdikto, sed fin-fine li decidis, ke tio ne tiom gravas kaj morgaŭ li renkontos la juĝistinon, kiu certe enmanigos al li la verdikton.

Lia eta fraŭla ĉambro brakumis ilin varme kaj trankvile, kaj denove Fred eksentis la senliman ĝojon reveni hejmen kun amata virino. Ie malproksime, en la pasinteco, restis la skandaloj kun Emilia, ŝia grumblemo kaj eterna malkontentemo pri ĉio. Obsedita de la sentoj Fred ĉirkaŭbrakis Mariannan kaj demetis tenere ŝian novan tegolkoloran mantelon. La „sciureto" alpremis sin fideme al lia brusto.

Ŝajne ĉivespere pli varmis ŝiaj kisoj kaj pli molis ŝiaj polmoj, kiuj karesis lante, longe liajn vangojn, ŝultrojn, brakojn. Ŝiaj haroj ravodoris junipere kaj Fred deziris kredi, ke lia vivo komenciĝas nun, ke ĉio, kion li travis okazis al iu alia, kiun Fred nur supraĵe konis. Senvoĉe li ripetis „Marianna" kaj la melodio de la nomo versis en lian korpon kontentecon kaj trankvilon. Ĉimomente la vivo estis tiel simpla, ke Fred entute ne komprenis kial necesas juĝprocesoj kaj verdiktoj, ja la amo nek edziĝas, nek divorcas. Neniam li povis plu imagi sin en la ĉirkaŭbrakoj de Emilia kaj eĉ ne komprenis kiel dum tiom da jaroj li kisis kaj karesis ŝin.

En la obskuro Fred longe restis kun fermitaj okuloj kaj jam la dormo lulkaresis lin, kiam la flustra voĉo de Marianna revenigis lin el la fora lando de nirvano.

– Kiam ni geedziĝos? – la demando eksonis tiel simple kaj nature, ke en la mallumo Fred nevole ekridetis.

Ja, kelkfoje li mem sin demandis, sed ne eldiris voĉe ĉi demandon, ĉar atendis, ke Marianna same aludu pri tio.

– Baldaŭ – li flustris kaj kisis ŝian glatan ŝultron por pruvi, ke eĉ nun li pretas fari tion, sed ŝajne Marianna ne tiel komprenis la kison, ĉar ŝi denove pli flustre, sed pli akcentite ripetis la demandon:

– Tamen, kiam?

Nun Fred reagis ŝerce kaj respondis:

– Morgaŭ.

– Morgaŭ eble ne, sed ĝis la fino de la monato – nepre! – serioze rimarkis Marianna, jam ne flustre.

– Kial tiel urĝe? – ne komprenis Fred.

– Mi estas graveda kaj eble la trian monaton.

– Bonege – preskaŭ ekkriis ĝoje Fred. – Morgaŭ ni priparolos la detalojn...

Sed subite li rememoris la verdikton kaj la fakton, ke laŭ la oficialaj dokumentoj, laŭ la persona legitimilo, li ankoraŭ estas edzo de Emilia, kaj li ne rajtos denove edziĝi, se li ne havos iun dokumenton pri la eksedziĝo.

Iel hezite Fred komencis klarigi al Marianna tion, sed versajne ŝi ne komprenis bone pri kio ĝuste temas, ĉar abrupte ŝi ĵetis la dormokovrilon, ekstaris kaj lumigis la ĉambron, por ke eble pli bone ŝi vidu lin.

– Bonege! – diris Marianna kaj ŝiaj avelaj okuletoj fulme ekbriletis. – Bonege vi elpensis ĉion, sed kial – mi tute ne komprenas?

Fred provis diri ion, tamen ŝi ne lasis lin eĉ sonon eligi.

– Kaj kial vi mensogis, ke vi divorcis, ke vi deziras denove edziĝi kaj tiel plu? Ni povis simple kaj laŭ nuntempa maniero solvi la problemon.

– Sed Marianna...

– Jes, jes, mi komprenas, vi amas min, sed bedaŭrinde vi ne povas eksedziĝi. Vidu, kara Fred, mi same amas vin, tamen ni ne devus komplikigi nian vivon, ĉu ne?

Haste ŝi komencis vestiĝi. Fred senmove restis en la lito kun la turmenta kaj altruda penso, ke tiu globa fulmo, kiu jam de semajno ŝvebis ĉirkaŭ lia kapo, ektondris en la plej bela momento. Kaj nun lastfoje li vidas la facilmovan nudan korpon de Marianna, ŝiajn glatajn femurojn, mamojn, similajn al du aromaj persikoj, ŝiajn ŝultrojn sur kiujn falas la juniperodoraj haroj kaj ŝian etan ventron en kiu eble nun kuŝas io el li mem, pri kio li revis dum kvin longaj jaroj, dum la kunvivado kun Emilia.

– Marianna, restu, mi klarigos ĉion – vespiris Fred.

Sed ŝi jam surmetis la tegolkoloran mantelon, kiu hodiaŭ tiel ekplaĉis al li, kaj en kiu tiel ŝi similis al fidema sciureto, kaj kun glacia ironio ŝi fiksrigardis lin.

– Ne, Fred, nur tiam, kiam vi ricevos la verdikton – ŝi emfazis la vorton „verdikto", eble por aludi, ke neniam estis kaj estos verdikto, ĉar versajne neniam li intencis eksedziĝi.

La pordo, malantaŭ ŝi, forte brufermiĝis, kaj tuj en la ĉambro fariĝis tia silento, kvazaŭ Fred subite trovus sin sur la oceana fundo. Ne! Li ne povis ŝin kulpigi. Marianna pravis. Ŝi estis graveda, li mem deziris havi infanon, sed kiel li edziĝu se laŭ la dokumentoj li ankoraŭ ne eksedziĝis.

Tutan nokton Fred ne dormis. Matene laca, kun nigraj ombroj ĉirkaŭ la okuloj, li ektrenis sin al la tribunalo.

Sabina Blunderbuz estis en sia kabineto, kaj tio iom trankviligis lin.

– Kion vi deziras, sinjoro? – rigore alrigardis lin la juĝistino tra siaj okulvitroj.

Fred detale klarigis ĉion, rakontis pri siaj kelkfojaj vizitoj en la juĝejan administracion kaj finis per la vortoj:

– La oficistino supozas, ke Vi ankoraŭ ne subskribis la verdikton kaj ne sendis ĝin en la administrejon.

Tiuj vortoj kvazaŭ pikus sinjorinon Blunderbuz, ĉar ŝi preskaŭ eksaltis de la seĝo.

– Ĉu mi ne sendis la verdikton en la administrejon? Estimata sinjoro, Vi devas scii, ke tuj post la fino de ĉiu proceso, mi propramane subskribas la verdikton kaj senprokraste sendas ĝin en la administrejon.

– Tamen, sinjorino Blunderbuz, asertas tion ne mi, sed la oficistino de la administracio – provis senkulpigi sin Fred.

– Jes, perfekte mi scias. Tiuj pigrulinoj tie nur kulpigas la aliajn. Tamen bonege mi memoras Vian divorcoproceson – demone kaj minace ridetis sinjorino Blunderbuz.

– Ĝuste pri tio temas – ekĝojis Fred.

– Jes! nenion mi forgesas! Detale mi memoras eĉ procesojn, kiujn mi traktis antaŭ dudek jaroj! Via divorcoproceso okazis la 20-an de majo ĉijare, ĉu ne?

– Jes, vere! – miris Fred.

– Dum la proceso Vi surhavis malhelbluan kostumon, blankan ĉemizon kaj ĉerizkoloran kravaton, ĉu ne?

– Jes, ĝuste! Vi absolute pravas.

– Jen, kaj tiuj el la administrejo konstante klaĉas, ke mi jam maljunas, ke nenion mi memoras – triumfe konkludis sinjorino Blunderbuz.

– Ne! Neniu diris tion.

– Mi petas Vin. Bonege mi scias kion ili klaĉas malantaŭ mia dorso!

Evidente sinjorino Blunderbuz emociiĝis, ĉar kiel pilko ŝi saltis de la seĝo kaj komencis energie promeni antaŭ sia granda skribotablo. Kvindekjara, ne tre alta, sed masiva, ŝi similis al ŝtona kubo. Ŝia griza hararo minace superstaris kiel erinacpikiloj. Malantaŭ la okulvitroj brilis ŝiaj grajlaj okuletoj.

– Tamen kiamaniere mi ricevos la verdikton? Ĉu Vi ne povas doni al mi kopion de la verdikto? Certe ĉe Vi troviĝas la dokumentaro de la divorcoproceso – hezite demandis Fred.

– Kion Vi opinias? Se tiuj pigrulinoj el la administrejo ne laboras, ĉu mi sencese donu cent verdiktojn pri unu sama divorcproceso?

– Sed bonvolu kompreni min – Fred preskaŭ ekĝemis. – Mi devas nepre ricevi tiun ĉi verdikton.

– Kompreneble. Vi iros en la administrejon kaj Vi diros, ke nepre oni trovu kaj donu al Vi la verdikton.

Sinjorino Blunderbuz denove eksidis ĉe la skribotablo kaj tiamaniere ŝi sufiĉe klare montris al Fred, ke por ŝi la konversacio finiĝis.

Fred apenaŭ eligis „ĝis revido" kaj forlasis la masivan kabineton de Blunderbuz.

En la administracio la nigraharulino estis senkompromisa. Tuj, kiam ŝi rimarkis Fredon, kiel difektita gramofono ŝi komencis ripeti unu saman frazon:

– Ĉu Vi ne komprenis, ke ĉi tie ne troviĝas la verdikto de Via divorcoproceso, kaj kiel Vi petas kopion se eĉ la originalo ne estas ĉi tie. Ĉu Vi ne diris al tiu stultulino Blunderbuz, ke ŝi konstante forgesas sendi en la administrejon la dokumentarojn de la juĝprocesoj kaj la verdiktojn.

Fred vere jam ne sciis kion fari. La sola ebleco restis konsulti sian advokaton Klod Ezok. Verŝajne nur la advokato povos trovi eliron el tiu ĉi konfuza situacio. La kabineto de Ezok troviĝis proksime al la tribunalo kaj Fred ekiris tien.

– Ho, kara sinjoro Long, mi tre ĝojas vidi Vin denove. Bonvolu sidiĝi kaj rakonti kio gvidas Vin al mi?

Fred sidis en la fotelon, antaŭ la skribotablo de Ezok, kaj kelkajn minutojn ne sciis de kie komenci la rakonton pri ĉi komplika kaj malklara historio.

Kontraŭ li la advokato kuraĝige ridetis. Antaŭ ses monatoj, kiam Fred ofte-oftege vizitis la kabineton de Ezok, ŝajnis al li, ke Ezok estas la sola homo en la mondo, kiu ne havas problemojn aŭ pli ĝuste kiu kapablas rapide kaj bonege solvi ĉiujn problemojn. Neniam Fred vidis Ezokon malafabla aŭ kolera. La advokato ĉiam estis bonhumora kaj lia brila rideto montris blankajn fortajn dentojn, similajn al porcelanaj bidoj. Liaj lipharoj kiel du nigraj mincaj penikoj estis ĉiam zorge tonditaj.

Ankaŭ nun Ezok surhavis elegantan ĉokoladkoloran kostumon, veŝton el kies eta poŝo pendis ora horloĝkordono. Inter liaj montrofingro kaj mezfingro fumis cigaro, kies agrabla aromo iom narkotis Fredon.

– He, kara amiko, kio gvidas Vin al mi – senpacience ripetis Ezok kaj liaj nigraj musaj okuletoj scivole fiksrigardis Fredon.

Malorde Fred komencis rakonti siajn lastsemajnajn travivaĵojn en la tribunalo.

– Hm, – prononcis Ezok, plezurfumante la cigaron – la problemo vere komplikas.

– Sed kion oni povas fari, ja ne mi kulpas, ke la verdikto kaj la tuta dokumentaro pri la divorcoproceso malaperis – levis la ŝultrojn Fred.

– Vi eraras, kara sinjoro Long, ni ĉiuj ĉiam estas potencialaj kulpuloj – filozofie kaj profundsence rimarkis Ezok. – El sia vidpunkto ĉiu absolute pravas, sed antaŭ la leĝo ni ĉiuj egalas!

Ezok apogis dorson al la alta seĝapogilo kaj atente fiksrigardis iun nevideblan punkton sur la plafono. En la kabineto estiĝis silento. Nur aŭdeblis la incita zumado de muŝo, kiu baraktis inter la du fenestraj vitroj, serĉante vane elirvojon.

Post tri minutoj la advokato elblovis lante la bluecan fumon de la cigaro kaj aferece ekparolis:

– Do, mankas ne nur la verdikto, sed la tuta divorcoprocesa dokumentaro. El tio jure sekvas, ke estas nenia dokumento, kiu pruvu, ke Vi fakte eksedziĝis – li akuze direktis sian longan montrofingron al Fred, kaj Fred eksentis malvarman ŝviton sur sia dorso.

– Sed Vi estas atestanto kaj pruvanto, ke mi vere eksedziĝis – provis senkulpigi sin Fred.

– Tamen sen iu ajn dokumento kiamaniere mi pruvu tion? – demandis severe Ezok, emfazante la vorton „dokumento".

Fred gapis lin stupore.

– Do, Vi komprenas, kara Long, en la justico la honesta parolo ne sufiĉas. Necesas dokumentoj! – kaj frapante la skribotablon per sia dekstra polmo Ezok aldonis: – Kaj ni prezentos tiujn dokumentojn!

La okuloj de Fred esperplene ekbrilis. Ne hazarde oni konsideris Ezokon unu el la plej lertaj advokatoj, kaj onidire ĝis nun li ne havis malsukcesan juĝproceson.

– Kiel? – demandis Fred senpacience.

– Ni denove komencos divorcoproceson kaj ni gajnos ĝin! - triumfe konkludis Ezok.

– Ĉu eblas tio...? – komencis balbuti Fred.

– Kompreneble! Por sperta advokato ĉio eblas, kara Long – aplombe trankviligis lin Ezok.

– Se mi bone komprenis Vin, ni devas komenci ĉion denove...

– Ĝuste, kaj ni brile sukcesos! Kredu al mi, amiko!

Fred ne tute certis kiu ĉimomente malbone fartis; ĉu li aŭ Ezok?

– Eble mi devas sciigi mian eksedzinon, pardonu, mian nunan edzinon, ke ni ankoraŭ ne divorcis, kaj ni denove devas doni oficialajn petojn por eksedziĝo.

– Kompreneble!

Fred moroze alrigardis Ezokon, sed la advokato estis kategoria. Kiel en koŝmara sonĝo Fred ekstaris. En lia konscio kaose aperis apartaj vortoj kiel „Emilia", „Marianna", „graveda", „infano" kaj li ne sciis pri kiu el ili unue li pensu. Simile al somnambulo li paŝis al la pordo, sed li rimarkis, ke Ezok strange observas lin. Subite Fred rememoris, ke li ne pagis la konsulton.

– Mi petas pardonon, sinjoro Ezok, sed mi preskaŭ forgesis pagi al Vi – senkulpigis sin Fred kaj elprenis la monujon.

– Ne gravas, ne gravas, ni estas malnovaj amikoj kaj evidente estonte pli ofte ni renkontiĝos.

– Jes, jes – balbutis Fred kaj foriris.

Sur la strato li staris senpova kaj senhelpa kiel kvarjara knabo, kiu perdis siajn gepatrojn en grandega metropolo kaj ne povas reveni hejmen. Nun li devis viziti Emilian, sed la penso pri ŝi igis lin konvulsie ektremi. Emilian li ne vidis dum pli ol duonjaro, kaj tute li ne emis renkonti ŝin, sed alia solvo ne estis. Leĝe ili ankoraŭ estis geedzoj kaj se li volas edzinigi Mariannan, li devos unue eksedziĝi, kiel eble pli rapide, ĉar la infano ne atendos.

En la kontoro dum la tuta tago Fred havis la inkuban senton, ke hazarde li eniris frenezulejon el kiu ne eblas eskapi. Centfoje li ripetis al si mem, ke la 20-an de majo ĉijare li oficiale kaj leĝe divorcis kaj centfoje li ne komprenis, ke leĝe tamen li ankoraŭ estas edzo. Estis io, kio troviĝis ekster la sfero de lia logiko kaj neniamaniere li povis percepti ĝin, malgraŭ ke tre bone li konsciis, ke ĉio tiel klaras, kaj nur necesas normale percepti ĝin kaj alkutimiĝi al ĝi.

Vespere, kiel ebriulo Fred staris antaŭ la pordo de la domo, en kiu kvin jarojn li loĝis kun Emilia. Eĉ la akra sono de la sonorilo ne povis konsciigi lin. Nur daŭre li sentis, ke la planko sub liaj piedoj jam de horoj balanciĝas.

La pordon malfermis Emilia mem kaj iom konsternite ŝi strabis lin. Eble ŝi ne intencis inviti Fredon en la loĝejon, sed senvorte li transpaŝis la sojlon kaj direktis sin al la gastĉambro. Enirinte la ĉambron li tuj sidis en la plej proksiman fotelon, sen demeti la pluvmantelon kaj ĉapelon.

Emilia staris kontraŭ li demandsilente kiel rigora ŝtona monumento. Iamaniere Fred devis klarigi kial li venis, sed li ne sciis kiel. Finfine profunde li enspiris kaj pene ekparolis.

Unue Emilia aŭskultis lin arogantsilente, simile al tigrino, kiu tuj saltos kaj diskarnigos lin per siaj longaj skarlatruĝaj ungoj. Nun ĉio en ŝi aspektis nekonata kaj timigis lin. Nekonataj estis ŝiaj pajlokoloraj haroj, hirtaj kiel dorna arbustaro, ŝiaj venenverdaj okuloj, suspekteme kaj pikeme observantaj lin, nekonata estis eĉ ŝia longa ruĝa hejmrobo, kiun li mem donacis al ŝi, okaze de ŝia naskiĝtaga festo antaŭ du jaroj. Ĉimomente Fred ne povis imagi, ke antaŭ nur duonjaro tiu ĉi

nekonata virino estis lia edzino; tamen ne estis, sed daŭre estas lia edzino.

Fred parolis kaj konsternite rimarkis kiel rapide ŝanĝiĝas la rigardesprimo de Emilia. Unue ŝiaj okuloj orgojle brilis, poste nekomprenebla miro enŝteliĝis en ilin, evidente Emilia komencis pensi, ke Fred grave malsaniĝis kaj nun li fantazias historiojn en kiuj mankas iu ajn logiko. Post kelkaj minutoj eble Emilia jam tute certis, ke Fred malbone fartas, ĉar ŝi triumfe kaj profete diris:

– Jes, mi sciis, ke vi revenos, ke vi pentos kaj petos min, ke ni denove geedziĝu.

– Ne, ni devas denove divorci, ĉar perdiĝis la dokumentoj de la divorcoproceso – korektis ŝin Fred.

Eble finfine Emilia komprenis pri kio ĝuste temas, ĉar ŝi eksaltis kaj el ŝiaj okuloj ekflajreris fulmoj.

– Kion vi opinias? – ŝi komencis krii. – Ĉu tio estas cirko? Ĉu mi devas centfoje divorci?

– Tamen... – provis klarigi Fred.

– Tamen ne mi deziris divorci, sed vi, kaj nun nenio plu interesas min. Faru kion vi deziras. Mi ne intencas denove edziniĝi, kaj se vi deziras ludi kun mi kiel kun simio – vi profunde eraras! Ĉu vi komprenis?!

Ŝtonstarante ŝi nur okule montris la pordon, kaj Fred ne havis alian eblecon, krom stariĝi kaj direkti sin al la pordo.

Ekstere malvarmis. Alte en la ĉielo glacie rikanis la steloj, kaj ŝajnis al Fred, ke dum la lastaj semajnoj li tute perdis sian realan imagon pri la mondo kaj pri ĉio, kio lin ĉirkaŭas. Se iu nun dirus al li, ke steloj ne ekzistas kaj ili estas nur produkto de la homa imago kaj fantazio, Fred pretus tuj ekkredi al li. Same li jam dubis pri si mem, ĉu li vere ekzistas kaj ĉu ĉio okazis ĝuste kun li.

Du semajnojn Fred ne kuraĝis telefoni al Marianna, tamen sabate vespere iu sonorigis ĉe lia loĝejo, kaj kiam Fred malfermis la pordon, li preskaŭ svenis pro la surprizo – ĉe la sojlo staris Marianna.

Kelkajn minutojn ili senvorte observis unu la alian. Poste Marianna trankvile eniris la loĝejon, demetis sian tegolkoloran mantelon, ĵetis ĝin sur la kanapon, oportune sidis en la fotelon kaj bruligis cigaredon. Fred rigardis ŝin, kvazaŭ neniam en sia vivo li vidus ŝin.

– Eble mi ege timigis vin, Fred, ĉu ne? – kare demandis Marianna.

– Kial? – balbutis Fred.

– Ja, jam du semajnojn vi ne telefonis al mi.

– Jes, jes – kulpkonfuze konsentis Fred.

– Ĉu vi ricevis la verdikton? – ekridetis Marianna.

– Vi eĉ ne povas imagi la burokration...

– Jes, jes, lastatempe ni ĉiuj senkulpigas nin per la burokratio. Ĝi sola estas nevidebla, nepalpebla, sed ĉiopova. Eble la burokratio kulpas pri nia infano, ĉu ne?

– Sed Marianna... – elspiris Fred kaj provis ĉirkaŭbraki ŝin, tamen delikate ŝi puŝis lin.

– Ne estu sentimentala, Fred. Fakte mi venis trankviligi vin. Ĉio estis eta ŝerco. Mi neniam gravedis kaj vi trankvile povas daŭrigi vian duoblan vivon, tamen ne plu kun mi!

Marianna ekstaris, surmetis la mantelon kaj foriris. Fred restis en la mezo de la ĉambro.

– Ĉio estis eta ŝerco – li ripetis malrapide. – Ĉu same la vivo, kiun ni vivas?

Sofio, la 4-an de novembro 1987.



Judit Káldi: Steloj

Sándor Pugor: Ilustraĵo

Finna gasto

Komence de junio vizitis Budapeŝton Mauno *Koivisto,* prezidanto de Finnlando. La tre bonaj hungaraj-finnaj interrilatoj jam de longa tempo inkluzivas reciprokajn vizitojn de altrangaj politikistoj, tial tiu ĉi novaĵo — fakte ne estas novaĵo. Tamen, la bonaj rilatoj kun niaj lingvo-fratoj estas tiel gravaj kaj ĝojindaj por ĉiuj hungaroj, ke la alveno de altranga finna gasto en Hungario malgraŭ la kutimeco ĉiam estas por ni — evento. Sur la foto: Mauno Koivisto (la dua de maldekstre) promenas en la ĉefa komerca strato de la hungara ĉefurbo.

Gandhi plantas arbon

La hinda ĉefministro, Raĝiv *Gandhi* estas malpli ofta, sed ne malpli ŝatata gasto en Budapeŝto. Okaze de lia junia vizito en Hungario parto de la Budapeŝta Danuba bordo estis nomita pri la granda hinda politikisto *Nehru*. En la inaŭguro, kiun partoprenis multaj elstaraj gvidantoj de la hungara politika kaj kultura vivo, la hinda ĉefministro plantis arbon.

Sur nia foto: la solena momento.

Civitana protesto

La 27-an de majo en Budapeŝto ĉ. dumil homoj demonstraciis antaŭ la ambasadejo de Aŭstrio, protestante pro la aŭstra partopreno en la konstruado de Danuba hidrocentralo. La hidrocentralo, kiu cetere konstruiĝas laŭ hungara ĉeĥoslovaka interkonsento, grave damaĝos la naturon – asertas pluraj ekologiaj movadoj. La gvidantoj de la demonstracio rakontis al la ĉeestantaj ĵurnalistoj, ke la protesto estas adresata ankaŭ al la ĉeĥoslovaka kaj hungara registaroj, kiu lasta en la nuna ekonomia stato de Hungario ne devus elspezi plurajn dekmiliardojn da forintoj por naturdamaĝaj, dubvaloraj celoj.

Milicianoj kunsidis

La 11-an de junio en Budapeŝto kunsidis la reprezentantoj de la Laborista Milicio. La membroj de la armita laborista organo – fondita en la jaro 1957 –, pritraktis en la kunveno la specifajn taskojn, kiuj sekvas por la Milicio el la rezolucio de la partia konferenco, okazinta fine de majo.

La kunsidon partoprenis ankaŭ János *Lukács*, sekretario de la CK de la partio.

MERKATADO EN HUNGARIO
DE PRODUKTAĴOJ,
TEKNOLOGIOJ,
ENTREPRENADOJ EN LA
KONSTRUINDUSTRIO

EKSPOZICIOJ • FAKKUNVENOJ • PREZENTO DE FIRMAOJ • VARPREZENTO
KONFERENCOJ • PROPAGANDO • PROSPEKTOJ • FOTOJ • VIDEOFILMOJ

INFORMCENTRO PRI KONSTRUFAKO
(ÉTK)

Tiu entrepreno servas kiel informejo pri la hungara konstrufako. Pere de siaj oficejoj en la ĉefurbo kaj sep grandurboj de Hungario la Informcentro observas ĉi-rilate la tutan landon. Rektaj kontaktoj kun multaj fakaj informejoj tra la mondo/ Referencojn haveblaj ankaŭ ĉe U.I.C.B. (Internacia Federacio de Konstrufakaj Centroj) kaj C.I.B. (Internacia Konsilio pri Konstrufaka Esplorado kaj Dokumentado), kies membro estas ÉTK.

INDAS KUNAGADI KUN **ÉTK**!

Budapeŝto, VII., Hársfa u. 21. H-1074
Poŝta adreso: Budapest Pf. 83, H-1400.
Telekso: 22-6564
Telefono: + 36 1 117-317



revuo de revuoj

Estu laŭdinda TEJO-TUTMONDE (3.), ĉar ĝi publikigis sur plenaj kvin paĝoj rememorojn: la peripetiojn de TEJO ekde ĝia Nederlanda naskiĝo. Kvazaŭ ni vidus ekscitan filmon – ne nepre plezurplenan – tra vortoj de s-ino *Jenneke van Veenendaal,* kiuj venas spontanee, tamen lasas brili emocie la travivitajn. Dum ŝi skizas la iamajn cirkonstancojn de la movado, la ŝanĝiĝojn de la medio, aperas antaŭ ni ĝisoste esperantista familio, la junulargazeton fondinta-redaktinta patrino, la sindonaj familianoj kaj la jam delonge ne junaj iamaj aktivuloj, al kiuj la *afero,* la junularorganizo iĝis baza elemento de la vivo.

La jubilea jaro – oni rigardu ĝin pli amplekse ol strikte kalendare – motivis ankaŭ la modestan kolekton de inspiraj dokumentoj pri la universalaj kongresoj en Polujo, naskolando de nia lingvo; ne malpli ol kvinfoje estis tiuj aranĝitaj – en du urboj (kies nomojn kaj la jarojn diskrete kovras redakcia vualo). Eblas legi en POLA ESPERANTISTO (87.3.) vigle-vivan raporton de *Andreo Cseh,* ankaŭ pri amika kunveno en hejmo de la Zamenhofoj. Ilin kaj la internacian lingvon dum la sekva kongreso en 1937 jam senhonte atakis tiu ŝovinista gazetaro, kiu blindiĝis antaŭ sia propra baldaŭa tragedio fare de la pli forta brutala ŝovinismo nazia.

La tempo pasas rapide – jam duonjarcento foriris post tiuj teruraĵoj – kiam sur la antipodo oni – iamaj Eŭropanoj – festas la ducentjaran datrevenon de venkoplena koloniigo. Ties triumfo montriĝis al la originalaj enloĝantoj „terura katastrofo, malnobligo kaj morto", memorigas brave KVAKERA ESPERANTISTO (125.). Al rajtoj kaj justaj aspiroj de la indiĝenoj la tieaj kvakeroj esprimas respekton, deklarante almenaŭ deziron (ĉu eblas atendi pli?) por rebonigi la longan historion de krueleco kaj maljusteco kontraŭ la indiĝena popolo, nun kvaronmiliona.

Certe gesto humana, tre-tre necesa en mondo, kie troviĝas ekstremaj malegalecoj foje (?) kun malhumanaj sekvoj. LE TRAVAILLEUR ESPÉRANTISTE (129.) maltrankvile mencias lokan kampanjon de komercistaro kontraŭ malriĉaj francaj familioj por forpeli ilin el la kvartalo, kaj anstataŭigi ilin je familioj „pli altnivelaj" (komprenu: pli aĉetkapablaj). Ilia mizero provokis iujn, verŝajne ankaŭ la akompanantaj „malmoralaĵoj", tiuj regulaj sekvoj de la socia malaltiĝo kaj la malkapablo trovi eliron. La familiajn situaciojn malfavore modifintaj ekonomiaj ŝanĝiĝoj bezonus kuracadon kaj humanajn disponojn de socio kaj ŝtato – sed jen, rapide aperis lupaj deziroj, el kies fono al sentemaj oreloj muĝas tre bone konataj hurladoj...

Iu artikolo kun tro malvasta horizonto instigis profunde analizantan studaĵon el la plumo de pola historiistino (SENNACIULO, 4.), pri la iama politika movado „Solidareco". Realisma kaj detala konsiderado de *Zofia Banet-Fornalowa* desegnas la fontojn en la tiama ekonomia krizo de Pollando kaj ĉe *tre diversaj* sociaj grupoj. Iliaj neeviteble kontraŭdirektaj celoj kaj postuloj kiel politika opozicio kaosiĝis en lando, kie – pro malfavoraj jarcentoj – bedaŭrinde tro mankis *politika kulturo,* kaj ne nur inter la amasoj, sen ankaŭ ĉe plej diversaj intelektuloj. Nekonsekvenca programo, nerealigeblaj postuloj – intencantaj kontentigi la plej diversajn tendencojn – ĝuste en fundo de ekonomia krizo, ruligis tiun organizaĵon „dekomence al malvenko" – asertas la aŭtorino. La plej multaj membroj iel ligiĝis al la katolika eklezio, sed troviĝis abunde maldekstruloj, kiuj forpuŝiĝis de la Laborista Partio pro ĝiaj mispaŝoj, eĉ kripligoj de socialismo en la praktiko. La voluntarismaj eraroj, nemodifitaj dogmoj – nur teorie belaj – kondukis al protestindaj situacioj, kaj finfine, pro la politikaj malkapabloj kaj drastaj misaĵoj de la gvidantoj de „Solidareco", anstataŭ kompromisaj elirvojoj al pli favora situacio, la lando krize endanĝeriĝis. Kiel post ĉia amasa popola protestado, la registaro kaj la partio multe lernis pri siaj mankoj kaj eraroj, agi pli realisme, pli konforme al la popolaj bezonoj laŭ la ekzistantaj, kaj ne nur teoriaj, ebloj.

Por recenzantoj donas la saĝa *Marjorie Boulton* multajn kaj ne malhaveblajn rekomendojn (ESPERANTO, 4.), kiujn mi plej volonte republikigus, tiom gravaj ili estas. Kompreneble eblus citi el la konsiloj, tamen al mi ŝajnas momente pli gravaj la *malkonsiloj.* Forlasi – estimataj recenzontoj – personan antipation, malafablajn vortojn kaj sarkasmajn retorikaĵojn (por montri propran superecon). Aliflanke – kaj jen tamen la *konsiloj,* ofte ja tre necesaj *konsoloj* – modereco, *kompata takto* (al la oferema aŭtoro, ĉu ne), kaj nelaste *helpo* al la legantoj per pli proporcia kaj konkreta ĉirkaŭskribo de la aŭtoraj intencoj kaj valoroj, certe troveblaj eĉ en iom minoraj verkoj. Ĉar la poetino absolute pravas: „Ĉiu literaturo konsistas plejparte el meznivelaj verkoj."

„Pri roko kaj popo" legante ne tuj forkuru! Sub tiu kurioza titolo – pri kiu vi pensus ion strangan pro la alipaĝaj ĉinaj drakoj – legeblas specimenoj de tre utila „fakvortaro" (*kial la citiloj? Red.)* de popularmuzikaj terminoj (KONTAKTO, 3.). Oni akceptu – pliaĝuloj eĉ pli respekte – ke tiu internacia muzikado bezonas ankaŭ en nia lingvo prononceblajn vortojn, eble de-angligitajn, sed bone kaj plaĉe asimilitajn al Esperanto. Kaj *Bertil Wennergren* estas vere gratulinda pro liaj streboj: de *bluso* (blues) ĝis *disk-estro* (ĵoke) kaj *metalroko* li iierte trovis ekvivalentojn, laŭ mia modesta kaj laika opinio akcepteble konvenajn. Kaj finfine tio gravas.

Ervin *Fenyvesi*

DÖKA

PRODUKTAĴOJ POR KONFEKCIO-FABRIKOJ:

Universala gladotabulo
DÓKA 5 kaj DÓKA 5/1 tipoj por parta kaj fingladado.
Fabrika gladmaŝino, pervapora
DÓKA V/21 tipoj je 1,6 kaj 2 kg.
Glu-premilo, fronte fiksa
duonaŭtomata kaj mekanika, en diversaj dimensioj.
Vaporprovizilo por gladiloj kaj figuroj
TJ-N-MINI tipa elektra vaporizilo, por unu laborloko,
TJ-02-ME UNIVERSAL kaj EXTRA vaporizilo, por 2-3 laboruloj.
Tiuj kontentigas la bezonojn de etaj kaj grandaj fabrikoj.
La vaporizilon produktas:
inĝ. János THEOBALD
Budapest, XI., Regős u. 8. Tel.: 896-303
Vendas:
DÓKA Agentejo
Budapest, XIV., Bánki D. u. 16.
Telefono: +36 1/636-613 aŭ 633-851 aŭ 633-493
Telekso: 22-3122

villamosság mechanika TJ

Laŭbezone ni ekfunkciigos la aparatojn.
Ni zorgos pri provizado de maŝineroj kaj priservado.
Dratplektaĵo
Brulzinkizita kaj nigra — en diametroj 0,7 — 3,2 mm.
Specialaj metalŝtofoj
Pezmetalaĵ ŝtofoj, laŭ mendoj.
Dorna-drato
IOWA J 4 tipo.
Dratplektaĵoj
en diversaj dimensioj.
Vando-reto kaj emajlitaj dratoj
en diametroj 0,7 — 1,8 mm.
Kablo-krampo 20×20 mm
UKA II. tipo.
Argilkolombo — sportpafista disko, kun aŭ sen farbigo.
Fabrikanto:
DÓKA Metiejo
Karcsa H-3963
Vendas:
DÓZSA MgTSZ
Ker. Osztálya
Karcsa H-3963
Telefono: +36 41 11-741
Telekso: 062-743
DÓKA Agentejo
Budapest, XIV., Bánki D. u. 16. H-1148
Telefono: +36 1/636-613 aŭ 633-851 aŭ 633-493
Telekso: 22-3122

DÓZSA MGTSZ
karcsa

georgo kamaĉo

dudek ok tagoin sur ebeno blanka

al k.

33.- mi provos rakonti pri ŝiaj unuaj dudek ok tagoj en blanka mondo, kaj pri la blanka mondo mem. malfacila tasko: la temo, kiel la ebeno, nevenkeble tro ampleksas, dum mia parolo stumblas. malmulton ŝi konfesis al mi pri tiu tempo. mi esploris, mi divenis, supozis, induktis; ankaŭ nun kaj plu.

ŝian antaŭan vivon mi parkere scias. kaj ŝiajn lastajn kvin tagojn. ĉion tion ni kune travivis. ŝi naskiĝis en mediteranea vilaĝeto antaŭ dudek unu jaroj. plaĉe svelta, vigle lerta, simpatia.

la dudeksepan de januaro ŝi malaperis el la vilaĝa naĝejo. elakviĝinte ŝi paŝis de la baseno al du amikinoj, apud kiuj ŝi ekkuŝis. subsune. ŝia sunbruna dorsa haŭto agrable pikvarmetis. junulinĉo venis kaj demandis pri ŝi. responde ŝi montris la vizaĝon, ridis. unu sekundo pasis. sed ŝi ne plu estis tie.

1.– ŝi aperis, en ankoraŭ humida helblua bikino, sur ebeno senlime vasta. antaŭ ŝiaj okuloj, nur blanka horizonto. alte super ŝi, plia ebeno, kiu ĉambrigas la vidaĵon: inter planko kaj plafono vakas regule dek metroj. ŝi angoretis, kiel antaŭ senresponda demando. neniu, nenio suras la ebenon.

ŝi rigardis ĉirkaŭ, malantaŭ sin: du blanke senfinaj muroj formas angulon. ĝi alinvitas ŝin neste. ambaŭ muroj nemezureble trans horizonton dislongas, firme desegnante supersignon eternan. ombroj maleblas, suno malnecesas: ĉiuj eroj de l' enorma delta ĉambro konstante lumineskas. ŝia ombro profunde stalagmitas en ŝin mem.

mallarĝaj, nepalpeble nigraj linioj kvadratas la plankon kiel goan tabulon, kaj ĉiuj blankaj kvadratoj lateras unu metron. ekpaŝis ŝi, sen kompreni, ale al la angulo, rimarkante, ke la slabo, kiun ŝi surstaris, nun blankas re. antaŭe ĝi (nur ĝi) flavis.

plupaŝi maleblis, kaj ŝi devis halti sur la kvadrato, kiu vertice tuŝas la slabon angulan. ŝian vojon al ĉi tiu baris du septoj kristalaj, tri metrojn altaj, kronataj de senkolore pura, fajna vitroplato, kiu hermete fermas tiun travideble nevideblan vakuan vitrinon, absolute vakuan.

ŝia kapo kliniĝis lace; apogante sian dorson sur vitrina septo ŝi kaŭriĝis por ripozi; sennokta dormo ŝin venkis.

2.- vekiĝo. senvetera klimato, ĉiam agrabla, ideala. ŝi demetis la bikinon kaj, jam nuda, aliris la vitrinon de ekstere, polmante ambaŭ vitrajn septojn (la du ceteraj septoj estas mem la blankaj muroj). ŝi restaris sur la sama slabo, kiel hieraŭe. doloretis ŝia dorso pro malkomforta dumdorma pozicio. ŝi baldaŭ bezonos seĝon por malstreĉe sidi.

la slabo ekflavis sub ŝiaj piedoj. subplanda tiklo, kvazaŭ elektra lipkareso, demandis ŝin pri deziro, pri emo aŭ nepro: ne plu stari, sidiĝi, sidi komforte sur seĝo, seĝo brunligna, brilligna, malnovaroma, kiel tiu ĉe avino infanaĝe, same fortike kaj stabile nerigida, tiel dezajnita, tiel ornamita, ĝuste tia kaj, kial ne?, kun samaj difektetoj. la tuta procezo (tiklo-demando-sinesploro-respondo-malstreĉiĝo ŝia) daŭris malpli ol unu sekundon, kelkajn sekundonojn, preskaŭ ne daŭris. la kvadrato ĉesis flavi kaj en la vitrino (necesis nur pluraj momentoj), per plej etaj eroj internen radiantaj el la vitrinaj septoj, kunmetiĝis tia lignoseĝo, kian ŝi kaj nur ŝi elpensigis. laŭ ŝiaj nekonsciaj, sed efektive donitaj, instrukcioj. la seĝo, taŭga por sia celo, senmovis envitrine, sidoprete, sidopete. tamen nepredeble. la vitrina kristalo ne ireblas tra.

iredenta seĝo. kie ŝi ŝatus havi ĝin? refoje ŝi rigardis al la ebeno, diskvadratita kvazaŭ goa tabulo; laŭ kartezia koordinatsistemo eblus precizigi, kie la seĝo situu. ambaŭ koordinatojn ŝi kalkulis: dekstramure – tri slaboj; livamure – kvar. tri, kvar. la vitrino tuj lokis ŝian seĝon tien. post plurhora sidado ŝi sentis ian vokon el si mem, ke ŝi provu refoje. memfido spronas.

5.- kiel funkcias la vitrino? mi havas teorion. ĝi kunmetas, surmetas, konstrumetas, atomon post atomo; la vitrino ujas finian nombron da iliardiliardoj kaj ilionilionoj da atomoj – ne pli. ŝi povis (kaj povas) per nura piedtuŝo sur la komunika slabo ordoni al la vitrino, ke ĝi ĉiun unuatoman faketon jen lasu malplena, jen plenigu per atomo de iu el la diversaj cent pluraj fiemiaj elementoj: kriptono, jodo, sulfuro, tantalo... ne eblas produkti en nur unu fojo, ekzemple, la budapeŝtan parlamentejon, ĉar tiu ĉi supergrandas la vitrinon; popece tio eblas, ĉar la vitrino povas elkombini *ĉion,* kion ŝi mem povas al ĝi instrukcii. informojn ŝi rapide, facile, leĝere liveros. kiam tio ne okazis, la vitrino mem kribris, filtris spurojn en ŝia dudekunujara cerbo.

la vitrino funkcias ne puzle (oni devas refari nenion), sed mozaike: ĉion ekzistivan ŝi libere kreus, se ŝi nur scius ĝin pridetaligi.

la kvinan tagon ŝi hejmis en marmora sentegmenta dometo tri metrojn alta. venante el manĝoĉambro apud la vitrino kun frandaĵo enmane ŝi malrapidis sur pufan helgrizan fotelon. super fenestro tiktakis horloĝo. trans la fenestro kaj trans strio el strasa,

surogata, postiĉa herbo, etendiĝis nur blanko, kiu ŝin izolis, kiun ŝi insulis.

7.- ŝi (kaj mi) emas kredi, ke tri pliaj anguloj ekzistas ie. sed ili, samkiel dioj kaj mioj, nur probablas ekzisti. sed mi pensas pri pliaj tri vitrinoj...

se mi, ŝi aŭ iu traborus la murojn (fiimera projekto – ŝi certe provis kaj fiaskis), ĉu tiu trovus nur vakuon, steloplenan kosmon? ĉu plian ĉambron, pliajn ĉambrojn, tute egalan egalajn sama samajn? ĉu ankaŭ supre, sube?

ĉu ni vivas ĉe poluso de kvarona sfersurfaco kaj meridianas ambaŭ muroj?

kion ŝi farus, se aperus plia iu sur la plafono, kiu por tiu rolus plankon, samkiel nia plankebeno ties plafonon ĉielanstataŭan?

mi min daŭre demandas, ĉu ŝi estas mastro aŭ skla va ido de l' ebeno...

la sepan tagon ŝi rememoris aforismon de s.b.: *kokino estas nur rimedo de ovo por produkti plian ovon.*

ĉion necesan ŝi jam havis (eĉ tiun ĉi tajpilon); tial ŝi eksentis tiam (ne pli frue) lian mankon. kvankam ilia rilato dissplitiĝis antaŭ pluraj monatoj...

11.- ŝi provis sin mortigi, sed vane, ĉar:

a) oni (ŝi) povas malkonstrui nur tion, kio ankoraŭ senmovas, mumipoze, en la vitrino. malkonstruo vidadeblas: ĉiuj atomoj revenas, rapidege, ja fulme, tamen sinsekve, al la vitrinaj edroj. aĵojn, kiujn ĝi lokis (tutaj) sur la ebenon, ĝi ne povas detrui. nek modifi, nek movi. kiel do mortigi sin vitrine?

b) aliaj solvoj aŭ trivialus tiumonde, aŭ tro drastus.

c) nun ŝi havas, disfoje gapas, lian foton, kiun ŝia memoro rivelis. kaj ŝi komencis en sia menso skizi planon, planon pri li...

15.- nun, tajpante, mi certas, ke ŝi atendas min surlite, lascivete. verka rapido nepras. mi bedaŭras mian nekompetenton, mian nur partan uzon, ĉerpon de rakontartaj ebloj. simile, ŝi ne plene perludis la vitrinon. aŭ ŝi al mi malkaŝis ĉion sensignifan, misterigante gravaĵojn, mistifikante min.

sed, kial ŝi ĉion dirus? ĉu nur, ĉar mi mem tiel agus? ĉu, cetere, mi ion dirus ajn al ŝi, se ŝi estus mi, kaj mi – ŝi? ĉu tiel tiom ni similas?

mi konjektas, ke ĝuste en la dekkvina tago ŝi abunde eksperimentis por regi perfekte la vitrinon, ĝiajn funkcileĝojn. mi preskaŭ vidas, kion ŝi produktis. nenio restas nun sur la ebeno. almenaŭ ne sur tiu ĉi parto de l' ebeno. ĉu ŝi ĉion poste malkonstruis envitrine? ĉu ŝi forsendis trans la horizonton sian propran ĝardenon de delicoj, dezerton de obsedoj? dekstramure – mil naŭcent sepdek slaboj; livamure – mil naŭcent okdek sep. kaj for!

vitrino da pluvakvo, momenta bloko da orsablo, kiuj dum sekundono kompaktus, sed tuj sobfale disŝutiĝus, disŝprucus ĉirkaŭ sin sur blankajn slabojn, inundocele, tapiŝovole. puraj akvo kaj oro, ĉar nure nur el hidrogeno, oksigeno kaj oro rare kombinitaj... dolaroj; dekoj, centroj, miloj da dolaroj... ĉiuj same (finfine) senvaloraj, dissemataj pluve en malproksimon, kie ili kuŝus, kaj kuŝus, kaj kuŝus kaj – kio? jes, verdaj dolaroj, flavaj dolaroj, dolaroj ruĝaj, dolaroj el argilo...

kaj, se la blanka mond' kvadratas, kial ne provizi proviantojn regule surdiagonale por eventuala unuopa aŭ geduopa ekspedicio? dekstramure – livamure; mil – mil; du mil – du mil; ikso mil – ikso mil; kaj tiel plu plu plu... se la ĉambro kvadratus. je tio ŝi kaj mi, je simetrio, ankoraŭ kredas, kvankam ĉiam ni evitis tribajn idolojn.

ĉion mi imagas, kvazaŭ ŝi devintus antaŭpensi la samon. ĉu mi tamen eraras? ĉu ni tiel tiom malsimilas?

17.- ŝi avidis kunan homon. pli precize: iĉon. plej detale: lin. tamen...

vitrine ĉio eblas, sed nur ŝi ivis. jes, nur ŝi povis. ĉiaj atomoj kunmeteblas en hazarde strukturan stabilon. necesan informaron ŝi rajtis ekdoni kiel tuton, aŭ lasi, ke la vitrino mem ĝin trovu post plej skrupula senskrupula serĉo. de la vitrino ŝi mendu, ne demandu, ĉar ĝi demandos ŝin. sed, se mankas datumoj, se mankas respondo *en ŝi?* tiel jam okazis.

ŝi petis de la vitrino mapon de la ebeno, sen enhavi en si eĉ nur malmulton, iomon de scieroj pri ĝiaj formo kaj konsisto. la vitrino ne funkciis, kaj fine ŝi komprenis, ke ŝi devus peti de l' vitrin' nur tion, kion ŝi mem posedus aŭ posedintus. kaj oni devas bridi sin, ne la vitrinon, kiu neniam kulpas; se ŝi iam produktigus ion kontraŭvole, pro nesufiĉa pripenso, pro frenezo aŭ ebrio, pro pasia impeto, tio kreus problemojn por nur ŝi.

vane ŝiaj piedoj pledus surslabe por poemo en la hungar a lingvo, por pentraĵo bosĥa, por rakont' borgesa, por simfoni' ŝumana, se ŝi neniam, eĉ nur iom, aŭskultis, legis, frandis aŭ studetis ion hungaran, aŭ el bosĥo, el ŝumano, el borgeso... terura limigo neantaŭvidita. la vitrino ne konstruas el nenio, ĝi sondus en ŝin, asdikus forlegitajn liniojn, parkerigitajn prae, elfosus fosiliajn legimpresojn, preserarojn, silabojn lipumitajn; reverkus ĝi ne la saman verkon, sed tiun, kiu restas ie en ŝi post reliefigoj, forgesvualoj, sintrompoj vitrintrompaj; ŝiaj eraroj iĝus ĝiaj misoj, kaj ŝiaj trafoj – ĝiaj. se en ŝi ĉiom mankus, tiam ĝi elfarus tian palan aŭ groteskan antaŭbildon, kiun ŝi (kiel? kial?) vartas enkape pri la flandra, la blinda, la bludanuba aŭ la hungara: *szűrlálynyosz...*

ĉu ŝi kapablos tutan lin rekrei?

ŝi antaŭtimis fiaskon, sed minaco ŝin stimulis, kvarvorta averto: *kiu solas, tiu bestiĝas.* prave, ĉar nun ni ambaŭ kune kunas.

23.- longe, tre longe ŝi meditis, projektis, planis kaj dezajnis. onani antaŭfote ne sufiĉis. longe ŝi lin kovis: lian nude voluptovekan korpon, plurfoje ĝisfunde esploritan; liajn gestojn, mienojn, reagojn, ekagojn, esprimojn, ideojn, eldirojn, fidele de ŝi registritajn; ĉiujn liajn faltojn kaj difektojn.

jes, nun eblis lin rehavi, reakiri. tia li estis. ili

ambaŭ kune iradis tri tutajn jarojn, ĝis ili diskverelis definitive, senripare. daŭra rilato, kiun sekvis, ŝiaflanke, rezigno pri novaj intimaj konatiĝoj. ĉar ŝi estis lia ulino kaj li, do, ŝia uliĉo. matematike, ĉu ne? kial ne ankaŭ nun?

nepris malmulto da modifoj, aldonoj, korektoj: li estu tiu li antaŭ la rilatorompo, malpli akra eĉ, pli tolerema, pli respekta, pli obea.

kiam la datumaro pretis, ĝi elŝiiĝis enslaben. atomoj lin plenumis; strange... ŝi kvazaŭ elamiĝis je li, tiel mortaspekta... atakis ŝin latenta tento lin eldoni, sed ŝi ne perfidus sin mem per mispaŝo idiota... lasante lian korpon envitrine, sentima, malnervoza, sed ne apatia [ŝiaj sentoj ĉiam malfruas, ili kaŝiĝas ie longtempe (eble vi rimarkis tion)], ŝi iris dormi.

24.- matene vekis ŝin transvivintaj koŝmarbildoj: blanka ŝakreĝo nigran ŝakreĝon persekutis, poste la blankan la nigra, kaj ĉiaj aliaj pecoj mankis, kvazaŭ neniu estus komencinta la vanan partion... *per kis'* – li kriis – *faru min senmorta...* ŝi devis lin kateni en glacian amorkaĝon... sed jam ne plu eblis distingi, kiu estas kiu, malgraŭ lancinaj vundoj...

ŝi staris tie, rompinte sian promeson, dum la vitrino krevigis en atomojn lian karnon. liaj sanktulaj okuloj spionis ŝian buĉon el sur la totema, totalema foto. eks pri li...

ne, ŝi ne devis plu timi kvinan kolonon sur la ebeno. eble tiam, eble morgaŭe, ŝi ekbezonis min. sed intertempe...

25.- :..*kaj miaj kulpoj kolektiĝos* – suspiris ŝi – *por transformiĝi en morton.*

la vitrino scias kopii, kaj kopiis. ŝin. facilus sendi kopion de si mem foren sur la ebeno... eble iu ŝin atendus, ŝin helpus. kasteloj en aero...

ŝi ne eltenus revenon de sama ŝi, ŝi ne rezistus al tento torturi sin malmem.

kiel se mi dirintus, mi memoras ŝiajn amarajn vortojn (tiam ŝi ankoraŭ deksepjaris): *mi kapablas abomeni min mem.* ĉu ĝuste, ĉu mise ŝi profetis la eventojn? mi asertus, kaj per tiu ĉi tajpaĵo nun asertas, ke dum sia dudekvina tago sur blanko kaj enormo, ŝia kapablis... ne, ŝi ne nur kapablis, ŝi naŭzis sin mem.

naŭzo, abomeno...

kiomfoje ŝi vidis sin envitrinan? kiom da fojoj ŝi plenĝue rikanetis forĵetante plian sin sur slaban dezerton, sur oceanon da senonda glato, sur horizontalojn nefuĝeblajn, kie vanus penigaj nenienkondukaj marŝoj, kie senutilus helpokrioj, kolirie senesperaj horizontobservoj, sinkonsumaj fortostreĉoj simulantaj prokraston de sobfalo pro laco... ĉar *si* prefere ie kuŝus, eburon gratus, ŝovus larmon, sputante pro subnutro kaj soif'.

27.- nur sciante, nur kaŭzinte volonte kaj aktive (almenaŭ unu) plian sin kadavra, nur tiam ŝi ekvivis sin senmorta. unuope sur mondo unuece unuobla. sola.

ŝi postulis de la vitrino ne plian sin, sed *alian,* ĝemelinon. temas pri mi. kaj la vitrino ekfunkciis, modlante inon preskaŭ identan, kiu aĝos iom malpli, ĉar ŝi ne vivintos tiujn dudek kelkajn tagojn sur la ebeno, tiujn tagojn peĉe densajn; ĉar la unua ŝi aperis en sian, en nenies mondon, dum la dua elvitriniĝos sur alies ebenon.

la dudekokan tagon mi malaperos el la naĝejo vilaĝa. kun dorso plu humida pro gutetoj, kun bruna dorsa haŭto sub la suno, kun tiu amikiĉo kaj ambaŭ junulinoj, legante, ridetante malantaŭ miaj sunokulvitroj. pasos unu sekundo, kaj mi estos tie ne plu.

28.- mi aperis, en ankoraŭ malseka helblua bikino, sur vasta ebenaĵo. ŝi (tiam mi imagis min tie) alpaŝis min decide. antaŭ miaj okuloj, cis blanka horizonto, dometo malalta, kiun sieĝas gazonoj. ni kuniris, mi lasis la bikinon sur la plankon, ni sidis kune sur velura lito, kaj la horloĝo tiktakadis monotone, simile al klavofrapoj ĉi-tajpilaj.

la objektoj sintrude nin kaptas kaj devigas nin esti.

la objektoj sintrude nin kaptas kaj devigas nin esti.

(madrido, 87/08/22-23)



Sándor Tardi: Eĉ puto silentas

DÉGÁZ

Ne Forgesu!

LA TERGASO SERVAS VIN

RAPIDE, EKONOMIE KAJ SEKURE!

Sed nur per gasaparato bonstata kaj laŭcele uzata!
Se en la loĝejo aŭ ie ajn gas-odoro estas sentebla, voku tuj telefone la lokan servon de la gas-provizejo!
Difektiĝintan aparaton ne provu ripari — voku muntiston.
Via sekureco valoras multe pli!

LA GASPROVIZA ENTREPRENO
S z e g e d
Pulcz u. 44. H-6701/6.
DÉLALFÖLDI GÁZSZOLGÁLTATÓ V.

OKGT

Bernard Golden

LA TEORIA BAZO DE ORTOGRAFIA REFORMO EN ESPERANTO

Celo de la esploro

Tiu ĉi artikolo estas la unua en serio da studaĵoj, esplorantaj la historion de proponoj por ortografia reformo de la Esperanta alfabeto. Provoj modifi la skribadon de Esperanto senĉese okazis dum la unuaj cent jaroj de ekzisto de la lingvo, do abundo da materialo estas havebla por analiza kaj kompara ekzamenado. Skemoj por „plibonigi" la manieron skribi Esperanton ne estas pritrakteblaj kiel simpla lingvistika aŭ interlingvistika demando. Krom la lingvosciencaj aspektoj de la t.n. difektoj de la Esperanta alfabeto kun rilato al la fonetika strukturo de la lingvo, estas necese rigardi la reformismon en Esperantujo kadre de la sekvaj fakoj kaj sciencobranĉoj.

1. Fiziologio de legado kaj skribado; la obstakloj prezentitaj de malbone desegnitaj literoj; la manko de interrespondo de fonemoj kaj grafemoj
2. Metodologio de lingvo-instruado; la motivoj de lingvolernado; la manieroj superi malfacilaĵojn
3. Sociolingvistikaj faktoroj detereminantaj la sintenon de la Esperanta lingvokomunumo rilate la lingvon; reagoj koncernantaj eliminadon de imagitaj aŭ realaj malfacilaĵoj en la lingvo; rezisto kontraŭ ĉiuspecaj reformoj
4. Maŝinskriba kaj presarta teknologio; teknikoj de tajpado kaj presado; permana kompostado, maŝinkompostado, fotokompostado
5. Telekomunikadaj sistemoj; telegrafio, telekso
6. Informatika prilaborado de donitaĵoj per komputeroj
7. Psikologia interpretado de la konduto de individuaj reformemuloj; la kialo de obsedaj postuloj pri ŝanĝoj en la lingvo; ŝa relative granda malŝparo de tempo, fortostreĉo kaj financaj rimedoj por propagandado; ripetado de la eraroj kaj mispaŝoj de antaŭaj *senescepte* malsukcesaj reformantoj
8. Ekonomiaj faktoroj

Antaŭ ol pritrakti specifajn problemojn de la alfabeto de Esperanto kaj la diversajn reformproponojn, estas necese unue ekzameni la teorian bazon por krei alfabetojn de internaciaj planlingvoj.

La uzo de la latina alfabeto en la planlingvistiko

Elstara trajto de la planlingvistiko estas preskaŭ universala uzo de la latina alfabeto pro ties vasta internacieco kiel skribsistemo de multaj etnolingvoj. Tre malofte estas aldonitaj al tiu alfabeto literoj, simboloj aŭ diakritaj signoj ne troveblaj en variaĵoj de la latina alfabeto uzataj por skribi etnolingvojn. Jen kelkaj ekzemploj.

George Dalgarno (1626?-1687) kaj John Wilkins (1614-1672) aldonis al la latina alfabeto de sia apriora filozofia lingvo literojn de la helena alfabeto. La alfabeto

de Ars Signorum de Dalgarno enhavas la vokalojn eta (H,η) kaj upsila (Y,υ. Vortoj komenciĝantaj per *K* rilatas al politikaj fenomenoj; *Kη – enkondukas la subklason de justicaj rilatoj kaj* Kυ – signas la subklason de krimoj. Ankaŭ Wilkins aldonas du helenajn vokalojn al la alfabeto de sia lingvo por indiki la subklason de specioj: alfa (α) kaj la diftongo formita per omikra kaj upsila (ου). *Dα estas dio,* Gα vegetaĵaj folioj, kaj Cα spirita agado.

En postaj jarcentoj aŭtoroj de planlingvoj aldonis fremdajn literojn aŭ simbolojn al la latina alfabeto por eviti la uzon de digramoj. En Universal-Sprache *de Pirro, eldonita en 1868, sigma (σ) estas prononcata kiel „ŝ":* Haσnes *(hakitaĵo). La renversa „h"(ɥ), pro sia simileco al la kirila litero „ĉ" (ч), havas la sonon „ĉ", „ĝ" aŭ „ŝ" en Bolak, La Langue Bleue de Lon Bollack, publikigita en 1899:* ɥo *(ĉar),* ɥu mest *(submastro). Ekde 1952 Petro Stoyan proponis la sekvajn aldonaĵojn al la latina alfabeto de siaj lingvoprojektoj.*

c = ĉ
(renversa J) = ŝ
(renversa 2) = dz
ⱶ (renversa 4) = ñ (nj)
Ⴝ (renversa 5) = ĝ

La literoj de la helena kaj kirila alfabetoj, renversaj literoj de la latina alfabeto kaj renversaj arabaj ciferoj ja estas komposteblaj en presejoj, sed granda problemo estas prezentita, se planlingvisto kreas tute novan literformon, netroveblan en iu ekzistanta alfabeto. Tio okazis en Hom-Idyomo (1921), kies aŭtoro, C. Crdenas, opiniis necesa la diferencigon de la unika hispana fonemo rr disde la ordinara r. Li do uzis „R/r" por la unuaj kaj „ʁ/ɾ" por la dua. La litertipo havanta la formon de skriba minuskla „r" vere estas sensencaĵo. Ankaŭ en Qôsmiani, publikigita de Wilbur M. Law Beatty en 1922, kelkaj el la signoj de la 40-litera alfabeto estas tute novaj, do neniu presejo posedas ilin. Estas evidente, ke tiaj ortografiaj komplikaĵoj malfaciligas la ekuzon kaj disvastigon de tiuj planlingvoj, senkonsidere de iuj bonaj kvalitoj, kiujn ili eble havas kiel rimedojn por transnacia interkomunikado.

Difektoj de la latina alfabeto

Oni ne kredu, ĉar la latina alfabeto estas la plej vaste uzata en la mondo nuntempe, ke ĝi estas perfekta skribsistemo. La formo de la literoj de tiu alfabeto estis kritikita laŭ la vidpunkto de la fiziologio de skribado kaj legado. Emil Hanhiniemi[1], la aŭtoro de la planlingva sistemo Lingvologia lingvo, donis al sia projekto modifitan latinan alfabeton, en kiu ĉiu litero havas nur unu formon, por anstataŭigi la nun uzatan alfabeton per du aŭ tri formoj, diferencigantaj majusklojn disde minuskloj. Cetere, li postulas, ke neniu litero estu pli profunda aŭ pli alta ol alia. La sep latinaj literoj, kiuj plenumas tiun kondiĉon estas: Cc, Oo, Ss, Vv, Ww, Xx, Zz. En la reformita alfabeto de Hanhiniemi, la minuskloj estas identaj al la majuskloj sed iom malpli grandaj.

Pli drasta reformo estis postulita de d-ro mile Javal (1839-1907), la franca oftalmologo, kiu fariĝis esperantisto. Li publikigis la rezultojn de sia fiziologia esploro de la skribado kaj legado en du verkoj: Essai sur la physiologie de l'criture (Eseo pri la fiziologio de la skribado), Parizo, 1893, kaj Physiologie de la lecture et de l'criture (Fiziologio de la legado kaj la skribado), Parizo, 1905. Okaze de publikigo de tiu ĉi libro, Javal sendis ekzempleron al sia kolego, d-ro Zamenhof. Dankante lin pro la verko en letero de la 30-a de aŭgusto, 1905, Zamenhoz skribis:

> „Nia maniero de presado, kaj tiom pli ankoraŭ nia maniero de skribado enhavas efektive tre multe da gravaj eraroj, kaj estus tre bone, se la presistoj kaj instruistoj tiun ĉi atentus. Venos iam la tempo, kiam ni devos fari gravajn reformojn en la skriba alfabeto, forigi la punktojn, streketojn, akcentojn, reciprokan similecon de literoj k.t.p. Sed en Esperanto ni tion ĉi ne povas nun fari, ĉar ni estas ankora\ tro malfortaj, por komenci tro multajn batalojn per unu fojo. Mi tamen estas konvinkita, ke pli aŭ malpli frue, kiam Esperanto estos pli forta, ĝi komencos la batalon kontraŭ la maloportunaĵoj de la alfabeto."[2]

Couturat kaj Leau[3] detale pritraktas tiun ĉi aspekton de la latina skriba alfabeto surbaze de la kritikoj en la libro de Javal. Ili reliefigas, ke en la mana skribado, ĉio, kio interrompas la kontinuecon de plumtiroj, konsistigas ĝenaĵon kaj okazigas rimarkindan malrapidigon de la skribado. Javal rekomendis, ke se estas necese meti diakritan signon super litero, oni ne interrompu la skribadon kaj poste skribu la reston de la vorto sed oni skribu la vorton per unu tiro kaj tiam reiru por „ornami ĝin per supersignoj. En unu aŭ alia kazo estas perdo de tempo malproporcia al la grafika graveco de la signoj. Simile, Javal konsilis, ke por rapida skribado oni tute flankenlasu tiujn kromajn signojn kiel la punkton super la „i", la strekon tra la „t", ktp.

Ĝuste tion proponis ankaŭ la Amerika Filozofia Societo (American Philosophical Society), en sia raporto de la jaro 1887 pri la trajtoj, kiujn devas posedi internacia lingvo. Punkto 8 kondiĉas ke

> La literoj uzataj ostos tiuj de la latina alfabeto, desegnitaj per unu sola plumtiro, tiel ke oni ne devas levi la manon meze de vorto; sekve, estu neniuj diakritaj signoj, akcentsignoj, apostrofoj, eĉ ne punkto sur „i" kaj „j" aŭ streko tra „t"."[4]

Couturat kaj Leau[5] argumentas, ankaŭ, ke estas pli facile skribi digramon ol literon kun diakritilo, ĉar oni ne devas levi la manon aŭ forlasi la linion. En rapida skribado oni inklinas esti nezorga pri la formo kaj la pozicio de la supersignoj, kaj tio komplikas la legadon. Ili laŭdas la skribadon de tekstoj en la angla lingvo, kompare kun tiuj en la germana aŭ en slavaj lingvoj, kiuj neniam povas aspekti tiel klare.

Fonetikaj kvalitoj de planlingvaj alfabetoj

Multaj aŭtoroj de planlingvoj asertas, ke ilia lingvoprojekto havas fonetikan skribsistemon. Efektive, tio estas unu el la fundamentaj kondiĉoj por faciligi la lernadon de la lingvo. Tamen, ekzamenado de planlingvoj montras, ke la fonetikeco de la alfabetoj ne ĉiam estas centprocente perfekta. Pro diversaj kaŭzoj esceptoj estas permesitaj, kaj

suplementaj reguloj okupiĝas pri tiuj devioj.

Kun rilato al la demando pri ortografia reformo de la alfabeto de Esperanto, Couturat kaj Leau[6] priskribas tri fonetikajn ortografiajn sistemojn ne bezonantajn supersignitajn literojn.

1. La unua sistemo alvokas teoriajn ideojn, pri kio devas esti strikte fonetika alfabeto, kaj baziĝas sur la principo „unu litero, unu sono". Ĉar ĉiu sono devas esti prezentita per unusola litero, digramoj estas ekskluditaj. Tiel, ĉar la nombro de fonemoj estas pli alta ol la nesupersignitaj literoj elektitaj por uzo en la alfabeto, estas necese aldoni „fremdaj" literojn, ekzemple „q", „w", „x" kaj „y", kaj doni al ili arbitrajn sonojn, kontraŭe al la kutimoj de la okcidentaj popoloj. Ĉi-speca sistemo, do, estas apriora. Waringhien[7] rimarkigas, ke tiu fonetika arbitreco estas ebla nur je la komenco de iu literaturo, sed tuj kiam establiĝas skriba tradicio, la kreo de novaj literoj renkontas pli kaj pli fortan opozicion.

2. En la dua sistemo, okazas substituado de aliaj literoj kaj digramoj al tiuj kun diakritiloj. La proponantoj de tiu ĉi rimedo akordas pri preskaŭ ĉiuj punktoj. „ĵ" = „j", kaj sekve „j" = „y". La digramoj ‚ch" kaj „sh" anstataŭas „ĉ" kaj „ŝ" respektive. La sono „ĥ", ĉar ĝi estas tro malfacila por certaj popoloj, estas anstataŭigita per „k". La sola punkto de diferenco koncernas la transskribon de „ĝ"; unuj proponas „dj", aliaj la simplan „j".

3. Estas ankaŭ tria sistemo, kiu ne havas rigore fonetikan alfabeton, ĉar ĝi permesas neregulaĵojn de etnolingva ortografio kiel la du prononcojn de „c" kaj „g"; antaŭ „a", „o" aŭ „u" ili estas „k" kaj „g" respektive; antaŭ „ek" aŭ „i" ili aŭdiĝas kiel „s" kaj „ĝ". Tia naturalisma projekto iras tro malproksime de la fonetika idealo de planlingva ortografio.

La komplikaj prononc-reguloj de Interlingua (IALA) ilustras tiun ĉi reduktadon de fonetikeco por havi en la lingvo naturalismajn vortformojn kaj prononcadon spegulantan etnolingvajn kutimojn. Laŭ la klarigo de Gode kaj Blair[8] ortografia kaj prononca variado estas tolerata en Interlingua, ĉar la sonoj povas esti influataj de apudaj sonoj en vortoj kaj ankaŭ de gepatralingvaj kutimoj de individuaj parolantoj. Jen ekzemploj de tiu naturalisma fonetiko.

c antaŭ e, i, aŭ y = „c" aŭ fakultative „s"
c antaŭ a, o, aŭ u kaj konsonantoj = „k"
ch = „k", „ŝ", „ĉ"
h = „h" aŭ estas muta: post r kaj t ĝi estas muta
j = „ĵ" aŭ fakultative „ĝ" aŭ „j"
s = „s"; inter vokaloj „s" aŭ fakultative „z"
ti antaŭ vokaloj = „c" aŭ fakultative kiel „sj" aŭ „tj"; kiam akcentita aŭ sekvanta s = „ti".

Duoblaj konsonantoj en Interlingua estas prononcataj kiel simplaj konsonantoj. Prononc-devioj estas indikitaj en la vortaro. Ekzemploj estas ch, kiu ofte aŭdiĝas kiel „ŝ", kaj gi, kiu povas havi la sonon „ĵ". Fremdaj vortoj konservas la prononcon kaj ortografion de la deven-lingvo. Kelkfoje etnolingvaj diakritaj signoj restas por indiki la prononcon kiel la germana ü. Cetere, laŭ la komplikaj reguloj por vortformado, la prononco de certaj konsonantoj estas modifita. Estas, do, evidente, ke la latina alfabeto de Interlingua apenaŭ estas fonetika; male, ĝi spegulas la komplikaĵojn, kaoson kaj difektojn en la latinaj alfabetoj de etnoligvoj kiel la angla kaj la franca.

Sistemo 2 laŭ Couturat kaj Leau estas ĝusta meza solvo inter la pure teoriaj postuloj de tiuj, kiuj volas havi ortografion ideale perfektan kaj sen la ekscesaj koncedoj al neregulaĵoj de la latinidaj lingvoj.

La Zamenhofa alfabeto

Waringhien[9] prezentas argumentojn favore al la formado de fonetika alfabeto per la ekzistantaj literoj de la skribsistemo, al kiuj oni almetas diakritilojn, super-, subaŭ trastrekajn. La planlingvoj, kiuj allasas tiun rimedon, utiligas relative malmultajn signojn. Escepto estas la lingvoprojekto Stipfone de Albert du Lothier[10], en kiu troviĝas plej probable la maksimuma nombro. Krom la konsonantoj ç kaj ñ, povas ricevi diakritilojn ankaŭ vokaloj:

â,ê,î,ô,û; ë,ï,ö,ȫ,ü,é,è

La Zamenhofa bazo por fonetika alfabeto estas la principo „unu sono, unu litero". Por ĝismaksimume ekspluati sian 28-literan alfabeton li uzis kiel helprimedon ne digramojn sed supersignojn. Ili aperis jam en la plej frua stadio de Esperanto, Pra-Esperanto 1 (1878), konata ankaŭ kiel *Lingwe Uniwersala.* Dekstra superstreketo estas uzata nur super vokaloj por marki la finan akcentitan silabon de verboj: *kad"* (falu), *est* (estas). Neniu konsonanto havas supersignon. En Pra-Esperanto 2 (1881-1882) la finaj akcentitaj vokaloj de verboj estas ankoraŭ indikitaj per la dekstra superstreketo: *est* (**estas**), *perig"* (pereigu), kaj la sama diakritilo nun aperas super jenaj konsonantoj:

ć, ĥ, ś = ĉ ĥ, ŝ; ź = ĵ; dź = ĝ

La arketo troviĝas super ŭ.

Waringhien [11] atentigas, ke la Esperanta alfabeto ne estas perfekte fonetika, ĉar (1) absolute perfekta fonetika alfabeto ne ekzistas, kaj (2) Zamenhof kompilis sian alfabeton kun la sama malrigideco kiel li aranĝis sian vortaron. Li volis gardi la internaciecon de la ortografio, do en la Esperanto de 1887 li ne uzis la logikan formon „ẑ" , kiu devenas de „z" (kp. „ź" en Pra-Esperanto 2) sed elektis la formon „ĵ". „Ĥ" estas escepto, ĉar la supersigno ne donas al la konsonanto „h" ŝuŝan sonon kiel tiun de la konsonantoj „ŝ", „ĉ", „ĵ" kaj „ĝ". La slavdevena „x" estus estinta pli bona elekto, sed la skribo „xemio" estas malpli internacia ol „ĥemio".

Difektoj de la Zamenhofa alfabeto

Analizo de la parolata lingvo indikas, ke ne eblas insisti

pri absoluta fonetikeco de la Esperanta alfabeto laŭ la principo „unu litero, unu sono". Efektive, ne ĉiuj esperantologoj samopinias pri la fonetika analizo de Esperanto. Wells[12] klarigas, ke en la ortografio oni skribas kompleksajn sonojn (afrikatojn), konsistantajn el du simplaj sonoj, per unu grafemo: (ts) = c; (tŝ) = ĉ; (dĵ) = ĝ. Demando estiĝas pri „c" (ts); ĉu ĝi estas unu aŭ du fonemoj? Lo Jacomo[13] detale pritraktas tiun ĉi problemon kaj konkludas, ke la respondo ne estas absoluta sed relativa, ĉar ĝi dependas de la celo, kiun oni volas atingi en la priskribo de la lingvo. Male, kun rilato al la kontrasta vorto en la paro „edzo/eco", la sama aŭtoro neas, ke „dz" povas esti unu fonemo en Esperanto pro ĝia malofteco en la lingvo. „Dz", do, ne estas la voĉa ekvivalento d „c".

Vortoj kiel „budĝeto", „matĉo" kaj „pitĉo" estas kondamnitaj kiel „nefonetike" skribitaj, ĉar oni malfacile povas prononci „dĝ" (ddĵ) kaj „tĉ" (ttŝ). Sammaniere, ne aŭdeblas diferenco inter unuopaj kaj duobla konsonantoj en la paroj „fino/Finno", „pulo/pullo" kaj „bute/brutte". Tie ĉi la skribaj fonemoj ne spegulas la prononcon.

Wells[14] mencias certajn perturbojn de la principo de interrespondeco unu-al-unu inter la fonemoj kaj la literoj de la alfabeto. Ekzemple, en sinsekvo de voĉaj kaj senvoĉaj konsonantoj, okazas en la parolata lingvo voĉasimilo, kaj oni emas prononci „agvo", „apsoluta", „vidaz ĝin" anstataŭ „akvo, „absoluta", „vidas ĝin". Tiaj modifoj sporade troviĝas en la skriba lingvo pro malzorgemo: „egzakta", „egzemplo".

Laŭ mia scio, la sola planlingvo bazita sur revizio de Esperanto, kiu provas uzi alfabeton havantan perfektan fonetikecon, estas la „gramatike perfekta" Lingvologia lingvo de Hanhiniemi[15]. La aŭtoro insistas, ke la lingvologia lingvo estos legita en maŝinon, kiu aŭtomate skribos ĝin: pro tio la maŝino ne toleros nefonetikaĵojn kiel „absolut/apsolut". Sekvas, ke la Lingvologia lingvo devas havi pli fonetikan vortaron ol Esperanto. Hanhiniemi modifas la Esperantan alfabeton jene:

j = y	ĝ = j
ĵ = j	ks = x
ĉ = c	kv = q
ŝ = c	ŭ = u

Laŭ Hanhiniemi perfekta fonetikeco postulas la grafemon ŋ por aparta fonemo, trovebla en vortoj havantaj la konsonant-grupiĝon „nk" aŭ „ng". Ĉar tiu litero mankas sur latinalfabetaj skribmaŝinoj kaj en litertiparoj, la litero „w" estas uzata surogate. Jen kelkaj ekzemploj.

reproc-	riproĉ-	mawki	manki
cip-	ŝip-	liwqa	lingvo
fic-	fiŝ-	dawk	dankon
ciwke	ŝinkon	awgula	angulo
jet-	ĵet-	vewki	venki

Sherwood[16] opinias, ke la alfabeto de Esperanto estas handikapita ne tiom pro la uzo de diakritiloj, kiom pro difekto en la lingvo mem. Liaj eksperimentoj pri perkomputera traktado de Esperantaj tekstoj kaj sintezado de Esperanta parolado montras, ke en Esperanto la konsonantaro estas tro riĉa kaj nekomuna al ĉiuj lingvoj; kontraŭe la kvin volakoj estas troveblaj en preskaŭ ĉiuj lingvoj. Multaj parolantoj de etnolingvoj malfacile povas parole kaj aŭde distingi inter „s/z/c/ŝ/ĵ/ĉ/ĝ/" kaj „ĥ/k". Tiu superabundo da ŝuŝaj konsonantoj ne nur okazigas prononcajn problemojn sed vekas dubojn, kondukantajn al oftaj ortografiaj eraroj, ekzemple inter „s/z" kaj „ĝ/ĵ".

***

Post tiu ĉi prezento de la planlingvistika fono de la demando pri ortografia modifo de la Esperanta alfabeto, estos pritraktitaj en la sekva artikolo la praktikaj obstakloj, kiujn alfrontis la fruaj esperantistoj ĉe la skribmaŝino kaj en la presejo, la surogataj alfabetoj de Zamenhof kaj aliaj, kaj la Zamenhofa reform-projekto de 1894.

NOTOJ

1. Emil HANHINIEMI. Lingvologia Revuo. Represaĵo de vol. I, n-ro 1-7 (1966-1971). Ingham (Queensland, Aŭstralio): la aŭtoro; 1979. 88 pĝ. Vd. pĝ. 39.
2. L. L. ZAMENHOF. Leteroj de L. L. Zamenhof. Redaktita de Gaston Waringhien. 2 vol. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda; 1948. 367 + 372 pĝ. Vd. leteron n-ro 150, vol. 1, pĝ. 179-181.
3. Louis COUTURAT, Lopold LEAU. Conclusions du Rapport sur l'tat prsent de la question de la langue internationale. Coulommiers: Paul Brodard; 1910. 32 pĝ. Vd. pĝ. 8.
4. Louis COUTURAT, Lopold LEAU. Histoire de la langue universelle. Paris: Hachette: 1903. (Fotorepreso – Hildesheim, New York: Georg Olms; 1979.) 576 pĝ. Vd. pĝ. 366.
5. Vd. noton 3, pĝ. 8-9.
6. Vd. noton 3, pĝ. 10-13.
7. Gaston WARINGHIEN. 1887 kaj la sekvo.... TK stafeto: Antverpeno, La Laguna; 1980. 293 pĝ. Vd. pĝ. 88.
8. Alexander GODE, Hugh E. BLAIR. Interlingua – a grammar of the international language. New York: Frederick Unger; 1955 (1971). 2-a eldono. 118 pĝ. Vd. §4, pĝ. 3-4 kaj §137, pĝ. 57-58.
9. Vd. noton 7, pĝ. 88.
10. Albert DU LOTHIER (pseŭdonimo de A. LALLEMAND). Langue Stipfone, constitue d'après les divers idiomes du monde. Introduction, grammaire et textes. [Andenne (Belgio): la aŭtoro; 1961. s.p (= 36 pĝ.).] Vd. 2, E: Prononciation.
11. Vd. noton 7, pĝ. 90.
12. John C. WELLS. Lingvistikaj aspektoj de Esperanto. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio; 1978. 76 pĝ. Vd. §2.2, pĝ. 17.
13. François LO JACOMO. Libert ou autorit dans l' volution de l'Espranto. Pisa: Edistudio; 1981. 384 pĝ. Vd. pĝ. 49-61.
14. Vd. noton 12, §2.7, pĝ. 23-24.
15. Vd. noton 1, pĝ. 40.
16. Bruce A. SHERWOOD. Komputila traktado de Esperanta teksto. Akademiaj Studoj. 1983: 14-34. Vd. pĝ. 21.

Bruce A. SHERWOOD. Denove la supersignoj. Urbana (Illinois, Usono): University of Illinois; 1983. 5 pĝ. (multobligita). Vd. pĝ. 3-4.

Konsultitaj verkoj

E. DREZEN. Historio de la mondolingvo. Leipzig: EKRELO; 1931.

(Fotorepreso – 3-a eldono – Oosaka: Pirato; 1967.) 242 pĝ.

M. MONNEROT-DUMAINE Précis d'interlinguistique générale et Spéciale. Paris: Librairie Maloine: 1960. 210 pĝ.

RECENZOJ

Nova vesto de malnova problemo

Rumler J. Abunde kaj redunde. Prago, 1986.

Do, jenas en miaj manoj tridekpaĝa broŝuro — la manifesto de la Praga artliteratura skolo. La aŭtoro abunde kaj rebunde defendas „la ekzistorajton de sinonimoj en esperanto". Kun dokta mieno li eksplikas la esencon de sinonimio kaj polisemio, prelegas pri la funkcia stilistiko, rezonas pri la natura uzo de internaciaj vortoj en Esperanto, traktas dialektikajn rilatojn inter skemismo kaj naturalismo. Ĉio ĉi prezentiĝas en solida terminologia vesto (verdire, ofte eĉ tro solida) vd., ekz-e, „La vorto ekzistas hike prefere kom sense aperceptebla materia moduso de la artisme signifa formo" (P.21). La verkon kronas sinonimia vortaro.

Ĝuste la lasta praktika apendico montras veran valoron de la abunda teoriado. Antaŭ ĉio evidentiĝas, ke temas ne pri sinonimia, sed pri neologisma vortaro. Indas rimarki, ke Rumler en la tuta eseo fervore evitas la vorton „neologismo". Ja oni pridisputas la neologisman problemon jam preskaŭ cent jarojn, sed Rumler pretendas diri ion novan — tial li ĉie parolas nur pri „sinonimoj". Nu, kiu ne mensogas, tiu ne vendas... Tiun artifikon oni eĉ povus neglekti, se ĝi ne kaŝus pli gravan teorian eraron, kiun mi nomas „vortismo';'. Ja Rumler komprenas la lingvon nur kiel aron de vortoj kaj tiras el tio sian koncepton.

Laŭ ĝi, ĉiu lingvo tendencas kovri la tutan objektivan realon. Prava aserto. Sed li vidas nur solan vojon al tio — rapide kreskigi kvanton de vortoj. Sed li ne supozas, ke ne eblas kovri la universon per vortoj, ĉar vortostoko de ĉiu lingvo (eĉ de la plej vortoriĉa) estas limigita, sed la kvanto de realaĵoj — senfina. Tial aldono de kelkcent novaj vortoj neniel ŝanĝas la situacion. La taskon maksimume priskribi la universon, la lingvo solvas alimaniere — kreante novajn kombinojn el diversnivelaj elementoj: fonemoj, morfemoj, vortoj, vortokombinoj, frazoj. Ju pli altas la nivelo de elementoj, des pli riĉas la kombinaro, des pli precizas ĉiu aparta kombino. Tial novaj fonemaj kombinoj (t.e. neologismoj) ludas minimuman rolon en la evoluo de ĉiu lingvo.

La problemon de sinonimio Rumler prezentas tute vortisme, ĉar li traktas nur leksikajn sinonimojn. Tamen reale la fenomeno de sinonimeco multe pli vastas. Krom la vortaroj, ekzistas ankaŭ la tekstaj sinonimoj. Jen kelkaj ekz-oj: 1. — Mi dankas vian bonecon — li diris; 2. — Deputitaro — anoncis la servisto; 3. — Altestimata sinjora moŝto — komencis unu el ili; 4. — Dio gardu min! — protestis la timigita notario. (Baghy J. Hura!). En diversaj kuntekstoj la vorton „diri" anstataŭas aliaj: daŭrigi, pripeti, emfazi, konsenti, oponi, konfesi, miri,



balbuti, ĝemi, muĝi, flustri, kartavi ktp. Tamen ne nur vortoj povas sinonimi, sed ankaŭ vortokombinoj (interesi = veki intereson, kapti atenton, tikli scivolon, inciti sciemon, aspekti grava...). Tre esprimivas frazeologiaj sinonimoj (vane penadi = sizife labori, ĉerpi akvon per kribrilo, draŝi fojnon....) Por variigo de la frazoj gravas ankaŭ gramatikaj sinonimoj (estas bela = belas, estime = kun estimo...) Sed pli riĉajn eblojn prezentas la sinonimio je la nivelo de frazo. Komparu jenajn propoziciojn: 1. Li ne parolis, sed la langoj de la aliaj klakis tien kaj reen (B. Potts) 2. Li silente aŭskultis la babilantojn (SO), 3. Li ne sentis bezonon interrompi la vortotorenton, kiu fontanis el la buŝoj de la apuduloj (SO); 4. Ili fervore ekzercis siajn langojn sen atenti la meditemaan najbaron (SO). Evidente tiuj kvar frazoj sinonimas, kvankam ne ekvivalentas, ĉar ĉiu el ili esprimas propran nuancon. Tamen ankaŭ la leksika sinonimio en Esperanto ne tiel mizeras, kiel tion volas prezenti Rumler. Al sinonimia riĉeco de Esperanto grave kontribuas al la fenomeno de polisemio.

Traktante dialektikajn rilatojn inter polisemio kaj sinonimio Rumler emfazas, ke tiuj nocioj antagonismas. Laŭ lia opinio, la sinonimo estas „dialektika batalanto kontraŭ hegemoniemo de plursignifeco", ĝi helpas „likvidi la plursignifecon". Tamen Rumler forgesas, ke dialektika metodo devigas esplori ne nur opozicion, sed ankaŭ unuecon de la du fenomenoj. Ja ĝuste polisemio kaŭzas la abundecon de sinonimoj, ĉar plursignifa vorto kapablas generi plurajn sinonimajn ĉenojn. Semantikaj ligoj inter la signifoj produktas asociaciojn, ebligas metaforajn transformojn, naskas konotaciojn, pri kies neceso plendas Rumler mem.

Rumler asertas, ke leksika sistemeco kaj minimumeco estas grava avantaĝo de Esperanto, kaj tuj proponas tiun avantaĝon likvidi amase kreante neologismajn sinonimojn. „La taŭga momento venas nun" — li heroldas. Sed kial ĝuste nun? Ĉu la tuta mondo akceptis Esperanton kaj la facila lerneblo jam ludas nenian rolon? Hm... Cetere, oni konsideru ne nur propagandan, sed ankaŭ teorian vidpunkton. Ja lingvistikaj esploroj montras, ke en komenca etapo ĉiu lingvo evoluas precipe ekstensive (formante kaj vastigante vortostokon). Sed poste pli kaj pli ĉefiĝas la intensiva tendenco: rilatoj inter lingvoelementoj iĝas pli riĉaj, precizaj kaj sistemaj. Do, evidentas, ke Rumler propagandas kontraŭprogresajn ideojn.

La vortara minimumeco estas ne nur avantaĝo, sed ankaŭ esenca trajto de Esperanto. Nia lingvo posedas ne tre amplekson leksikon, sed kompense Esperantaj vortoj kaj morfemoj estas multe pli kombineblaj ol la etnaj. Tio estas specifaĵo de Esperanto, kiu determinas ĝiajn stilajn eblojn.

La vortismo de Rumler prezentiĝas ankaŭ en la problemo de stilo: „Stilo estas kapablo diri la samon per aliaj vortoj" (P.14). Kvankam li foje mencias ke la stilo „Estas maniero organizi, t.e. elekti kaj kombini lingvajn elementojn", tamen reale li reklamas nur elekton de vortoj kaj tute prisilentas ceterajn stilistikajn eblojn. Por apogi siajn asertojn li ekspluatas jenan rekomendon de Zamenhof: „pro la bono de nia afero estas dezirinde, ke la esperantistoj kiel eble plej imitadu mian stilon". Evidentas, ke ĉi tie temas pri t.n. norma stilo, t.e. pri manieroj konstrui logikajn, kompreneblajn kaj belsonajn frazojn. Tamen Rumler aplikas tiun citaĵon al funkciaj stiloj, nomante ilin „veraj stiloj" diference de la Zamenhofa. Jen kiel li transformas la sencon: „La Zamenhofa fundamento estas envere nura stilo kaj ne lingvo, jam pro tio ke temas pri elekto el pluraj eblo j. Se elekto, do devis ekzisti io pli ampleksa, el kio Zamenhof elektis. Kaj tio pli ampleksa, estis kaj estas ĝuste la internacia vortoprovizo" (P.14-15). Ĉu komentoj bezonatas?

Unu rimarkon mi faros — pri la „internacia vortprovizo". Rumler penas kredigi, ke li sin bazas sur la Fundamento, ĉar li aplikas la 15an regulon permesantan akcepti internaciajn vortojn, „kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto"(Z). Tamen en realo la proponataj neologismoj plej-

parte ne estas internaciaj. Rimarkeblas francismoj (petita, malado) kaj germanismoj (folka, taŝo, gemuta). Amasas anglismoj (smajli, dirta, neksta, pinka, vorko, musti, storio, soriaŭ, ples ktp). Svarmas latinismoj, kiuj eble ŝajnas internaciaj por lernintoj de la latino (enim, igitur, aŭtem, olim, omna, sik, ube, ibe, hik k.m.a.). Do, denove evidentiĝas mensogo.

Cetere, la malinternacieco eĉ ne ŝajnas tro granda peko, se la tuta vortaro ne aspektus kiel nekohera sensistema amaso. En ĝi abundas ortografiaj duplikatoj taksataj kiel sinonimoj: sinstra – sinistra, trabli – trubli, forsan – forsin, okej – oŭkej, splenda – splendida, evanui – vanui k.a. Oftas homonimeco kaj paronimeco al jam uzataj esperantaj vortoj: participo – partopreno, maĉo – matĉo, kuki – rigardi, petita – eta, empedi – obstakli (kp. impeti). Pikas la okulojn perversaj rederivaĵoj: nasanco (naskiĝo) el renesanco; ĵurno (tago) el ĵurnalo; graŭ (tial) el malgraŭ k.a. Plejmulto de la sinonimoj neniel diferencas semantike kaj stilistike, kion pruvas ne nur vortaraj difinoj, sed ankaŭ analizado de la broŝuro mem, en kies teksto uzatas kiel absolutaj sinonimoj: partopreni – participi, problemo – vestio, traduko – translato, sekolo – jarcento ktp. Vidu ankaŭ la ekzemplon: „...kontrubiaĵoj de tri aŭtoroj: ab Karel Pič, of Josef Rumler kaj far Eli Urbanová" (P.28). Do, la praktika uzado kontraŭas tion, kion Rumler prave asertas teorie: „la absoluta, sendiferenca, signife senresta, totale identa sinonimo, cetere tre rara, estas praktike senbezona" (P.16).

Evidentas, ke rumlereska (aŭ pičeska) „riĉigo" de Esperanto estas plej facila afero, kiu tute ne bezonas eminentan talenton. Por tio sufiĉas surtabligi kelkajn diverslingvajn vortarojn kaj abunde-redunde ĉerpi el ili „sinonimojn". Multe pli malfacilas solvi artajn taskojn, uzante rimedojn proprajn al la Esperanta lingvosistemo. Ja la esprimaj ebloj de la lingvo prezentas harmonian kaj ekvilibritan sistemon. Tial hipertrofigo de unu tendenco minacas detrui la tutan konstruaĵon.

Mi ne malsanas je neologismofobio. Novaj vortoj aperis kaj aperos en Esperanto, malgraŭ ĉio. Ankaŭ en la Rumlera listo troveblas lingveroj, kiuj probable hejmiĝos en la lingvo. Sed la cetero estas ja leksika balasto, kiu tute ne helpas al la progreso de la lingvo.

Serger Ovĉinnikov

VERE VERDA LIBRO

Poemaro por paco: kolekto de originalaj poemoj. Eldonis: UEA, 1986. 44 pĝ.
Paco estis ĉiam aktuala problemo en la historio de la homaro, kvankam ne ĉiam konsciata. Militoj por sklavoj, por teritorio, por kredo, por kapitalo buĉis milionojn da teranoj, utiluntaj konstrue.

Kune kun la kresko de la armila murdivo kaj apetitoj de la profitantoj el la amasa buĉado, funde de la socia konscio ankaŭ maturiĝis la aspiro al la humanaj rilatoj. Unu el la fruktoj de tiu procezo iĝis la ideo pri la paciga homara lingvo, revelaciita de doktoro Zamenhof. Tiu ĉi interna aŭ homarana ideo jam cent jarojn nutras la korojn de liaj adeptoj.

Tial la temo de paco estas unu el la plej naturaj kaj proksimaj al la Esperanta literaturo. Ĝi estas unu el la vojoj por efektivigo de la humanismaj strebadoj de esperantistoj. Tiom pli aktuale ĝi sonas en la nuna mondo, akumulinta ekstreme ekstermajn fortojn, kiuj unuafoje sin montris fine de la dua Mondmilito. Ne hazarde la nomo Hiroŝimo iĝis sinonimo de la homara doloro. Ĝia sonorilo avertas nin, ke la sorto de la homaro nun dependas de la konscio de ĉiu homo. Kaj estas simbole, ke la poemaron por paco, eldonitan honore al la Internacia Jaro de Paco, uverturas kaj finalas la averta rekviema sonoro de la Hirosi^ima sonorilo per la poemoj de N. Andrianova kaj A. Zajsanov (Sovetunio). Hiroŝimo ne devas ripetiĝi – tion ripetas la japano Ueyama M., la samon – brazilano M. Borges dos Santos, kaj kune kun ili – ĉiu konscia homarano.

La vorto paco estas ripetata tra la libro en diversaj lingvoj. Sed aparte simbolaj estas greka EIPHNH, latina PAX, hebrea ŠALOM' en la poemo de G. Berveling (Nederlando): tri vortoj, tri civilizoj, tri mondkonceptoj, tri konceptoj de paco: 1) ni ne estas agresantoj, sed armas nin por defendi; 2) se vi volas pacon, preparu militojn, konkeru; 3) iri renkonten unu al la alia kun konfido kaj amo, por ke finfine la infana raso maturiĝu por la racia homa kunvivado. Bedaŭrinde ŝalom ial ne inspiras la israelajn politikistojn; evidente ne sufiĉas nur la vorto.

Multaj poemoj ligas la pacon kun esperantismo. Aparte resonis en mi la poemo „Lidia" de C. Mallia, post la vizito de Treblinka en la Jubilea Kongreso. La leganto trovos en la verda libreto tre diversajn poemojn laŭ la formo kaj enhavo: de filozofio ĝis pamfleto, de klasika rondelo ĝis libera (eĉ proza) verso, verkitaj de la „vivantaj klasikuloj" kaj de la juna generacio. La libro estas oportuna por preparo de la laŭtemaj klubaj aranĝoj. Tamen la kumulo de versaĵoj pri unu temo rivelas ankaŭ la alian efekton: kvankam bone metiitaj, kune ili aspektas tro grize. Ne oftas la ekbriloj de l' arto. La aŭtoroj jen ŝajnas cirkuli en la verda karuselo, jen superŝutas per la gazetaj sloganoj. Eble nur sola poemeto fulme prilumis la cerbon, bildigis por momento la kriantan kaj ĝemantan mondon: „Mi estas" de U. Becker (GDR). „Mi estas la nuntempa homo kaj ne volas morti". Kaj se mi ne volas, mi agu, ke ne mortu la aliaj.

Nikolaj Lozgačev

Torĉo de espero

Smirnenski, Hristo. Tra la ventego: Elektita verkaro. Antaŭparolo de G. Canev. – 3a eld., kompl. – Sofia: Sofia-Press, 1986. – 144 p. Prezo por Hungario: 50,-forintoj.

Hristo Smirnenski – revolucia poeto, kiu staris ĉe la ekiro de la nova bulgaa poezio – travivis vivon bole kurtan kaj flaman. Li estis filo de sia ŝtorma tempo kaj tiu tempo forte stampiĝis en liaj kreaĵoj.

La poezio de Smirnenski havas ruĝan koloron. Klaras, ke li jam firme elektis por si la komunisman mondkoncepton. La sincereco de liaj poemoj allogas. Li sincere deziris bonon al la homaro, sincere malamis la kapitalismon kaj sklavecon; verve kredis je la bela futuro. tamen la revolucia temo estis ne sola en la kreado de Smirnenski, kaj en la libron, ekzemple, ne eniris liaj lirikaj perloj, kiaj „Birdeto", „La amara kafo" k.a.

La poeto mortis 25-jara, kaj la disfloro de lia talento ankoraŭ ne atingis la apogeon. Smirnenski laboris sur la konkreta historia grundo, prenis realajn heroojn kaj eventojn, sed abunde utiligis la rimedojn de la simbolismo. La interplekto de la du stiloj – simbolismo kaj realismo – klare videblas en „La printempo de la sklavoj", „Moskvo", „Proleto", „La norda Spartako" k.a. Ni prenu por ekzemplo la poemon „Karl Liebcknecht", en kiu Smirnenski priskribas la proletan ribelon en Berlino en 1919 kaj la morton de l' granda germana revoluciulo. Ĉi tie la poeto figuras la militon kiel „demonon fajrspiran", germanajn soldatojn kaj kapitalistojn kiel „blindulojn kondukatajn de hienoj rabaj", Berlinon kiel „monstron kun grandaj brakoj" k.t.p. Rezulte la poemo prenas iom afiŝan formon kaj la tipo de Karl Liebcknecht aspektas kartone plata, havanta nur unu specifaĵon – la revolucian heroecon.

La poemoj de Smirnenski ofte estas kontraste konstruitaj. La nigraj tonoj de la kapitalisma realo najbaras kun la blankaj tonoj de la komunisma estonto, akre negativaj tipoj de la burĝoj apudas kun la helaj vizaĝoj de revoluciaj herooj kaj laboruloj. Tio iom simpligas la poezion, kiu do ne donas al ni la tutan gamon de la homaj sentoj. La rektliniaj tipoj ne havantaj la homan karnon abundas en la versaĵoj de Smirnenski („Johano", „La morto de Deleklur' "). Pli realajn tipojn la aŭtoro donas kiam li ŝanĝas la marŝan ritmon kaj provas pli atente alrigardi la homojn en „Florvendistino", „Stratvirino", „La maljuna muzikisto", „Vintraj vesperoj", „Rosa Luxemburg".

La tradukoj en la libro estas diversnivelaj. Foje ŝajnas, ke la tradukintoj tro hastis traduki kaj pro la hasto ne sukcesis eviti bulgarismojn. Ekzemple, la internacia leganto veršajne stumblos ĉe tiuj frazoj:

Ke via mano, fratoj
estiĝu firma ĝi,
ĉar per la lum' skarlata
flamigas stelon vi.

Kaj stelon ĉi admiros
pro ĝia vok' inspira
la nun dormantaj viroj
al pano kaj liber'.

(„Norda lumo", trad. At. Lakov)

En maten' de hela ero, per la torĉo de espero
venas viglaj eskadronoj

(„Ruĝaj eskadronoj", trad. At. Lakov)

Kaj vibras via stel' rubena for'
al ĉiu sklava terangulo

(Moskvo, trad. As. Grigorov)

Ne mankas en la libro stilaj kaj eĉ gramatikaj eraroj („... la fajron de la sklava mia brust'" en „Norda Spartako", trad. At. Lakov). Ni prenu aliajn ekzemplojn. En „Moskvo" la tradukinto en unu frazo dufoje skribis la vorton „sklavo", kvankam ĉe Smirnenski en la originalo estas du diversaj vortoj. En „Tra la ventego" la tradukinto As. Grigorov uzas la esprimon „jugo de jarcent'", kiam temas verŝajne pri „longdaŭra, eterna jugo". En la versaĵo „Ni" (trad. As. Grigorov) ni renkontas frazon „nin bezon' sufokas" anstataŭ „nin mizer' sufokas".

Tiuj oftaj eraroj montras, ke la Esperanta versio de Smirnenski estas apenaŭ etalona.

Tamen la libro adekvate respegulas la spiriton de la poezio de Ĥristo Smirnenski, ties ĉefajn tendencojn kaj flankojn. Ĝi malfermas al ni la gravan reprezentanton de la bulgara kulturo, pri kies kreado antaŭe ni apenaŭ havis klaran imagon.

Aleksandr Zagvazdin

Ĉu la moderna homo ŝatas eleginojn?

Ranko Risojeviĉ: BOSNIAJ ELEGIOJ (Tradukis Vesna Skaljer-Race. — Banja Luka: Komunuma Organizo de Esperanto-junularo, 1986. — 46 p., il.

Se la eldonisto publikigas detektivaĵon, li prave esperas pri intereso de la publiko kaj pri financa sukceso. Sed elegioj... Estas financa risko. Feliĉe, la gustoj diversas: ekzistas ankaŭ ŝatantoj de melankoliaj lirikaĵoj, tiom pli de bonaj elegioj.

Se oni deziras imagi, kiel la muziko estas rerakontebla(!) per vortoj, oni legu tiun ĉi ĉarman libreton. Jen kelkaj pecoj:

Kvazaŭ malgrandaj bosniaj ĉevaloj,
post supreniro, ĉe besttrinkejo,
sian fortan pulson aŭskultas la vortoj,
pro kio en la korpo ĉio tintas kaj
resonas.

Estas agrable konscii, ke la mondo ne estas unuecigita, ke ekzistas artistoj kun originala mond-vido:

Post la monto estas akvo
kiun oni trinkas vespere,
kiam tra la korpo,
kvazaŭ en la tempo de maturiĝo,
ekfluas la vivbruego.

Estas malfacile juĝi pri la serbokroata originalo, sed la traduko sonas spontane, ne vidigante spurojn de alilingvigo:

Kion ĝi kaŝas, honorplena kvartalo?
Iuj lignoŝuoj tie sonadis,
iuj kantoj tie estis kantataj,
kaj supre, ĉe ĉerizujo, Isak Samokovlija,
fiksaŭskultante al la misagorditaj homaj
korpoj,
sekigadis per cindro la simplajn
rakontojn.

El la surpe dirita povas kreiĝi la imago, ke la poezio estas tute abstrakta. Tamen ne — eĉ kontraŭe! — ĝi estas plena de konkretaĵoj. La elegioj estas dediĉitaj al diversaj popolaj herooj, poetoj, pentristoj, kiuj ankaŭ rolas en ili.

Al la spirito de la libro kontribuas siaspecaj altartaj ilustraĵoj.

Boris Kolker
(Sovetio)

Kien kondukas via verda pado?

Ĥristo Gorov: MIA VERDA PADO. Eseoj kaj rakontoj. — Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1987. — 183 p. — 21 cm. Prezo por Hungario: 50,-forintoj.

Ĉiu homo en Esperantujo marŝas sian verdan padon. Ĉe multaj ĝi malperas, apenaŭ komenciĝinte. Sed, feliĉe, ne mankas tiuj, kiuj marŝas sur sia verda pado dum la tuta vivo kaj marŝas ne vane. Unu el tiuj homoj estas la bulgara veterano Ĥristo Gorov.

La libro entenas multajn biografiajn eseojn kaj multajn rakontojn.

Ni ekscias pri la Esperanto-movado en Asenovgrad en la 20-aj jaroj. Ĝi estis surprize vigla movado, en kiu partoprenis ĉefe homoj el malaltaj soci-tavoloj. La lernadon de Esperanto subtenis Komunista Partio. Estas priskribita la kreado de la laborista Esperanto-movado, sed la aŭtoro lasas en ombro sian grandan rolon en tio. Kun interes ni legas la ateston de la kunbatalanto pri David kaj Solomon Sasonov-oj. La fondan kunvenon de la Bulgara Laborista Esperanto-Asocio en la 1930a jaro gvidis Nikola Aleksiev.

Ĥristo Gorov ekamis la Esperantan literaturon en sia juneco, li multe legis kaj provis verki. Ni ekscias interesajn detalojn pri la skismo en SAT, pri la personeco de Lanti, pri IPE (Internacio de Proletaj Esperantistoj), pri IAREV (Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj), pri la historio de tradukado de la poemo „Septembro" de Geo Milev far Ĥristo Gorov kaj David Sasonov.

Ni ekscias pri la stato kaj batalo de la laboristoj. Gorov tradukadis en Esperanton kaj liveradis al redakcioj materialojn el nacilingvaj gazetoj. Li ricevadis siajn artikolojn, tradukitajn pere de Esperanto en la rusan, ukrainan, uzbekan, germanan, anglan, francan, ĉeĥan kaj aliajn lingvojn. PEK-agado (Proleta Esperanto-Korespondado) daŭris ĝis la 1933a jaro.

Sed jen la faŝistoj konkeris la potencon en Bulgario. La aŭtoro rakontas pri la profesia revoluciulo-esperantisto Mitko Surev, murdita de faŝistoj. Jen alia elstara persono Ivan Armin — gvidanto de junkomunistoj, veterano de Esperanto-movado, kiu pasigis siajn lastajn 20 vivojarojn en Sovet-Unio. Nova figuro: Elio Miĥajlov — esperantisto, antifaŝisto, pro denunco kondamnita al dumviva malliberecо.

Kiel ni vidas, la vivo de esperantistoj-laboristoj estis tute ne simpla kaj ne trankvila. Ĥristo Gorov mem redaktis la laboristan gazeton „Sturmulo", pro kio li kaj liaj kamaradoj estis arestitaj kaj enprizonigitaj. Bolis la socia vivo en la prizono. „Kolektivo" (komunumvivo de la politikaj malliberuloj) subtenis okupiĝon pri Esperanto. En la prizono dum la 1935-37 jaroj Gorov konatiĝis kun multaj esperantistoj. Tie funkciis eĉ Rondo de Esperantistoj-Verkistoj (Nikola Aleksiev, Kraŝtju Karucin, Ĥristo Gorov k.a.).

Kiam en marto 1941 la germana armeo okupis Bulgarion, bulgaraj laboristoj-esperantistoj serĉis esperantistojn inter germanaj soldatoj kaj agitis ilin ne militi kontraŭ Sovet-Unio.

Oni povus daŭrigi rerakontadon de la eseoj, sed jam estas videble, ke ili estas tre valoraj por la historio de Bulgario kaj la historio de Esperanto.

La beletraj rakontoj de Gorov estas detale analizitaj en la antaŭparolo de Georgi Miĥalkov. Mi ne analizu ilin ĉi tie, sed diru, ke ilin karakterizas romantikemo, klasa batalemo, aktiva pozicio en la vivo.

Multo vidinda okazis sur la verda pado de Ĥristo Gorov. Ĉu ankaŭ vi, kara leganto, havos multon por rakonti pri via verda pado al la juna generacio?

Boris Kolker
(Sovetio)

Mildigita ribelo

Ribela Kordo, poemoj de Ĥristo Gorov sur gramofondisko. Eldonis Bulgara Esperanto-Asocio, produktaĵo de Balkanton. Prezo: 90,- Ft-oj (en Hungario).

Okazas ofte, ke transplanto de literatura verko en alian ĝenron, ties surscenigo aŭ muzikigo havas pli grandan efikon ol la originala verko.

Similan femonemon mi spertis aŭskultante poemojn de la disko „Ribela kordo". El naŭ surdiskigitaj poemoj kvar enestis jam en la samtitola poemaro de Ĥristo Gorov. (Ribela kordo, eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1983.)

La intenco kaj sentoj de la aŭtoro (veterano de kontraŭ-faŝismaj bataloj, laborista kaj Esperanto-movado) estas tre estimindaj: prikanti sinoferemon kaj heroaĵon de pereintaj revoluciuloj, partizanoj, ktp; ankaŭ la aliaj poemoj estas inspiritaj de gravaj sociaj eventoj, movadoj, ŝanĝoj. Kelkaj pecoj (ekz.: Ribeluloj) sonas kiel popolaj baladoj senorname funebraj. Tamen, legante la poemojn ni sentas ian mankon: la poeto vibrigas fakte unusolan kordon.

La muzika aranĝo de Olga Sagaeva, la modela, nuancoriĉa deklamo de Miŝo Zdravev tamen aldonas ion artan al la poemoj; tiuj iom mildigas la ribelon, sed pli alproksimigas poezion.

Márton Fejes

KALDRONOJ

estas la ĉefaj fabrikaĵoj de nia kooperativo — kiu produktas ankaŭ kompletajn kaldronejo-instalaĵojn, krome oksidceramikajojn kaj estajn maŝinojn.

LA KALDRONOJ estas kuŝaj, du, resp. tri-tubaj, laŭtipe tn. varmakvaj, tn. varmeg-akvaj kaj vaporgeneratoraj; funkciigeblaj per tergaso, brulgaso, propan-butan-gaso, ankaŭ per peza kaj malpeza hejtoleo. La povumoj estas 46 kW — 3000 kW.

Kaldronegoj fabrikataj de la kooperativo funkcias en multaj landoj, i.a. en Alĝerio, Irano, Svisio, Ĉeĥoslovakio ktp.

OKSIDCERAMIKAJ *produktaĵoj:*

Tiuj estas vaste uzeblaj en la industrio, ekde simplaj utiligoj ĝis la tn. *bioceramikaĵoj.* Ni fabrikas ilin jam depost 10 jaroj.

- *Artefaritaj dentoradikoj el bioceramiko* estas bone uzataj jam de pluraj jaroj, pere de simpla operacia tekniko.
- Por industria uzado estas fabrikataj el oksidceramiko:
  - teksfaden-okuletoj,
  - kondukringojn por kablo- kaj dratproduktiloj,
  - ŝirmkonusojn por veldmaŝinaj ajutoj, industriaj ajutoj,
  - kavofarilojn en brikoj,
  - enmetaĵojn por valvoj,
  - ekbruligajn elektrodojn kaj multajn aliajn

teknikajn ceramikaĵojn. Ili estas vaste eksportataj al Anglio, Ĉeĥoslovakio, Germana Federacia Respubliko, Hispanio, Rumanio, Svisio.

MAŜINOJN *produktante ni fabrikas:*

- elektran potfaristan torn-diskon,
- argilpistajn masinojn ankaŭ por industrial celoj,
- pilotvalvojn (papiliajn) velditajn por ĉefaj kaj flankaj kondukiloj de trinkakvo, industria kaj filtrita akvo.

KAZÁNGYÁRTÓ ÉS ÉPÍTŐ IPARI SZÖVETKEZET
5091 Orosháza, Csorvási út 68.
Pf. 43
Telefon: 207 Telex: 83581

GAJA PAĜO

En nian redakcion...

envenis vizitanto prezentanta malfacile legeblan manuskripton, kiun la redakcianoj – videble – ne tro avide tralegis.

– Eblas, ja eblas – li ekvoĉis memfide – ke mia humuraĵo ne ŝajnas nun ridiga. Sed kredu, presite en Hungara Vivo ĝi certe impresos pli bone!

Bestoprotektanto

– Nia kuiristo produktas grandiozan kotleton el porko – ofertas kelnero.

– Kion vi pensas! Mi bedaŭras la porkojn! Do alportu nur iom da ŝinko.

Kontraŭnaza profesio

– Via platiĝinta nazo, sinjoro, aludas al boksista kariero, ĉu ne?

– Tute ne! Mi purigas fenestrojn, kaj feliĉe, ofte ankaŭ ĉe virinaj duŝejoj...

Ankaŭ feliĉo

– Dum kartludo mi perdis mian tutan salajron...

– Kia malfeliĉo! Akceptu mian konsenton.

– Malfeliĉo, sed ne tre... La gajninto estis, feliĉe, mia edzino!

Eltaksie

Fremdulo althumore veturas al sia hotelo, kiam la taksiisto surprizite vidas, ke la pasaĝero demetas siajn vestaĵojn.

– Sinjoro, ankoraŭ ni ne estas en la hotelo!

– Homo! – balbutas tiu. – Kial vi ne diris pli frue? Ĵus mi metis miajn ŝuojn antaŭ la pordon.

Kaj morgaŭ

– En via hotelo tute ne eblas ripozi!

– Sed kial, sinjoro?

– Mia najbaro en ĉiuj 5 minutoj frapis la muron, por ke mi ne bruigu mian radion...

– Kial vi ploregas, karuleto? – demandas panjo la fileton.

– Paĉjo frapis per martelo sian fingron!

– Nu, pro tio ne vi devas plori.

– Sed jes, ĉar mi ekridis...

Ho, ankoraŭ pri taksio

Pasis la puntempo, post 10 jaroj eliras la eksprizonulo, kaj surstrate li haltigas taksion, kriante: – Ĉu ankaŭ vi estas libera?

Ni lasu jam la sinjorojn!

En la vilaĝo koko postkuras – memkonpreneble – ĉarman kokineton.

– Kial vi forkuras? – li krias – ja mi certe kuratingos vin!

– Mi bone scias. Sed se mi ne kurus, oni nomus min putino!

Ĉe juĝisto

– Bonvolu diri al ni – petas juĝisto – kiam atakis vin sekse tiu viro?

– Ankoraŭ somere, sinjoro juĝisto.

– Tamen, diru iom pli precize!

– Nu, dum la tuta julio, ankaŭ dum aŭgusto kelkfoje.

Ĉe aŭguristino

– Baldaŭ nova viro paŝos en vian vivon, sinjorino!

– Feliĉege! Kaj kia li estos?

– Blonda! Ridema, kaj tre juna. Kaj li pezos tri kilogramojn.

Denaska naturisto

– Kiam vi iĝis naturisto, amiko?

– Nu, iĝi mi tute ne iĝis. Denaske mi nudistis.

Denaska Viro?

– Diru Helenka, ĉu vi neniam volis esti viro?

– Vere ne, kara Paŭlo. Kaj vi?

Ervin *Fenyvesi*

El verkaro de Julio Baghy

ni citas kelkajn titolojn en la ĉeflinioj de nia enigmo. (H.1., H.8., H.30., H.6., V. 12., V. 15., kaj V. 16. – ensendendaj linioj.) Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.
Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.

HORIZONTALE: 1. Kolektaĵo de verse reverkitaj popolfabeloj, aperinta en 1967. 8. ,,Kiel ... instruis angle" – titolo de novelo el ,,Dancu, marionetoj!" 13. Pacience toleri, persiste elporti. 14. Restanta daŭre apud li, 15. Impresiĝos de surprizo, 17. Metala element', 18. Femalon, 19. Kora inklino, 21. Malagrabla sent', ekz. pro acida frukto, 22. Distingeble, pure, 24. Unu – angle, 25. Radiumo, 27. Naskolandon, 29. Mallongigo de scienca titolo (ne Esperante), 30. Elektita poemaro de J.B. (eldonis Pirato, 1970.), 33. Gas' de reklamoj, 34. Movmanier', 35. Eluzi, elfroti(R), 36. Du vortoj: legendo kaj mallegendo (ambaŭ substantivoj el eseotitolo de V. Benczik: ,,Julio Baghy – ...-j kaj ..."), 39. Identaj vokaloj, 41. konjukcio, 42. Reen: kompara konjunkcio, 43. Vanadio, 44. Tre-tre malnova (R), 46. Ĝi impresas flarsenton, 49. Aŭdebla vibrad', 50. Blanka likvaĵ' de mamuloj, 52. Komenciĝas ĉe Uralo(R), 53. Inviti, 54. Vegetaĵ', kiu kaŭzas brulan jukon ĉe tuŝo, 55. Spec' de kolbas', 56. ...-io: gentano en Nov-Zelando, 57. Sufikso, 59. Malsupra ĉeftrabego de ŝipo, 60. Novelo el ,,Dancu, marionetoj!".

VERTIKALE: 1. Prepozicio, 2. Nek nin, nek vin, 3. Reen: ,,...ni staru, fratoj amataj.." 4. Sovaĝbest', 5. Elstara tenilo (R), 6. Ekas ritmo(!), 7. Senpatra, eĉ sen ro (R), 8. Prefikso, 9. Ekzistanta nur en la spirito, 10. ...-lando: tamen ne lando, sed insulo en la Norda maro, 11. Belflora venena arbedo, 12. Noveltitolo el ,,Koloroj", 15. Poemojn, novelojn kaj unuaktaĵojn enhavas tiu ĉi libro, 16. Titolo de lia fama poemo, 19. Rita preĝeja tablo, 20. Kantbirde, 22. Akva vegetaĵ', 23. Dio de la ventoj (R), 26. Antaŭe – fine (!), 27. Kompensis ies kulpon, 28. Olea graso, reen, 31. Mallongigo de virnomo, 32. Grupo, amaso, 37. Populara trinkaĵo, 38. Ĉiu ekstrema flanko, 40. Vulkana montar' en Armenio, 43. Ne konsonanto, 45. Teatrist', 47. Prepozicio, 48. Kiel V.6., 49. Masiva, ne flua (R), 51. Delokigi ion al si, 53. Malplena, 57. Tabelvorto, 58. Tantalo.

I.Z.



SOLVO DE LA KRUCENIGMO EN LA NUMERO 1987/6:
Sveda novelaro, Mistero minora, Koko krias jam, Norda Prismo.
PREMION gajnis per lotumado: S-ro Zdenek Hrsel, Brno, CS; s-ino Pataki Lajosné, Budapest, H, s-ro Alec Venture, Wallington, GB.

EKZAMENO SEN RISKO

Ekzamenanto: Márton Fejes

Adolesko de Blazio Vaha

Tiu ĉi verko de la talenta aŭtoro ne estas vera romano laŭ tradicia formo, tamen ĝis la lasta paĝo ĝi vekas intereson kaj kaptas nian atenton.

1. Kion signifas (laŭ la libro) la slavdevena familia nomo de la protagonisto (Spertozza)?
2. „...mi restos en Pollando. Mi edziniĝos al pola filologo..." – Kiu skribis tiun adiaŭleteron al Jozefo?
3. Kio esta la titolo de la poemo, kiu komenciĝas jene:
   „Al viv-ekstermo mi ekskursis,
   proksima al najbar'-vilaĝ '."

Limdato: du monatoj post la alveno de la revuo.
Solvo de la demandoj en la n-ro 1987/6:

1. La antaŭparolon verkis Nikola Aleksiev (hon. prezidanto de MEM).
2. La aŭtorinon invitis Japana Pacdefenda Esperantista Asocio.
3. La vizito okazis en la 57a jaro laŭ japana kalendaro.

Premion gajnis per lotumado: S-ro Sune W. *Ahlm,* Vanersborg, Svedio; s-ino Marike *Leht,* Tallin, Estonio SU. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Korespondi deziras

El nova Esperanto-klubo 20 komencantoj kun geamikoj tm. *Gurjev* Avangard 3, Esperanto-klubo Freŝa Vento, pk. 35. Kazaĥstano SU-465.027. – Studentoj (20) de tekn. altlernejo kun gejunuloj tm, ankaŭ kun altlerneja E-grupo. – S-ro *Sárdi* László, *Kecskemét* pk. 91, H-6001. – E-klubo „Bonvenon" ktm, pĉt (20-35), *Minsk* pk. 182. SU-220.050. – Olga *Popova* (43) dommastrino, ktm pri popolkutimoj, nuna vivo k.a. kun amikoj. *Plovdiv* str. Dimitar Blagoev 129/A, BG-4004. – F-ino Malgorzata *Arciszewska* (22) akceptistino, pri turismo, literaturo, sporto, (dancas en grupo folklora) kol. bk, bk, florklor-pupojn. *Piaseczno* Lubartowa, Oŝr. Szkol. Kadr, PL-21-113. – Studentino Barbara *Walaszek* (23) pri turismo, muziko, literaturo, kantas, gitaras. *Bielsko*-Biala, Kaz. Wielkiego 28/5, PL-43-400. – Slawomir *Szczygiet* (25) pri turismo, literaturo, sporto, muziko, kol. bk, pm. *Ostrowiec* ul. Baltowska 323. PL-27-400. – Matematikisto Antanas *Krenceviĉius* (38) ktm, pĉt. *Vilnius* a/d 1634, Litovio SU-232.010. – Igor A. *Galicin* (21) ktm, pĉt. *Gorkij* poĉtamt, poste restante, SU-603.000. – Aleksandr V. *Ivanov* ktm, pĉt. *Gorkij*, sama adreso. – Ĉina laboristo *You Hong Giang* (24) amatora fotisto. Siĉuan-provinco, *De-Jang* Eosto-vaporturbino-uzino-unu-malpeza. P.R. Ĉinio. – S-ro Lucjan *Marcinjak* (40) el instituto energetika. Pri turismo, literaturo, kol. bk, tur. prosp. *Dziwiszów* 203, PL-58-513. – Malcjev *Gleb* (15) ktm, *Cjurupinsk* (Ĥersonsk.) ul. Proletarskaja 71. SU-326.520. – S-ino Svetlana *Smirnova* (24) ktm, pĉt, *Gorkij* Oreĥovskaja 28, SU-603.069. – S-ino Ljudmila *Prokofjeva* (24) ktm, pĉt, *Gorkij* Krasnij Perekop 43-1. SU-603.018. – Bibliotekistino Iwona *Broniewska* (27) pri literaturo, kol. bk. *Katowice* ul. PCK 9m7. PL-40-057. – Ekonomistino Krystyna *Gasiewicz* (40) vidvino ktm, pri vintraj sportoj, libroj, akvosporto k.a. *Dzierzoniów* os. Jasne 19A/32. PL-58-200. – S-ro Arnis *Uzklingis* (28) pri muziko, E-movado, kol. bk, gram. diskoj, E-libroj kaj gazetoj. *Pikavercsjsk,* Estonio SU-203.041. – S-ino Rotraut *Asmus* ktm, pĉt. *Wusterhausen* E. Thälmann Str. 19. DDR-1903. – Ruslan *Zaĥarov* (16) ktm, pĉt. *Kaluga* ul. Olgoreskaja 17-12. SU-248.011. – Instruistino f-ino Elzbieta *Kuŝwik* (28) pri turismo, vojaĝo, muziko, kol. sondiskoj. *Kalisz* str. Bieszczadzka 4. PL-62-800. – S-ino Maria *Baczynska* (29) pri turismo, folkloro, geografio, kol. libroj, bk. *Chojmice* ul. Konopnickiej 2/2. PL-89-600. – S-ino Rita *Luineviĉiené* (30) kun Jap., Ĉinio, H. BG pri literaturo, arto, kulturoj. *Birzai* N. Radviliskis, Aušros 9-4. Litovio SU-235.291. – S-ino Zoja *Vorobjova* (41) ktm, pĉt, *Gorkij* Ivanova 19-22. SU-603.050. – E-grupanoj de pupteatro, ktm, interŝ. pupteatraĵojn. *Panevezys*, Pupteatro, Republikos 77. Litovio SU-235.307. – Ludmila *Gavŝina* (31) ktm, pĉt. *Gorkij* Avtomekaniĉeskaja 11-30. SU-603.016. – F-ino Dina *Kvasova* (20) ktm, pĉt. *Gorkij* Goglja 8A-1. SU-603.000.

LETERKESTO

Maurice *Merger,* St. Julien les Villas, F: Vi tre miris pro ia stranga recenzo en Literatura Foiro pri Hungara Antologio – kaj ni same miris, precipe pro la ŝmirita prestiĝo de LF. Vi demandas nin, ĉu aro da ciferoj, procentoj kaj aliaj matematikaj blufadoj faras poezian recenzon pli „moderna"? – Laŭ ni, tiaj kuriozaĵoj devis anstataŭi la verajn poezian kaj lingvan pritaksadojn; ĉar neniam proporcioj de vivoverkoj (kiel ajn iu kalkuladas), prezentis la gloron merititan de poetoj, sed la pintoj elstarantaj el ilia – eble tre vasta – verkado. Kaj tiamaniere indas rigardi ankaŭ la meritojn (*alifoje* altnivelajn) de la menciita revuo.

S-ino Minerva *Massen,* San Francisco, Usono: Kunligi liberpensulojn kaj ateistojn esperantistajn celas do – kiel ni vidas el via letero – la nova ateista organizo ATEO. Estas certe instiginda ĝia brava intenco por libere kaj racie diskuti filozofiajn kaj sociajn problemojn ankaŭ en Esperantujo, precipe se tio altiros intelektulojn al nia Esperanta kulturo. Ni mencias por interesiĝantoj vian adreson: CA-94121/3255, 855-La Playa +158.

Václav *Pospisil,* Zelezny Brod, CS: Se vi konsideras „malkaŝe esprimanta" nian revuon, ni devas akcepti la etikedon, sen falsa modestemo; aliflanke kredu, ke ni emas daŭre resti sur tiu larĝa ŝoseo. Verŝajne pli kaj pli multaj el via lando nun rimarkas same; ja lastatempe kreskas nia tiea abonantaro, kiu atingis ĝis nun tridekon, relative ne grandan nombron. Estu amike salutata inter niaj novaj abonantoj!

Sergei *Vershinin,* Uljanovsk, SU: Ni ege bedaŭras, sed – pri la t.n. „radikrimoj" – ni devas firme resti ĉe la starpunkto, kiun esprimis *Vilmos Benczik* en n-ro 1988/1. Nome, parolante aŭ deklamante en Esperanto, *neniaj* vortoj, similaj al viaj ekzemploj (máŝet – mamáŝa) estas konsidereblaj kunsonoraj rimvortoj! Silaboj rimaj devas aspekti – por ekzemplo – kiel máŝet – mamáŝet, do la silaboj ŜET devus ripetiĝi por ke oni aŭskultu rimadon – alimaniere tute ne eblas. FORTE devas havi rimon ekz. MORTE, sed MORTO, eĉ MORTADO, aŭ FORTO *ne* estas akcepteblaj kiel rimantaj vortoj. Pri tio en Esperanta poezio fakte ne eblas diskuti, kvankam pri multaj aliaj rimformoj (asonanco) ja eblas.

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik * Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Stefan McGill, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro György Nanovfszky, Péter András Rados, Sándor Révész, Zsuzsa Varga-Haszonits. * Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk * H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 563-659, 564-093. Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. * Respondeca eldonanto: Oszkár Princz. * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (HELIR, Budapest XIII. Lehel u. 10/a. H-1900) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. *
Indexszám: 25 377 0018-7704. ISSN 0018-7704.

DUTÉP
KECSKEMÉT

ÉPTEK
ÉPÍTŐIPARI TERMELŐESZKÖZKERESKEDELMI VÁLLALAT

DUTÉP prilaboris la industrian teknologion de tuboizolado per fibrajoj.
Uzeblaj:
– en brulminacataj laborejoj
– ce transportado de alttemperaturaj materialoj
– por kutima uzado.
Dek jaraj spertoj pri la fabrikado. Jam 100 km da tuboj – referenco – en multaj landoj.
Garantiata gis 30 jaroj! Malaltaj prezoj.
Plena gamo da elemtoj.

DUTISOLAR
preizolita varmokonduktilo-sistemo jam mendebla.
Fabrikas la Stata Konstru-Entrepreno:
Duna-Tisza Közi Állami Építőipari V.
Kecskemét, Kurucz krt. 16. H-6000
Vendas la Konstrufaka Komercejo de Produktiloj, Tubo-fako:
Építőipari TEK-Vállalat, Csőtermék osztály
Telefono: + 36 1 474-153 telekso: 22-5724



Informoj – mendo
Tel.: (76) 29-899 aŭ telekso: 26-332
ĉe inĝ. Lajos VARGA.

KONSTRUADO DE TELEHEJTADO-KONDUKTILOJ SUPER LA EŬROPA NIVELO

RIPOZO
KURACADO
FOLKLORO
BURGO-VIZITOJ
MONTAJ EKSKURSOJ
VINO-VIZITOJ

BORSOD TOURIST



Plej variaj pejzaĝoj viziteblas en la norda departmento de Hungario BORSOD-ABAUJ-ZEMPLÉN. Troveblas: tie ĉi parto de la Granda Hungara Ebenaĵo, ĉermaj pitoreskaj montaroj kaj eksterordinaraj naturbelaĵoj, krom historiaj vidindaĵoj. Multajn altiras la grandioza-co de la stalagmita groto „Baradla", same la riĉa-pompa folklor-regiono „Matyó" kaj la historie famega pejzaĝo de la Tokaj-vinoj.

Krom tiuj elstaraj vizitindaĵoj oni akiras multe da plezuroj ankaŭ ĉe la lagoj dum fiŝkaptado kaj boatado, ĉe la kuracaj termobanejoj kaj plaĝoj. Oni abunde ĝuas promenante aŭ ekskursante, veturante inter la geologie kuriozaj formoj de la montpejzaĝoj kaj kvazaŭ praaj arbaroj, al la multaj historiplenaj burgoj kaj kasteloj. Por la senĝena plezurado de tiu turisme riĉa pejzaĝo kontributas kompleze via gastiganto.

BORSOD TOURIST
H-3525 MISKOLC, Széchenyi u. 35.
Telefono: + 36 46 88-036
Telekso: 62-605

1988 NOV 18.